

EL POPOLA ĈINIO

N-ro 1 Januaro 1968



Amike renkontiĝas la kreintoj de la granda nerompebla batalamikeco inter la du partioj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio, la granda gvidanto de la ĉina popolo kamarado Maŭ Zedong kaj la granda gvidanto de la albana popolo kamarado Enver Hoxha.

Granda Brila Lampo Socialisma en Eŭropo

—Foto-ekspozicio de la Ĉina Fotarta Delegacio al Albanio

paĝo	*kolono*	*linio*	*eraro*	*korekto*
28		32	sen neniu rando	kun neniu rando
42	dekstra	1	Ea Konstvuado	En Konstruado
48	dekstra	3	reakcia lino	reakcia linio
58	bildklarigo		ruligas	bruligas



Kamarado Hoxha en popolamaso



Aktive antaŭenmarŝas grandpaŝe albanaj gejunuloj laŭ la granda vojo de revoluciigo!



La heroa Albanio estas neinvadebla. Se la malamiko aŭdacos agresi nin, ni plene ĝin pereigos!



Albanaj popolanoj mitingas por subteni la heroan vjetnaman popolon en ĝia batalo kontraŭ la usona agreso por savi sian patrolandon.

Vortoj de Prezidanto Maŭ

Klasbatalo, porprodukta batalo kaj scienca eksperimentado estas la tri grandaj revoluciaj movadoj por konstrui potencan socialisman landon. Tiuj movadoj estas solida garantio, por ke komunistoj sin liberigu de burokratismo, iĝu imunaj kontraŭ reviziismo kaj dogmismo, kaj restu por ĉiam nevenkeblaj. Ili estas fidinda garantio, por ke la proletaro povu unuiĝi kun la vastaj laborantaj amasoj por realigi demokratian diktaturon. Se, pro manko de tiuj movadoj, la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj kaj diversspecaj demonoj estus permesataj amase elrampi, dum niaj kadroj fermus siajn okulojn al ĉio ĉi tio kaj multaj eĉ ne povus distingi la malamikojn de ni mem, sed kunlaborus kun la malamikoj kaj fariĝus koruptitaj, senmoraligitaj kaj dispartigitaj de la malamikoj, se niaj kadroj estus tiel eltrenitaj aŭ la malamikoj sukcesus enŝteliĝi, kaj se multaj el niaj laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj fariĝus same sendefendaj kontraŭ la samtempe praktikataj molaj kaj malmolaj taktikoj de la malamikoj, do antaŭ ol pasos nelonga tempo, eble nur kelkaj aŭ dekkelkaj jaroj, maksimume, kelkaj jardekoj, neeviteble okazus kontraŭrevolucia restariĝo tra la tuta lando, la marksism-leninisma partio sendube fariĝus reviziisma partio, faŝisma partio, kaj la tuta Ĉinio ŝanĝus sian koloron.

Noto pri "Sep Bone Skribitaj Dokumentoj de Ĝegiang-provinco Koncerne la Partoprenon de Kadroj en Korpa Laboro" (9 majo 1963), citita laŭ *Pri la Pseŭdokomunismo de Ĥruŝĉov kaj Ĝia Historia Leciono por la Mondo.*

Solena Kunveno de la Popolanoj en

Celebri la 50-an

POSTTAGMEZE de la 6-a de novembro, 1967, la popolanoj de nia ĉefurbo okazigis kunvenon por solene celebri la 50-an datrevenon de la Oktobra Revolucio.

Kamarado Lin Biaŭ, la intima batalamiko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, faris ekstreme gravan paroladon en la kunveno.

La celebran kunvenon ĉeestis ankaŭ kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng, Li Fuĉun, Giang King k. a.

La kunveno okazis en la grandioza Popola Halo. La kunvenejon regis revolucia batalspirito de la proletaro. Sur la fono de la podio alte pendis kolosaj bareliefaj portretoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj granda portreto de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĉe la centro. Kontraŭe al la podio alte pendis ruĝaj rubandegoj kun la sloganoj: "Vivu la granda marksismo! Vivu la granda leninismo! Vivu la granda penso de Maŭ Zedong! Vivu, vivu, longe vivu nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ!"

Antaŭ la komenciĝo de la kunveno, la ĉeestantaj komandantoj kaj batalantoj de PLA, revoluciaj amasoj de ĉiuj rondoj kaj junaj ruĝgvardianoj kun la ruĝa revolucia trezorlibreto en la manoj voĉlegis la instrukcion de Prezidanto Maŭ.



Lenin, la granda instruanto de la proletara revolucio

"Analizite ĝis la fino, la vojo de la Oktobra Revolucio estas la komuna hela vojo por la disvolviĝo de la tuta homaro."

la Ĉefurbo por Datrevenon de la Oktobra Revolucio



Stalin, la granda marksist-leninisto

"La socialisma sistemo finfine anstataŭos la kapitalisman sistemon, tio estas objektiva leĝo sendependa de homa volo. Ne gravas kiel ajn la reakciuloj provas reteni la radon de historio, frue aŭ malfrue revolucio nepre okazos kaj certe triumfos."

Kiam kamarado Lin Biaŭ, kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng, Li Fuĉun, Giang King k. a. suriris la podion, ĉiuj ĉeestantoj stariĝis, longe kaj varme aplaŭdis. Svingante la brile ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* la ĉeestantoj laŭte kriis: "Vivu, vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!"

Kamarado Ĝoŭ Enlaj deklaris la inaŭguron de la celebra kunveno. Ĉiuj stariĝis kaj laŭte kantis *La Internacio* kaj *Ruĝas la Oriento.*


En tondra aplaŭdado kamarado Lin Biaŭ komencis sian paroladon. Lia parolo estis fojefoje rompita de ŝtormaj aplaŭdoj.

La kunveno finiĝis en kriado de sloganoj kaj kantado de *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto.*

En tiu tago, celebra aktivado por la 50-a datreveno de la Oktobra Revolucio estis aranĝita ankaŭ en Ŝanhajo, Tiangin kaj aliaj urboj.



19-an de julio, 1917, kiam la burĝara provizora registaro ordonis aresti Lenin, la Partio decidis lasi Lenin kašiĝi ĉe la lago Razliv. Tie li verkis la faman libron Ŝtato kaj Revolucio, *en kiu Lenin ripete montris ke por la proletara revolucio necesas rompi la ŝtatan aparaton de la burĝaro kaj establi la diktaturon de la proletaro.*




◀ *Lenin*



La kanonado de la krozŝipo "Aŭroro" kontraŭ la Vintra Palaco, la sidejo de la reakcia provizora registaro, anoncis la triumfon de la granda Oktobra Socialisma Revolucio. La bildo montras Linin kaj Stalin en Smolnij-palaco. (pentraĵo)

En la malfrua nokto de la 7-a de novembro, 1817, sub la persona gvido de Lenin, la ribelantaj laboristoj kaj kamparanoj okupis la Vintran Palacon, renversis la reakcian burĝaran provizoran registaron, kaj triumfis la granda Oktobra Socialisma Revolucio! (pentraĵo)



Parolado de Kamarado

ĉe la Kunveno de la Ĉefurba Popolo

la 50-an Datrevenon de la Oktobra

Kamaradoj, junaj ruĝaj gvardianoj kaj amikoj:

Hodiaŭ, la popolo de nia lando, kune kun la proletaro kaj revoluciaj popoloj de la tuta mondo, solene memorigas la 50-an datrevenon de la granda Oktobra Socialisma Revolucio.

La Oktobra Revolucio gvidata de la granda Lenin estis turnopunkto de la homa historio.

La venko de la Oktobra Revolucio brecis la malluman regadon de kapitalismo, naskis la unuan ŝtaton de proleta diktaturo en la mondo kaj malfermis novan eraon de la monda proleta revolucio.

De kiam Marks kaj Engels kreis la teorion pri scienca socialismo, la internacia proletaro kondukis malfacilan batalon dum pli ol cent jaroj, unuj post la aliaj, farante heroajn vivoferojn, por efektivigi la grandan komunisman idealon, kaj faris senmortan kontribuon por la liberiga afero de la homaro.

En sia batalo kontraŭ la reviziismo de la Dua Internacio kaj en la granda praktiko de gvidado de la Oktobra Socialisma Revolucio, Lenin solvis serion da problemoj pri proleta revolucio kaj proleta diktaturo, la problemon pri venko de socialismo en unu sola lando kaj tiel disvolvis marksismon en la etapon de leninismo. Leninismo estas marksismo en la epoko de imperiismo kaj proleta revolucio. La kanonado de la Oktobra Revolucio portis leninismon al la tuta mondo, tiel ke tute noviĝis la fizionomio de la mondo.

En la lastaj 50 jaroj, sub la standardo de marksism-leninismo kaj laŭ la vojo de la Oktobra Revolucio, la proletaro kaj revoluciaj popoloj de la tuta mondo antaŭenpuŝis la mondan historion en alian tute novan epokon, t. e., epokon dum kiu imperiismo iras al kompleta disfalo kaj socialismo iras al la venko tra la tuta mondo. Ĝi estas granda nova epoko, en kiu iras la granda decida batalo inter la proletaro kaj la burĝaro en la tuta mondo.

Sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, post la venko de la naci-demokratia revolucio, la ĉina popolo plue akiris la grandajn venkojn de la socialismaj revolucio kaj konstruado. La socialisma Ĉinio jam fariĝis potenca citadelo de la monda revolucio. Persistante ĉe la vojo de la Oktobra Revolucio, la heroa albana popolo starigis brile ruĝan standardon en Eŭropo. Per sia Kontraŭusona Nacisava Milito la vjetnama popolo starigis brilan ekzemplon de kontraŭimperiisma batalo por la monda popolo. La naci-

Lin Biaŭ

por Memori Revolucio

demokratia revolucia movado de Azio, Afriko kaj Latinameriko estas forte disvolviĝanta. La vicaro de marksist-leninistoj kreskas senĉese kaj nova situacio aperis en la internacia komunisma movado.

Kompare kun la stato antaŭ duonjarcento, la nuna monda proleta revolucio multe pliprofundiĝis enhave, multe plivastiĝis skale kaj multe pliintensiĝis en sia batalo. La nova historia epoko metis serion da novaj gravaj problemoj antaŭ la marksist-leninistojn. Sed, analizite ĝis la fino, la plej radikala problemo ankoraŭ restas tiu de depreno kaj firmigo de ŝtatpotenco.

Prezidanto Maŭ iam diris: **"Ĉiuj revoluciaj bataloj en la mondo estas por depreni ŝtatpotencon kaj ĝin firmigi."** Tio estas granda marksism-leninisma vero.

La batalo inter la marksist-leninistoj kaj la reviziistoj ĉiam koncentriĝas sur tiun radikalan problemon. La modernaj reviziistoj, kun Ĥruŝĉov kaj liaj heredantoj Breĵnev, Kosigin kaj similaj kiel iliaj reprezentantoj, freneze oponas la mondan popolan revolucion, publike abolis la proletan diktaturon kaj praktikas plenampleksan restaŭron de kapitalismo en Sovetunio. Tio estas granda perfido al la Oktobra Revolucio. Tio estas granda perfido al marksism-leninismo. Tio estas granda perfido al la granda sovetunia popolo kaj la tutmondaj popoloj. Sekve, se la proletaro ne komplete frakasos la frenezan atakon de la modernaj reviziistoj, se ĝi ne firme defendas la vojon de la Oktobra Revolucio elhakitan de la granda Lenin, ne plu antaŭenmarŝas laŭ tiu vojo sub la novaj historiaj kondiĉoj kaj ne ĝisfunde solvas la problemon kiel depreni kaj firmigi ŝtatpotencon, ĝi ja ne povas akiri la finan venkon. Eĉ akirinte ŝtatpotencon, ĝi ankoraŭ povas perdi ĝin kaj, kiel la sovetunia popolo, esti regata de nova privilegia burĝa tavolo.

Estas feliĉe por ni, ke kamarado Maŭ Zedong plenamplekse heredis kaj disvolvis la teorion de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin pri proleta revolucio kaj proleta diktaturo, kaj li teorie kaj praktike jam levis tiun plej radikalan problemon pri monda proleta revolucio — la problemon pri la vojo de depreno kaj firmigo de ŝtatpotenco — al pli alta etapo. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ disvolvis marksism-leninismon ĝis tute nova kulmino. La ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong ja estas marksism-leninismo en la epoko, dum kiu imperiismo iras al kompleta disfalo kaj socialismo iras al venko tra la tuta mondo.

En la gvido de la granda batalo de la ĉina revolucio, Prezidanto Maŭ genie solvis serion da komplikaj problemoj pri depreno de ŝtatpotenco per armitaj fortoj. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo spertis la plej longan, plej intensan, plej malfacilan kaj plej komplikan popolan revolucian militon en la historio de la monda proleta revolucio kaj fondis la ruĝan regpotencon de la proleta diktaturo.

La vojo de depreno de ŝtatpotenco per armitaj fortoj fare de la ĉina popolo sub la gvido de Prezidanto Maŭ povas esti resumita jene: sub la gvido de la proleta partio, mobilizi la kamparanajn amasojn en la kamparo por konduki geriladon, disvolvi agraran revolucion, starigi kamparajn bazlokojn, sieĝi la urbojn per la kamparo kaj fine ilin kapti. Tio estas nova granda disvolvo de la vojo de la Oktobra Revolucio por depreno de ŝtatpotenco per armitaj fortoj.

Prezidanto Maŭ diris: **"Kutime, la venko de revolucio komenciĝas, disvolviĝas kaj realiĝas unue ĉe tiuj lokoj, kie la kontraŭrevoluciaj fortoj estas kompare malfortaj."** En la nuna tempo, pro tio ke ĉiuj reakciaj regantaj klasoj ĉiam severe superregas la centrajn urbojn, la revoluciaj partioj devas utiligi la malfortajn ĉenerojn kaj zonojn de la reakcia regado por plene mobilizi popolamasojn, konduki gerilan militon, krei firmajn bazlokojn, akumuli kaj hardi siajn fortojn, kaj en longdaŭra batalo paŝo-post-paŝe gajni kompletan venkon de la revolucio. Pro tio, sinapogi sur la popolamasoj, starigi revoluciajn bazlokojn en la kamparo, sieĝi la urbojn per la kamparo — ĉio ĉi tio estas nepre serioze konsiderenda kaj solvenda historia tasko por la nunaj subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj en la mondo dum sia batalo por depreni ŝtatpotencon per armitaj fortoj.

Kamarado Maŭ Zedong ne nur kreive disvolvis leninismon koncerne al la problemo pri proleta depreno de ŝtatpotenco, sed ankaŭ epokfare kaj kreive disvolvis leninismon koncerne al la plej grava problemo en la nuna tempo pri firmigo de proleta diktaturo kaj prevento de kapitalisma restaŭro.

Ekde la unua tago post la venko de la Oktobra Revolucio, Lenin jam donis grandan atenton al la firmigo de la nove naskita soveta regpotenco. Vidinte la akrecon kaj longdaŭrecon de la klasbatalo sub la proleta diktaturo, li montris: **"La transiro de kapitalismo al komunismo estas tuta historia epoko. Antaŭ ol tiu ĉi epoko finiĝos, ĉe la ekspluatantoj neeviteble restas la espero pri restaŭro kaj tiu espero ŝanĝiĝas en provojn de restaŭro."**

La kapitalisma restaŭro en Sovetunio kaj iuj aliaj socialismaj landoj estas plej granda leciono en la historio de la internacia komunisma movado en la lastaj 50 jaroj. Tiu rigora fakto okulfrape elmetis antaŭ la marksist-leninistojn de la tuta mondo la problemon kiel firmigi la proletan diktaturon kaj preventi kapitalisman restaŭron.

Estas kamarado Maŭ Zedong, la granda instruanto de la monda proletaro en la nuna tempo, kiu sub la novaj historiaj kondiĉoj sisteme resumis la historian sperton de la internacia proleta diktaturo, science analizis la kontraŭdirojn en socialisma socio, profunde montris la leĝon de klasbatalo en socialisma socio kaj elmetis tutan kompleton da teorio, linio, principoj, metodoj kaj politikoj por daŭrigi la revolucion sub la proleta diktaturo. Kun plej grandaj kuraĝo kaj saĝo, Prezidanto Maŭ sukcese gvidas la unuan grandan proletan kulturan revolucion en la historio. Tio ĉi estas ekstreme grava signo pri la disvolviĝo de marksism-leninismo en la etapon de la penso de Maŭ Zedong.

La venko de la granda proleta kultura revolucio malfermis en Ĉinio kun kvarono de la monda loĝantaro luman vojon por firmigi la proletan diktaturon kaj konduki la socialisman revolucion ĝis la fino. En la batalo kontraŭ imperiismo, la moderna revizi-ismo kaj la diverslandaj reakciuloj, la proletaro kaj revoluciaj popoloj de la tuta mondo firme subtenas nian grandan proletan kulturan revolucion, en kies venko ili trovis grandan inspiron, luman perspektivon kaj pli grandan fidon pri sia nepra venko.

La imperiistoj estrataj de Usono kaj iliaj lakeoj, la modernaj reviziistoj kaj diverslandaj reakciuloj rompas al si la cerbon por blasfemi kaj kalumnii nian grandan proletan kulturan revolucion, kaj tio ĝuste pruvas per negativa ekzemplo, kiom peza estas la bato donita de nia venko al la malamiko, kaj ke ili nur estas grego da vampiroj nepre pereigotaj.

La mondo estas moviĝanta antaŭen. Ankaŭ la teorio spegulanta la leĝojn de la mondo estas senĉese disvolviĝanta.

La penso de Maŭ Zedong estas la standardo de nia epoko.

Posedante la penson de Maŭ Zedong, la plej altnivelan marksism-leninismon en la nuna epoko, la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj certe povos akiri liberiĝon per siaj bataloj.

Posedante la penson de Maŭ Zedong, la plej altnivelan marksism-leninismon en la nuna epoko, la landoj, kiuj jam starigis la proletan diktaturon, certe povos preventi la kapitalisman restaŭron per siaj bataloj.

Posedante la penson de Maŭ Zedong, la plej altnivelan marksism-leninismon en la nuna epoko, la popoloj de tiuj landoj, kies ŝtatpotenco estas uzurpita de reviziistoj, povos renversi la reviziisman regadon kaj denove starigi la proletan diktaturon per siaj bataloj.

Kiam marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong estos kombiniĝintaj kun la revolucia praktiko de la diverslandaj popoloj, la tuta malnova mondo povos esti frakasita.

Kamaradoj, junaj ruĝaj gvardianoj kaj amikoj:

La 50 jaroj post la Oktobra Revolucio estis jaroj, dum kiuj socialismo intense luktis kontraŭ kapitalismo kaj marksism-leninismo intense luktis kontraŭ la moderna reviziismo, kaj ŝenĉese gajnis venkojn. La imperiisma sistemo jam delonge proksimiĝas al pereo kaj agonias. La reviziismo de Ĥruŝĉov estas produktaĵo de imperiisma politiko kaj spegulis la antaŭmortan barakton de imperiismo. Malgraŭ tio ke imperiismo kaj reviziismo ankoraŭ povos en komploto fari subfosadon kontraŭ ni, sed la reakcia kontraŭfluo neniam povos fariĝi ĉefa fluo. La historia dialektiko estas nerezistebla. Ekde nun, la proletaro kaj revoluciaj popoloj de la mondo pli alten levos la grandan ruĝan standardon de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong, kaj grandpaŝe marŝos antaŭen laŭ la vojo de la Oktobra Revolucio!

Ĉiuj, kiuj perfidas la Oktobran Revolucion, absolute ne povas eskapi de historia puno. Ĥruŝĉov jam delonge falis. Ankaŭ la Breĵnev-Kosigin-kliko, kiu ĉiam pli intense praktikas la perfidan politikon, ne daŭros longe. La sovetuniaj proletaro kaj laboranta popolo kun glora revolucia tradicio neniam forgesos la instruojn de la granda Lenin kaj Stalin. Ili certe leviĝos revolucii sub la standardo de leninismo, renversos la regadon de la reakcia reviziisma kliko kaj revenigos Sovetunion sur la socialisman vojon.

Kamaradoj, junaj ruĝaj gvardianoj kaj amikoj!

En nia granda patrolando regas bonega situacio. Gvidate de la plej nova instrukcio de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la granda proleta kultura revolucio triumfe disvolviĝas antaŭen.

Ni nepre pli alten levu la grandan standardon de la Oktobra Revolucio kaj la grandan standardon de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong kaj konduku la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino.

Ni nepre konstruu nian grandan patrolandon en pli potencan bazlokon de la monda revolucio.

Ni nepre pli forte subtenu la revolucian batalon de la proletaro de la mondo kaj la diverslandaj popoloj.

Ni nepre, kune kun la tutmondaj popoloj, konduku ĝis la fino la batalon kontraŭ imperiismo estrata de Usono kaj la moderna reviziismo kun la reviziisma perfidula kliko de Sovetunio kiel la centro.

Ni nepre pli energie studu kaj mastru la penson de Maŭ Zedong, kaj pli vaste dissemu ĝin tra la tuta mondo.

Tio ĉi estas glora tasko asignita de la historio al la popolo de nia lando, kaj ĝi estas internaciisma devo plenumenda de nia popolo.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ alvokas: **"Unuiĝu la tutmondaj marksist-leninistoj, unuiĝu la revoluciaj popoloj de la tuta mondo por faligi imperiismon, la modernan reviziismon kaj la diverslandajn reakciulojn. Certe konstruiĝos nova mondo sen imperiismo, kapitalismo kaj ekspluata sistemo."**

Ni brave batalu por realigi tiun grandan alvokon de Prezidanto Maŭ!

Vivu la granda Oktobra Socialisma Revolucio!

Vivu la granda proleta kultura revolucio!

La tutmondaj proletoj, unuiĝu!

La tutmondaj proletoj, unuiĝu kun la subprematai popoloj kaj subprematai nacioj!

Vivu la ĉiamvenkaj marksismo, leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong!

Vivu, vivu longe la granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ!

VAN ŜANHONG:

Kial Ridas la Diabloj?

EN la jaro 1917, la kanonado de la Oktobra Revolucio el la krozŝipo "Aŭroro" sonigis la funebran sonorilon de la malnova kapitalisma mondo kaj proklamis la naskiĝon de la nova mondo socialisma. Sed, kiam la subprematoj popoloj de la tuta mondo hurais kaj salutis al la Soveto de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj en Peterburgo, la burĝaj ĵurnaloj de Eŭropo kaj Ameriko furioze blasfemis la bolŝevistojn kiel "fanatikajn utopiistojn", "malvarmsangajn murdistojn" kaj "malamikojn de civilizacio". Ili ne nur fabrikis sensacian mensogon ke la malsataj urbanoj de Peterburgo konkure aĉetas homviandon, sed ankaŭ falsan dekreton pri komunigo de edzinoj praktikata de la soveta reĝimo. La kontraŭrevolucia fanatikeco igis la *Novjorkan Tempon* nereteneble aserti, ke "ne eblas daŭra ekzisto de la nova reĝimo" de Rusio. Poste, Usono, Britio, Japanio kaj aliaj, sume 14 landoj, lanĉis armitan atakon por strangoli la novnaskitan sovetan reĝimon en ĝia lulilo.

Kiom da malicaj blasfemoj, malnoblaj kalumnioj kaj frenezaj oponoj de la malamikoj trafis, de post tiam, la grandan socialisman revolucion, kiu malfermis novan eraon en la historio de la homaro, la grandan instruanton de tiu revolucio Lenin, lian heredanto Stalin, la gloran bolŝevisman partion kaj la heroan sovetunian popolon! Tamen, la mensogoj kaj la bajonetoj de la malamikoj ne nur ne sukcesis bari la venkan antaŭenmarŝon de la soveta ŝtato, sed ekscitis, male, la malamon de la sovetunia popolo al la malnova mondo kaj firmigis ĝian decidon en konstruado de nova mondo, tiel ke la sovetunia popolo plene elmontris sian heroan karakteron kiel tombofosisto de imperiismo kaj sturmanto de la internacia proletaro. Ĝuste en la blasfemoj de la imperiistoj kaj en la briloj de la glavoj de la kontraŭsovetuniaj krucistoj naskiĝis la amo, estimo kaj fido de la subprematoj popoloj de la tuta mondo al la unua socialisma lando.

Nun, en la sesdekaj jaroj de la dudeka jarcento, ankoraŭ resonas tra la tuta mondo la kanonaj sonoj de "Aŭroro". Tamen, tio, kion la nuna Moskvo ricevas de Vaŝingtono, Londono kaj la burĝaro de la tuta Okcidento, jam tute ne estas malicaj blasfemoj kaj kalumnioj, sed plaĉaj laŭdkantoj kaj varmaj aklamoj. Sovetunio, kiu iam tremigis la imperiistojn kaj ĉiujn reakciularojn, nun fariĝis "leĝobservema civitano en la granda monda familio" en la okuloj de Johnson kaj similaj.

Ĉu la imperiismaj diabloj fariĝis bonkoraj anĝeloj? Ne, nur la koruptiĝo kaj perfidaj agoj de la renegatoj venigis la ridon de la diabloj!

Ili estas propre de la sama amilio — Ĥruŝĉov kaj Kennedy en Vieno.



Post la forpaso de Stalin, la reviziisma kliko de Ĥruŝĉov uzurpis la regpotencon kaj puŝis Sovetunion sur la misvojon de plenampleksa restaŭro de kapitalismo. De tiam la brila socialisma ŝtato fariĝis nigra nesto de diabloj kaj amasiĝejo por feĉaĵoj. Sur la tero de la nova mondo ree stariĝis la ordo de la malnova mondo.

Pli abomeninda estas tio, ke en la "jubilea jaro" de 1967, en kiu la reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio bruegis por celebri la kvindekan datrevenon de la Oktobra Revolucio, ili faris pli da perfidajn agojn: Podgornej riverencis antaŭ la papo, Kosigin fariĝis nova "kamarado" en la Buckingham-palaco de Anglio kaj honora gasto de la usona prezidanto. La sango de la sudvjetnama popolo kaj la suvereneco de la arabaj landoj estis uzataj kiel kapitalo de Breĵnev kaj similaj por starigi la Sovetunian kaj Usonan Kontraŭrevolucian Kompanion. La japana imperiismo, kies spinon rompis siatempe la Ruĝa Armeo de Sovetunio, hodiaŭ tre facile akiris por si la rajton ekspluati siberiajn riĉfontojn. La faŝismaj ekzekutistoj, kiuj masakras la indoneziajn revoluciulojn, fariĝis kolegoj kaj intimuloj de la novaj aristokratoj en Kremlo....

Antaŭlonge la sovetunia reviziisma kliko jam malfermis pordon al la okcidenta vivmaniero, kaj nun ĝi pli rapide sin ĵetis en la sinon de la Okcidento. Filmoj el Hollywood okupas nun du trionojn de la ekranoj de Moskvo. La novmodaj vestoj el Parizo kaj Novjorko furoras inter la novaj burĝoj. Infanoj de elementaj lernejoj estas inokulataj per historioj el la Biblio, kaj la sinjoridoj de la privilegia tavolo freneziĝas pro pasio al ĵazo kaj balancalula danco. La hotelo "Soveto" sinokupas pri allogado de korpulentaj turistoj el la Okcidento, kaj la ĵurnaloj portanta elpendaĵon de "Lenina Standardo" energie diskonigas "novmodajn hararanĝojn en la mondo". La sovetuniaj reviziistaj korifeoj hurais kaj subtenis ekspozicion rekomendantan usonan vivmanieron, kaj londonaj ĵurnaloj kontente raportis: "Rusio ... komencis gustumi la dolĉon de la okcidenta vivo." Propagandistoj de Kremlo senĉese pruvadas la necesecon de "paca kunekzisto" kaj operaj aktoroj de Sovetunio kaj Usono konkorde kunludis *Romeo kaj Julieto*.

Se la okcidenta burĝaro antaŭe nomis Moskvon centro de la "Oriento", hodiaŭ Moskvo jam fariĝis filio de la Okcidento. Ĉu la brita burĝaro ne ĝojkriis nereteneble al Kosigin, kiam tiu vizitis Londonon en februaro de 1967? "Nia mondo ja estas ankaŭ via ... trinku por la estonteco via kaj nia!" Ĉu okcidentaj ĵurnalistoj ne diris ekster si pro ĝojo, post la interparolado de la ĉefoj de Sovetunio kaj Usono en Glassboro, ke Johnson "nun kompare komprenas kaj ŝatas la direktiliston de la sovetunia registaro"? Kiel ili povus akiri la "huraojn" de la imperiistoj, se la plenmano da renegatoj kiaj Ĥruŝĉov, Breĵnev kaj Kosigin ne servus kiel agentoj de la okcidenta burĝaro por entombigi la aferon de la Oktobra Revolucio, kiun la imperiistoj ĉiam intencis strangoli dum la pasinta duona jarcento?

Prezidanto Maŭ diris: **"En la mondo tute ne ekzistas senkaŭza amo nek senkaŭza malamo."**

Ĝuste el la amo kaj malamo de la imperiistoj, oni pli klare vidas la ŝanĝiĝon de Sovetunio en la nuno kaj la estinteco kaj la abomenindan vizaĝon de la sovetuniaj reviziistoj-renegatoj.

Neniu reakcia forto povus returni la radon de la historio; la sovetunia reviziisma kliko certe ricevos punon de la historio!

Jen perfidulo de la Oktobra Revolucio kaj hommanĝa demono kune trinkas vodkon.



Kiuj Psalmas por la Sovetia Reviziismo?

Por regali niajn legantojn, ĉisube ni elektis el la burĝa gazetaro kelkajn artikolojn kaj revuojn pri la nuna Sovetunio.

Prezidanto Maŭ diris: **"Ni devas subteni ĉion, kion la malamiko oponas, kaj oponi ĉion, kion la malamiko subtenas."** *Pensu, kiuj ekstreme malamis kaj insultis la bolŝevistojn de Sovetio en la pasinteco? Kaj nun, kiuj plenenergie superŝutis la sovetiajn reviziistojn per ĉiuj laŭdoj? Ni esperas, ke niaj legantoj ne preterlasu ankaŭ la antaŭan artikolon "Kial Ridas la Diabloj?" en tiu ĉi numero.*

—La Red.

"RUSIO ESTAS ĈIAM PLI PROFITEMA"

La artikolo publikigita sur la angla ĵurnalo *Yorkshire Post* je la 15-a de julio, 1967, diris:

Rusio estas ĉiam pli profitema. Akademiano Fedorenko diris al la Angla Administra Instituto en Londono, ke en 1966 la profito pliiĝis je 25% en 3,600 entreprenoj kiuj estas funkciigitaj laŭ la nova principo de ekonomia reformo. Vere prave! Se oni rimarkigis ke la 3,600 entreprenoj konsistigas nur malgrandan parton el la rusa industrio kaj ke la 25% da profito-pliiĝo estas tamen ne mirindaj, do tio eble signifas redukton de la efiko de ekonomia reformo. Sed grava estas la principo — la aserto ke nur mongajnaj entreprenoj estas utilaj kaj nur per incitado oni povas akiri profiton. Nun tio estas komence rekonita universale kaj efektivigata paŝon post paŝo en Rusio.

Anstataŭ politiko, ekonomio okupas superan kaj potencan pozicion en Rusio kaj aliaj komunismaj landoj de la orienta Eŭropo. Tiu fakto havas netakseble gravan signifon. La afero, nun komence kondukata, estas ja revolucio interne de komunismo. Kiel rezulto de tio, la naskiĝonta strukturo povas ankoraŭ nomi sin komunisma, sed ĝin neniam rekonos la principo difinita de komunismo por si mem depost la *Komunista Manifesto* de Marks.

"LA OKCIDENTAJ AFEROJ JAM ENPENETRIS EN DIVERSAJN FLANKOJN DE RUSIO"

La usona gazeto *Business Week* antaŭnelonge publikigis longan artikolon titolitan "Ivano Sekvas la Ekzemplojn de Okcidento". Jen estas ĝia ekstrakto:

La teksto de la plej furora nova kanto de Rusio estas malbonaŭgura, kia *La Atoma Epoko.* Sed la ario estas agrabla kaj malpeza kun vere latinamerikaj gusto kaj ritmo. Kontraŭe al la sinteno de la epoko de Stalin, en nunaj tagoj iuj okcidentaj aferoj jam "enpenetris" en diversajn flankojn de Rusio.

Novtipa gvidantaro anstataŭas la revoluciulojn, kiuj ĉiam gvidis Sovetion ekde la depreno de ŝtatpotenco fare de la bolŝevistoj antaŭ la duona jarcento. Diris Smolenskij, specialisto pri la problemoj de Sovetio en la Bostona Universitato: "Nun inĝenieroj estas ne nur teknikaj laborantoj, sed jam fariĝis regantoj." Prenante Breĵnev kaj Kosigin kiel ekzemplojn, li diris ke ili ambaŭ havas sciojn kaj spertojn en inĝeniera kaj teknika laboroj antaŭ ol ili okupiĝis pri politiko. Li diris, ke pri kio tiaj homoj zorgas plimulte, estas plibonigo de la vivo per pragmatismaj rimedoj.

Preskaŭ ĉiuj miris pri tio, ke la rusaj ekonomiistoj jam komencis paroli pri ia reformo kiu estus rigardata kiel herezo en la epoko de Stalin, ĉar ĝi povas ŝanĝi la sistemon praktikitan dum triona jarcento. Tiuj reformistoj ne prenis la produktan kvanton de simplaj konkretaj komercaĵoj kiel gravitan punkton, ili postulis ke oni juĝas fabrikon ĉefe laŭ ĝia kapablo de mongajno.

Iuj novaĵoj informis la okazaĵon kiu ne devas aperi sub la komunisma sistemo — senlaborecon. Pro sia soifa deziro pri redukto de produktokosto kaj ĉaso de profito, la administranto de la Moskva 15-a Kamiona Riparejo, kiun oni listigis en la unuan serion da entreprenoj por ekonomia reformo, eksigis preskaŭ 10% de laboristoj el sia riparejo.

Oni havas sufiĉan motivon opinii ke Rusio lernos pli multe de la okcidenta socio, inkluzive de homprema trafiko, supermerkato, inundo de reklamoj kaj eĉ liberaj entreprenoj starigitaj en hasteco kaj malgranda skalo.

Iuj specialistoj pri la problemoj de Sovetio antaŭdiris, ke Rusio plu marŝos grandpaŝe en sia imitado de la kapitalisma ekonomio. Ekzemple, Godman, la aŭtoritatulo de la Harvarda Universitato pri la sovetia merkata ekonomio, profetis ke Rusio finfine permesos restarigon de privataj entreprenoj surbaze de la malgranda skalo por havigi al si necesajn novajn eltrovojn.

Godman diris ankaŭ, ke iutage fremdlanda kapitalo povos esti denove bonvenigata en Rusio. Sovetio jam fondis kompaniojn en Belgio, Finlando kaj Maroko respektive kun tieaj intereso-grupoj por vendi varojn fabrikitajn ĉefe de Rusio.

REVIZIISMA SOVETIO ESTAS PLI OKCIDENTEŬROPIGITA OL IMAGITE

Japanaj burĝaj ĵurnalo *Asahi* kaj gazeto *Bungeishunju* antaŭnelonge publikigis du artikolojn respektive, en kiuj malkaŝiĝis iom da kapitalismaj fenomenoj de sovetia socio.

La ĵurnalo *Asahi* aperigis informaĵon de sia speciale sendita raportisto Kimura el Moskvo kun la titolo "Sovetio Marŝas Antaŭen sur la Vojo de Okcidenteŭropigo".

Kimura raportis ke je la unua impreso, post lia alveno al Moskvo, tiu ĉi ĉefurbo estas "pli liberaligita kaj okcidenteŭropigita ol imagite". Li diris ke en grandaj restoracioj de Moskvo gastoj "freneze tordis kaj ŝancelis siajn korpojn en akompano de torddanca muziko ludita de ĵazo", kaj "inter la svarmo de gedancantoj povas esti vidataj virinoj en vespera kostumo kun plene nuda dorso." "Kio furoras en Parizo, povas disvastiĝi ankaŭ en Moskvo nur en unu monato."

Kimura diris en la informaĵo: "Sur la strato de Kopenhago, oni povas vidi la flugfolion 'Jankioj, for el Vjetnamio!'. Sed, mi restis en Moskvo jam unu semajnon, tamen mi ne vidis en tiu ĉi urbo slogantabulon pri Vjetnamio."

La gazeto *Bungeishunju* aperigis artikolon de Hajaŝi Kentarou, profesoro de la Tokia Universitato, temantan pri la impreso dum lia vizito al Sovetio. Li diris, ke tie "subaĉeto plej efikas". La komerca intertraktado inter japanaj komercistoj kaj Sovetio estas prokrastita foje-refoje. La kialo estas, ke oni neniel povas vidi la administranton de la Sovetia Ŝtata Kompanio. Poste, ili prezentis al lia sekretariino donacaĵon, kiun ili portis el Japanio. Momente poste, "la sekretariino venis kaj diris ke la administranto tuj intervidiĝos kun vi." La verkinto diris, ke en Sovetio "la problemoj, neniel solveblaj per ordinaraj rimedoj, povas esti simple solvitaj, nur se oni afable traktis la superulojn. ... En analizo ĝis la fino, mono estas dependaĵo de amikeco."

Li diris krome: "Irante sur stratoj, tiel en la tago kiel en la nokto, ni fremdlandanoj povas renkonti spekulistojn el nigra merkato, kiuj alproksimiĝis ĉe ni, dirante: 'Vendu iom al mi.' Multaj homoj volas aĉeti usonajn dolarojn en la nigra merkato."

La reviziisma renegata kliko de Sovetio nun plenamplekse restaŭras kapitalismon en sia lando, metas ĉie la rublon sur la pozicion de komando kaj praktikas la profitan principon en ĉiuj sferoj de vivo enlande. Jen propaganda afiŝo kun la vortoj "Jen nia profito" eldonita de la Ŝtata Eldona Komitato de Sovetunio per kiu ili mem malkaŝas sin.



Bankroto de la Ĉina "Parlamenta

VEN GIEĜI

LA parlamenta sistemo ja ne estas io fremda por niaj okcidentaj legantoj.

Ja estas ne mirinde, ke la okcidentaj burĝaj politikistaĉoj kaj iliaj gazetaroj fabeligas la parlamentan sistemon — la ornamaĵon de la burĝa diktaturo — per bombastaj laŭdoj; sed estas strange ke en la nuna mondo, plenmano da personoj, kiuj sin nomas marksist-leninistoj kaj komunistoj, energie laŭdas la "parlamentan vojon". En aliaj landoj sin trovas tiaj homoj, nome la sovetia Ĥruŝĉov kaj la modernaj reviziistoj kun la sovetia gvidanta kliko kiel la centro; en Ĉinio la plej elstara reprezentanto estas la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon — la ĉina Ĥruŝĉov. Li ja estas de ĉiam la plej granda "parlamenta maniulo" de Ĉinio.

Ĉu la proletaro iru la vojon de armita batalo aŭ la "parlamentan vojon" por depreno de regpotenco, estas radikala malakordo inter marksism-leninismo kaj reviziismo. La tuta historio de la internacia komunisma movado montris al ni, ke ĉiuj reviziistoj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj, de ĉiam ja estas "parlamentaj maniuloj". Kompreneble la ĉina Ĥruŝĉov ne estas escepto.

Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito en 1945, la urĝa problemo kien Ĉinio iru sin prezentis antaŭ la ĉina popolo. **"Ĉu oni konstruu novdemokratian landon de la popolamasoj sub la gvido de la proletaro, aŭ oni konstruu duonkolonian, duonfeŭdan landon sub diktaturo de la grandbienuloj kaj grandburĝoj? Ĝi estos batalo tre komplika."** Tiu ekstreme akra batalo estis decida batalo inter la du sortoj kaj du perspektivoj de Ĉinio.

En la momento ĉe la fina venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam montris: **"Oni devas sobre rimarki, ke la danĝero de eksplodo de enlanda milito estas tre serioza, ĉar la politiko de Ĉiang Kajŝek estas jam difinita. La politiko de Ĉiang Kajŝek estas por enlanda milito."** Por defendi la fruktojn de venko, **"nia politiko estas lin oponi pinton kontraŭ pinto kaj batali pro ĉiu colo da tero".**

Ĝuste en tiu kriza momento, la ĉina Ĥruŝĉov eldonis sian "Raporton pri la Aktuala Situacio" je la 1-a de februaro 1946. Publike oponante la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, li elmetis la reakcian absurdan aserton pri "nova stadio de paco kaj demokratio" kaj senbride distrumpetis la "parlamentan vojon", dirante ke "la ĉefa batalformo de la ĉina revolucio jam ŝanĝiĝis en pacan kaj parlamentan, la batalo estas laŭleĝa batalo de amasoj kaj batalo parlamenta". Li diris krome: "La tuta laboro de la Partio devas esti turnotaj kaj ĉiuj niaj organizoj devas ŝanĝotaj por sin akomodi al nearmita batalo kiel la ĉefa batalformo, ... oni devas esti lerta fari propagandon, paroladojn kaj balotan movadon por ke la popolanoj ĉiuj elektu vin."

Unuvorte, iri la "vojon parlamentan".

Ĝuste kiam la ĉina Ĥruŝĉov profunde dronis en la bela sonĝo pri "parlamenta vojo", Ĉiang Kajŝek jam energie akrigadis sian glavon; samtempe kun la intertraktado li lanĉis batalojn kaj sendis, per usonaj aviadiloj kaj militŝipoj, grandan kvanton da armitaj fortoj al la fron-

Maniulo"

toj de la enlanda milito. Minacis tuja eksplodo de ĝenerala enlanda milito per ektuŝo. Per sia kontraŭrevolucia ago Ĉiang Kajŝek donis solidan vangfrapon al la ĉina Ĥruŝĉov, kiu fervore ludadis la melodion pri la "parlamenta vojo"!

En kapitalismaj landoj, sub la kondiĉo de la potenca ŝtatmaŝino tenata de la burĝaro, la deziro de paca transiro al socialismo tra "parlamenta vojo" estas nenio alia ol malica trompo. En la nuntempa mondo, estas nur doloriga leciono ke socialismaj landoj pace regresis en kapitalismajn landojn, sed ankoraŭ ne estas precedenco ke iu ajn kapitalisma lando pace transiris en socialisman.

Kompreneble, sub certaj kondiĉoj estas permesite al la proletaro utiligi parlamenton kiel podion por malkaŝi la absceson de la kapitalisma socio, eduki la popolamasojn kaj akumuli revoluciajn fortojn por sin prepari al armita depreno de regpotenco, sed neniam permesite ke oni anstataŭigu perfortan revolucion per parlamenta batalo.

Antaŭ longe, Lenin jam montris: **"Limigi la klasbatalon en la parlamenta batalo, aŭ rigardi la lastan kiel plej altan, decidan formon de batalo al kiu ĉiuj aliaj formoj de batalo estas subordigitaj, estas efektive dizerto al la burĝa flanko kontraŭ la proletaro."** La "laŭleĝa batalo de amasoj kaj la parlamenta batalo" distrumpetitaj de la ĉina Ĥruŝĉov ĝuste estas **"efektive dizerto al la burĝa flanko kontraŭ la proletaro".**

En kapitalismaj landoj la "parlamenta vojo" ne povas konduki al sukceso. En la duonfeŭda kaj duonkolonia Ĉinio, precipe post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la "parlamenta vojo" ankoraŭ pli signifas senelirejon. Antaŭ longe, Prezidanto Maŭ jam montris la jenon pri la malnova Ĉinio sub la regado de Ĉiang Kajŝek: **"Interne ĝi ne havas demokration sed estas sub premado de feŭdismo kaj ekstere ĝi ne havas nacian sendependecon sed estas sub premado de imperiismo. Pro tio, en Ĉinio ne estas utiligebla parlamento, nek laŭleĝa rajto por organizi laboristojn por striko. Tie ĉi, la tasko de la Komunista Partio fundamente ne estas trairi longdaŭran laŭleĝan batalon antaŭ ol lanĉi ribelon aŭ militon, ankaŭ ne unue okupi urbojn kaj poste depreni kamparon, sed iri malan vojon."**

Oponi armitan kontraŭrevolucion per armita revolucio estas la objektiva leĝo pri la venko de la ĉina revolucio kaj nepre trairenda vojo por la venko de la ĉina revolucio.

Kiam Kuomintango kaj Ĉiang Kajŝek akrigis la glavojn kaj purigis la pafilojn, volante fortranĉi niajn kapojn, se ni irus laŭ la "parlamenta vojo" distrumpetata de la ĉina Ĥruŝĉov kaj enirus urbojn nin apogante sur baloto, la rezulto neniam povus atingi "fundamentan sukceson" de la demokratia revolucio, neniam povus havi nian eniron en urbojn de Ĉiang Kajŝek, sed povus esti nur perdo de niaj urboj, senkapiĝo de milionoj da personoj kaj fiasko de la ĉina revolucio.

Samtempe kun sia distrumpetado de la "parlamenta vojo", la ĉina Ĥruŝĉov ankoraŭ malkaŝe oponis armitan batalon kaj pledis por fordoni niajn pafilojn al Kuomintango. Li eĉ publike postulis, ke "ankaŭ nia armeo devas esti transformita" kaj en nia armeo oni devas "forigi la organizojn de la (Komunista) Partio,... ĉesigi la rektajn gvidon kaj komandon de la (Komunista) Partio super nia armeo por ke ĝi estu unuigita sub la nacidefenda ministerio (de Kuomintango)". Praktiki tian "unuiĝon" ja estas nenio alia ol "unuigi" la Komunistan Partion en Kuomintangon.

Diru al ni: Kies la armeo fariĝus sen gvido de la Komunista Partio? Al kiuj celu ĝiaj pafiloj? Kiam la armeo estas ŝanĝinta sian naturon, ankaŭ la pafiloj ŝanĝos sian direkton. Sen armeo la revolucio povas atingi nenion, por ne paroli pri akiro de la revolucia venko.

En la plenaj dek jaroj de 1936 ĝis 1946, la ĉina Ĥruŝĉov neniam forgesis transdoni al Kuomintango la gvidantecon de nia armeo. Frue en majo 1936, kiam li respondecis pri la laboro de la Norda Buroo de la Partio en blanka regiono,

li pulikigis, en la plumnomo Taŭ Ŝanghing, artikolon "Letero pri la Komunista Partio" en reakcia burĝa gazeto. Tiu nigra artikolo pledis por transdoni al Kuomintango la popolajn armitajn fortojn kaj konstrui "unuigitan armeon kun samaj sistemo kaj organizo", en plena akordo kun la kapitulacismo de Vang Ming. Elektante la momenton de la plej akra klasbatalo, por urĝeme forvendi la popolajn armitajn fortojn, la ĉina Ĥruŝĉov ja celis flati la reakciularojn de Usono kaj Ĉiang Kajŝek kaj akiri bonan oficon en la registaro de Kuomintango. Li ja ne scias kio estas honto en la mondo.

Fordono de siaj pafiloj al la malamiko por gajni kelkajn sidlokojn en parlamento kaj akiri oficon de vicĉefministro, ministro aŭ simila ja ne estas nova kreaĵo de la ĉina Ĥruŝĉov, en la internacia komunisma movado. Post la Dua Mondmilito, Thorez de Francio, Togliatti de Italio kaj la Komunista Partio de Grekio ĉiuj fordonis siajn pafilojn. Kio rezultiĝis? La pafiloj fordoniĝis, la "laŭleĝa" pozicio aboliĝis, granda nombro da veraj revoluciuloj estis kruele murditaj kaj la sango de martiroj fariĝis vino en la glasoj de la malamikoj. Tio ja ne estas "profitodona" negoco! Evidente nur malkara aŭkcio de la revolucia afero, plej granda perfido al la popolaj interesoj.

Lenin iam diris: **"Burĝaro armita kontraŭ la proletaro estas unu el la plej grandaj, fundamentaj kaj gravaj faktoj de nuna kapitalisma socio. Kaj vizaĝe al tiu ĉi fakto, revoluciaj social-demokratoj estas urĝigataj 'postuli' 'malarmadon'! Tio ĉi egalas al kompleta forlaso de klasbatala vidpunkto, al forlaso de ĉia revolucia penso."** La ĉina Ĥruŝĉov ĝuste estas tia malnova oportunisto kiu forlasas ĉian revolucion.

Vizaĝe al tiu reviziisma kontraŭfluo en la internacia komunisma movado, tiam nur nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ firme repuŝis ĝin! Prezidanto Maŭ pinto kontraŭ pinto montris: **"La armitaj fortoj de la popolo, eĉ unu pafilo, unu kuglo, ĉiuj devas esti konservataj, nepre ne fordonitaj."** Tio estas resumo de la spertoj de la ĉina revolucio kaj la internacia komunisma movado, strategia penso kun ekstreme granda mondsignifo, saĝa politiko por oponi dekstran kapitulacismon kaj fundamenta garantio por akiri ĝisfundan venkon de la ĉina revolucio kaj la monda revolucio.

La kaŭzo, pro kio la ĉina Ĥruŝĉov tiel manie distrumpetis la "parlamentan vojon" kaj oponis armitan deprenon de regpotenco, kuŝas en tio, ke li timas revolucion, timas militon kaj timas perdi la kapon, sed aspiras nur komfortajn promocion kaj riĉiĝon. En malliberejo, tia fiulo sendube volontas kapitulaci al la malamiko kaj perfidi la revolucion, kaj antaŭ perforta revolucio teruriĝas kaj energie distrumpetas laŭleĝan batalon. Tia hontinda perfida aktivado de la ĉina Ĥruŝĉov tute akomodiĝis al la bezono de la usona imperiismo kaj la aŭtokrato kaj perfidulo de la popolo Ĉiang Kajŝek por solvi kaj ekstermi la Komunistan Partion, strangoli la proletan revolucion kaj konservi ilian reakcian regadon.

La praktiko de la ĉina revolucio komplete frakasis la belan sonĝon de la ĉina Ĥruŝĉov. La ĉina popolo ne aŭskultis liajn trompajn babilojn sed brave kondukis trijaran sangbatalon sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj finfine renversis la reakcian regadon de Kuomintango, gajnis la grandan venkon de la Liberiga Milito kaj fondis la Ĉinan Popolan Respublikon.

Post la fondo de la nova Ĉinio, la ĉina Ĥruŝĉov ankoraŭ ne forlasis sian malican ambicion, daŭre distrumpetis sian kapitulacisman teorion kaj vane klopodis disvastigi ĝin tra la tuta mondo. En 1962, li postulis ke la Komunista Partio de Birmo "enterigu siajn armilojn kaj transformu sian armeon en 'nacidefendan armeon' (reakciaj trupoj de Ne Vin), kunlaboru kun Ne Vin por kune konstrui socialismon". Dum sia vizito al Indonezio en aprilo 1963, li senhonte laŭdegis la "Nasakom"-an vojon, en privata interparolo li diraĉis ke por la Komunista Partio de Indonezio "estas bone havi pli multajn ministrojn en la indonezia registaro, ĉar tio ebligas akumuli pli multan sperton pri administrado de ŝtato".

Tio estas granda perfido de la ĉina Ĥruŝĉov al la ĉina popolo, al la azia popolo kaj al la popoloj de la mondo. La ĉina Ĥruŝĉov estas komuna malamiko de la ĉina popolo kaj la mondaj popoloj.

La ĉina "parlamenta maniulo" komplete bankrotis. Ankaŭ la grandaj kaj malgrandaj "parlamentaj maniuloj" de la mondo ĉie frapiĝas kontraŭ muro. La granda vero de Prezidanto Maŭ pri **"el la pafilo venas ŝtatpotenco"** estas ĉiam pli bone mastrata de la proletaro, subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj tra la tuta mondo. La arda flamo de armitaj bataloj forte brulas en Birmo, Hindio, Sudorienta Azio, Afriko, Latinameriko kaj aliaj regionoj. Ili estas kritikantaj la malnovan mondon per pafiloj, kaj tio estas plej forta kritiko ankaŭ kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov.



VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG

(en Esperanto)

358 P. 9 x 13 cm.

En poŝformato kun ruĝa plasta kovrilo prezo: £. 0-2-0

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, Ĉinio

Aĉetu ĉe niaj perantoj en via lando aŭ rekte ĉe ni —— Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio. Katalogo laŭ peto.

La Monda Popolo Varme Amas Prezidanton Maŭ

La Popoloj de Sovetunio kaj Orienta Eŭropo Varme Prikantas la Lenin de la Nuna Epoko

HODIAŬ, kiam baldaŭ venos la 50-a datreveno de la Oktobra Revolucio, la vastaj popolamasoj de Sovetunio kaj Orienta Eŭropo portas profundan karmemoron pri la granda Lenin kaj senliman amon kaj adoron al la heredanto de lia afero — Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la tutmonda revolucio en la nuna epoko! La vasta laboranta popolo de tiuj landoj metas sian esperon sur Prezidanton Maŭ. Per diversaj plejeblaj rimedoj ili ofte laŭdas Prezidanton Maŭ, la grandan gvidanton de la tutmonda revolucia popolo kaj esprimas sian senliman amon al Prezidanto Maŭ per elkoraj entuziasmaj vortoj.

PREZIDANTO MAŬ ESTAS LA INTIMA AMIKO DE SOVETIA POPOLO

En Sovetunio, la hejmlando de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, ofte spitante danĝeron de arestado fare de la faŝista aŭtoritato, la vasta revolucia popolo elkulturita de Lenin kaj Stalin ĉiurimede vizitas la ĉinajn kamaradojn loĝantajn en Sovetunio por peti la ruĝan trezoran libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj la insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ. Ĉiufoje, kiam ilia deziro estas kontentigita, ili emocie kaj admire esprimas sian senliman ardan amon al Prezidanto Maŭ, dirante: "Prezidanto Maŭ estas ankaŭ granda instruanto kaj gvidanto de la sovetia popolo." "Prezidanto Maŭ estas la intima amiko de la sovetia popolo, la granda persono de la tuta mondo kaj ĝuste nia Lenin."

La sovetia popolo forte indignas pro la kontraŭĉinaj kriaĉoj de la sovetia reviziisma kliko. Iu sovetiano, kiu venis de la hejmloko de Lenin, diris: "Ĉijaro estas la 50-a datreveno de la Oktobra Revolucio. Por ĉiam daŭros la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio!" Aŭskultinte la radioelsendon pri kontraŭĉinaj kriaĉoj de la sovetia reviziisma kliko, kelkaj mezaĝaj sovetianoj diris al ĉina kamarado: Pendigu la grandan perfidulon de la internacia komunisma movado! Pendigu Kosigin!" Kaj ili laŭte kriis: "Stalin, Maŭ Zedong!" "Bonega Maŭ Zedong!"

MAŬ ZEDONG, VI ESTAS NIAJ INSTRUANTO KAJ GVIDANTO

Antaŭvespere de la 18-a Nacia Festo de Ĉinio, por esprimi sian gratulon al la ĉina popolo kaj la senliman amon al Prezidanto Maŭ, iu bulgara virino brodis delikatan tablotukon kaj ĝin donis al ĉina kamarado ke li transdonu al Prezidanto Maŭ.

Tiu virino skribis en sia varma letero al Prezidanto Maŭ: "Kamarado Maŭ Zedong, ni varmege akceptas vian penson, nenia forto povas malhelpi nian varman amon al Vi, la granda gvidanto de la proletaro, ĉar kamarado Maŭ Zedong, Vi estas niaj instruanto kaj gvidanto." Ŝi skribis krome: "Ni, la bulgara popolo, tre admiras la grandegan sukceson akiritan en la granda proleta kultura revolucio sub via saĝa gvidado. Ni

firme kredas, ke la granda ĉina popolo akiru pli grandan venkon, kiu estos venko ankaŭ por ni." En la fino ŝi skribis: "Kamarado Maŭ Zedong, permesu al mi tutkore deziri al Vi, en la nomo de niaj kamaradoj kaj mi mem, longan vivon! longan longan vivon! Ni deziras, ke la frata ĉina popolo akiru pli grandan venkon!"

"MAŬ ZEDONG, LA LENIN DE LA NUNA EPOKO!"

En Ĉeĥoslovakio, multaj junuloj kuraĝe portas insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ sur sia brusto aŭ ĉapo tuttage, spite al persekuto. Iuj junuloj sentime ĝin portas plu malgraŭ la minacado de eksigo el la lernejo pro la portado. Foje oni malice demandis iun lernanton, ĉu li scias kiu estas la portreto sur la insigno. La lernanto fiere respondis: "Maŭ Zedong, la Lenin de la nuna epoko!"

MAŬ ZEDONG — LA PLEJ GRANDA MARKSIST-LENINISTO DE LA NUNA EPOKO

Iu juna laboristo de la Germana Demokratia Respubliko persiste lernas verkojn de Prezidanto Maŭ ĉiutage. Foje, li diris al ĉina kamarado: "Prezidanto Maŭ estas la gvidanto tiel de la ĉina popolo, kiel de la tutmonda revolucia popolo, kaj li estas la plej granda marksist-leninisto de la nuna epoko. Nun, por juĝi, ĉu oni estas vera komunisto aŭ ne, por juĝi, ĉu iu politika partio estas vere komunisma aŭ ne, la kriterio estas ĉu ili lernas kaj aplikas aŭ ne la penson de Maŭ Zedong." Tiu junulo diris krome: "Mi senlime adoras kaj varme amas Prezidanton Maŭ pro tio, ke li montris la direkton de batalado por la proletaj revoluciuloj de la tuta mondo." "Ja bonega estas la granda proleta kultura revolucio persone iniciatita de Prezidanto Maŭ. Oni nepre devas konduki grandan proletan kulturan revolucion post kiam la laborista klaso akiris la regpotencon; nur per granda proleta kultura revolucio oni povas firmigi la regpotencon de la laborista klaso, preventi la aperon de nova burĝaro kaj de novaj ekspluatantoj. La teorio de Prezidanto Maŭ pri la ekzistado de klasoj kaj klasbatalo en socialisma socio estas aparte ĝusta. La vortoj de Prezidanto Maŭ **'ribelo pravas'** estas absolute korektaj."

MAŬ ZEDONG — LA GRANDA STANDARDPORTISTO DE LA NUNA KOMUNISMA MOVADO

La rumana popolo varme amas ruĝajn brilantajn insignojn kun portreto de Prezidanto Maŭ, kaj multaj homoj sentas fieron pro siaj portataj insignoj kun portreto de Prezidanto Maŭ. Iu servistino de hotelo diris: "Mi sentas senliman honoron pro la insigno kun portreto de Prezidanto Maŭ, ĉar ĝi simbolas lumon kaj esperon." Ricevinte insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ, iu malriĉa maljuna kamparano diris kun emocio: "Portante la insignon, mi sentas, ke Prezidanto Maŭ estas ĉe mi, kaj mi deziras eternan sanon kaj longan vivon al li, nia amata!"

La rumana popolo ankaŭ tre amas la verkojn de Prezidanto Maŭ. Iu oficiro diris: "Mi havas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj ĝin lernas ĉiutage. Mi opinias, ke ĝi estas plena de vero kaj scienco, kaj konformas al nia nuna praktiko." Iu rumana amiko, loĝanta en la norda regiono, skribis leteron al ĉina kamarado post legado de verkoj de Prezidanto Maŭ: "Mi opinias, ke la linio de Prezidanto Maŭ estas ĝusta, kaj la penso

Antaŭ la montrofenestron restarigitan de la Ĉina Ambasadorejo en Sovetunio venas ĉiutage multaj sovetiaj popolanoj por rigardi la bildojn pri la granda proletara kultura revolucio en Ĉinio gvidata de Prezidanto Maŭ kaj pri aliaj aferoj.



de Maŭ Zedong estas la plej alta pinto de la nuntempa marksismo." Iu vendisto de la urbo Bukaresto diris: "Maŭ Zedong estas la gvidanto ne nur de la ĉina popolo, sed ankaŭ de la tutmonda popolo. Li estas la granda standardportisto de la nuna komunisma movado."



Nia Pekina Ensemblo de Kanto kaj Danco ricevas varman akcepton de la sovetia popolo dum sia prezentvojaĝo tie.

PREZIDANTO MAŬ — LA ESPERO DE LA TUTMONDA REVOLUCIO

En la akcepta kunveno por nia 18-a Nacia Festo, okazigita de la provizora aferŝarĝito de la Ĉina Ambasadorejo al Hungario, multaj hungaraj amikoj ĉeestis ĝin kun lokaj produktaĵoj kaj metiartaĵoj kun la surbroditaj vortoj "vivu la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Hungario" por esprimi sian gratulon al la ĉina popolo en la granda festtago. Multaj hungaraj amikoj varme laŭdis Prezidanton Maŭ kiel "la esperon de la tutmonda revolucio", kaj nomis lin la Lenin de la nuna epoko. Iu maljuna komunisto diris: "La tutmonda revolucio dependas de la penso de Maŭ Zedong." Alia amiko diris: "Nur sub la gvidado de Prezidanto Maŭ, la tutmonda popolo povas konduki la revolucion ĝis la fino." Ili tutkore deziris senlime longan vivon al Prezidanto Maŭ, kaj gratulis nin pro la granda venko de la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio.

ANTAŬENMARŜU LAŬ LA VOJO MONTRITA DE PREZIDANTO MAŬ

Por mastri la penson de Maŭ Zedong, multaj poloj lernas la verkojn de Prezidanto Maŭ. Iu maljuna komunisto diris: "Oni devas mastri la penson de Maŭ Zedong, se oni volas revolucii." Iu maljuna revoluciulino diris: "Mi amas Prezidanton Maŭ, ĉar li estas la plej granda revolucia gvidanto de la nuna epoko, la nuntempa Lenin, kaj la penso de Maŭ Zedong estas la plej forta ideologia armilo de la tutmonda popolo por konduki revolucian batalon en la nuna epoko."

La pola popolo alte laŭdas la grandan proletan kulturan revolucion iniciatitan kaj gvidatan persone de Prezidanto Maŭ. Ili opinias, ke "same gravan signifon havas la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio, gvidata de Prezidanto Maŭ kiel la Oktobra Revolucio de Rusio, gvidita de Lenin." Iu maljunulo diris: "Kiel la ĉina popolo, la tutmonda popolo, inkluzive de ni mem, devas sekvi Maŭ Zedong kaj antaŭenmarŝi laŭ la de li montrita vojo. Mi kredas, ke la linio de Maŭ Zedong certe venkos."

SENFINE LONGAN VIVON AL PREZIDANTO MAŬ!

Iutage en frua aŭtuno 1967, jugoslava senlabora geedza paro speciale vizitis sian ĉinan amikon kun "ĉiamverda herbo" en vazo. Ili diris al sia ĉina amiko: "Prezidanto Maŭ vere estas granda gvidanto, li aparte prizorgas la popolon kaj ĝuste instruas la popolon. Kiel feliĉa estas la popolo de Ĉinio." Adiaŭante al sia amiko, la edzino de la senlaborulo donis al li la "ĉiamverdan herbon" per siaj du manoj kaj diris: "Senfine longan vivon al Prezidanto Maŭ!"

Fotoekspozicio pri "La Granda Brilega Lampo de Socialismo en Eŭropo"

OKTOBRE de 1967, solene inaŭgurigis la fotoekspozicio "La Granda Brilega Lampo de Socialismo en Eŭropo" en Pekino, la centro de monda revolucio.

En Eŭropo, alte flirtas okulfrapa ruĝruĝa standardo de socialismo super Albanio, "lando de agloj", apud la maro Adriatiko. Kontraŭ la sieĝo de imperiismo, la moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj, la heroa "lando de agloj" impone staras kun firma nefleksebleco. Alte tenante la revolucian standardon de marksismleninismo, ĝi marŝas de venko al venko sur la vojo de socialismo. Ĝuste kiam la mondaj popoloj kun admiro kaj estimo prikantis ĝin per belaj vortoj, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris al la tuta mondo je la 25-a de decembro 1966: **"La heroa popola Albanio fariĝis granda brilega lampo de socialismo en Eŭropo."**

La fotoekspozicio "La Granda Brilega Lampo de Socialismo en Eŭropo" estas alia himno pri batala amikeco inter la du partioj, du landoj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio, ĉar ĝi malfermiĝis en la tempo kiam la ĉina popolo varme bonvenigis kun tondraj huraoj la Partian kaj Registaran Delegacion de Albanio estratan de kamarado Mehmet Shehu. La ekspozitaj bildoj fotitaj de la Delegacio de Ĉinaj Fotografistoj en Albanio, varme prikantas kamaradon Enver Hoxha, la grandan gvidanton de la albana popolo, la longe provitan Albanan Partion de Laboro kaj la revolucian spiriton de la albana popolo en ĝia batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo. La ekspozicio prezentas ankaŭ la movadon de la albana popolo "tenu pioĉon en unu mano kaj pafilon en la alia", la movadon de ideologia revoluciigo vigle disvolviĝantan en Albanio kaj iliajn fruktodonajn atingojn.

Enirinte la salonon de la ekspozicio, oni estas tuj impresitaj de la arda revolucia atmosfero, de la valora proleta revolucia spirito de la albana popolo kaj de ĝia senlima amo en la profunda koro al la glora Albana Partio de Laboro kaj granda marksist-leninisto kamarado Enver Hoxha. Jen la foto pri kamarado Enver Hoxha inter la amasoj: La gvidanto fidas kaj prizorgas la amasojn; ĉiuj ridantaj vizaĝoj direktiĝas renkonte al la gvidanto kaj ĉiuj ruĝaj koroj inklinas al la gvidanto. Tio montras la senliman fidelon de la popolo al la Partio kaj ĝia gvidanto. Tia emocia sceno diras al ni ke la gvidanteco de la marksismleninisma partio estas la plej fidinda garantio por la albana popolo en ĉiuj ĝiaj venkoj.

La Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro okazigita en vintro de 1966 estas kongreso kun granda historia signifo. Ĝi ellaboris la programon por efektivigi la revoluciigon de la tuta ŝtata vivo kaj socia vivo kaj puŝis la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de Albanio al nova stadio. Ĝia alvoko rapide disvastiĝis tra la urboj, vilaĝoj, ebenejoj kaj montregionoj de la tuta Albanio. Firme respondante al la partia alvoko, la tuta popolo de Albanio disvolvis la landskalan movadon por pluapaŝa revoluciigo de ideologio kaj levis novan altan tajdon de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Ĉie en Albanio aperis revoluciaj scenoj plenaj de vigleco.

La komandantoj kaj batalantoj de la Albana Popola Armeo, la bazŝtono de la proleta diktaturo,




La albanoj estas absorbitaj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.

firme tenas pafilojn en la manoj kaj defendas kun akra singardemo la landlimon de sia socialisma patrolando kune kun la popolamasoj. Por plifortigi la gvidantecon de la Partio en la armeo kaj elstarigi la proletan politikon, nun en diversaj trupoj de tiu armeo fondiĝis partiaj komitatoj, restariĝis la sistemo de politika komisaro en diversaj niveloj kaj aboliĝis la armeanaj rangoj, kaj tiel pluapaŝe intimiĝis la interrilato inter oficiroj kaj soldatoj. Iuj el la ekspozitaj bildoj montras ke la komandantoj kaj batalantoj studas la verkojn de kamarado Enver Hoxha kaj la partian historion, faras al si edukon de revolucia tradicio kaj senĉese plifortigas ideologi-politikan konstruadon por ke la Albana Popola Armeo estu nevenkebla armita forto de la laboranta popolo. La Popola Armeo estas la fiero de la albana popolo.

Kun alta socialisma konscio, la laborista klaso de Albanio ĉiam iras ĉe la plejfronto en socialisma batalado. En la movado de revoluciigo, ili elmetis multajn revoluciigajn proponojn, kaj superplenumis kaj antaŭplenumis la produktajn planojn en la socialisma konstruado. El la ekspozitaj bildoj oni povas vidi ke la heroaj albanaj laboristoj estas intense laborantaj per alta socialisma revolucia entuziasmo apud la ŝtalforĝaj fornegoj, ĉe la ŝpinteksmaŝinoj kaj en la bela haveno Durres, por konstrui sian socialisman patrolandon pli bela.

La albanaj kadroj aktive respondis la alvokojn de la Partio pri la alterno de kadroj en funkcioj kaj pri partopreno de kadroj en fiziklaboro. La oficiroj en la Popola Armeo, kadroj en institucioj, inĝenieroj en fabrikoj kaj literaturaj kaj artaj laborantoj ĉiuj konkure iris al montoj aŭ kamparo por fari sin ordinaraj laboruloj kaj teni sian naturon de revoluciuloj. Inter la bildoj de tiu parto oni povas vidi blankharan maljunan kuraciston inter la agrikulturaj kooperativanoj, kiu estis ĉefo de la Higiena Departemento de la Popola Armeo, kaj ankaŭ alternajn membrojn de la Centra Komitato de la Laboranta Junulara Ligo de Albanio, kiuj estas teknikistoj de cigared-fabriko en Shkoder kaj meminiciative iris al kooperativo en la



Albanaj milicanoj kaj limdefenda soldato ĉe la landlimo de Albanio

Laŭ la penso de Prezidanto Maŭ pri popola milito, la albanoj efektivigas armadon de la tuta popolo por esti pretaj ĉiumomente rebati invadantojn.



limregiono kun pioĉo en la mano por esti kooperativanoj.

La albanaj junuloj ĉiam staras ĉe la kapo de la vicaro de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Ili surgluis la unuan *dazibaŭ*-on (fulmo-gazeton) en la movado "forte ekpafu kontraŭ reakciaj malnovaj kutimoj kaj moroj". Utiligante la *dazibaŭ*-on, junaj laboristoj intense batalis kontraŭ burokratismo kaj malnovaj kutimoj kaj moroj. La fotoj montras jenajn scenojn: la laborejoj de fabrikoj estas plenaj de revoluciaj fulmo-gazetoj, kaj la laboristoj are legas ilin, laŭdas kaj huraas ilin. Ankaŭ la junaj studentoj kaj lernantoj iris al kamparo kun pioĉo sur la ŝultro aŭ al fabrikoj kun instrumento en la mano. Ili strikte interligiĝis kun la amasoj, kombinis siajn lernitajn sciojn kun la praktiko kaj decidis hardi sin en fidindajn ruĝajn daŭrigantojn de revolucio.

La agrikulturaj kooperativanoj kondukis la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon kun ardega revolucia entuziasmo. En la seninterrompaj montĉenoj, post forportado de ŝtonegoj per siaj fortikaj manoj la kooperativanoj ekspluatis vicojn super vicoj da ŝtuparaj kampoj; sur la pasinttempaj marĉoj bone kreskis plantajoj, jen la senlima maro da tritikkampoj rulis ondojn da oro. En la pasinteco, Albanio estis konsiderata kiel la plej malriĉa lando en Eŭropo, sed nun ĝi jam fariĝis socialisma lando kun moderna industrio kaj kolektiva agrikulturo.

Multaj el la ekspozitaj fotoj prezentas la senliman amon de la albana popolo al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la ruĝa suno en la koro de la revoluciaj popoloj de la mondo. La albana popolo urĝe aspiras studi la penson de Maŭ Zedong, la plej potencan armilon kontraŭ imperiismo kaj reviziismo. La fotoj montras ke en urboj, montregionoj, armeaj unuoj kaj minejoj oni kolektiĝas kaj atenteme studas la verkojn de Prezidanto Maŭ kroĉante la orbrilajn insignojn kun portreto de Prezidanto Maŭ sur la brustoj.

En la salono de la ekspozicio pendas slogano el vortoj de la granda marksist-leninisto kamarado Enver Hoxha: **"Albanio naskiĝis en revolucio kaj akiris la venkon de socialismo en revolucio, kaj ĝi iros al komunismo ankaŭ en revolucio."** Ia ĉina popolo firme kredas, ke la heroa Albanio, la ruĝa socialisma standardo hisita super Eŭropo, certe fariĝos pli bela kaj ĉiam alte flirtos en la bataloj por socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj por oponi kontraŭ imperiismo kaj reviziismo. En sia militiro al komunismo, la granda brilega lampo de socialismo en Eŭropo certe disradios pli helan lumon al la tuta Eŭropo kaj la tuta mondo.



Uzante la novan revolucian armilon dazibaŭo (albane: "Fulmogazeto"), la albana popolo akre batalas kontraŭ malnovaj postiĝintaj moroj kaj kutimoj.



La nova batalantino de la Ruĝa Virina Taĉmento Vu Kinghua (ludata de Zoica Haxho) kaj ŝia rotestrino en la kampadejo.

KJUN GIE*:

Floras Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio

"'Intima amiko trans maro proksimas ja kvazaŭ najbaro'. Kvankam Ĉinio kaj Albanio estas apartigitaj de miloj da montoj kaj dekmiloj da riveroj, tamen niaj koroj estas interligitaj."

En la neordinare feliĉaj tagoj, kiam nia tuta lando dronis en ĝoja celebrado de la 18-a datreveno de nacifesto, al Pekino venis kun respekto al la granda proleta kultura revolucio de nia lando, la albana amatora ensemblo de Tirano "Pioĉo en Unu Mano, Pafilo en la Alia" kiu alportis kun si la varmajn salutojn kaj revolucian amikecon de la heroa albana popolo.

Dum sia vizito en Ĉinio, la albana ensemblo prezentis parton el la dua sceno de la ĉina moderna revolucia baledo *Ruĝa Virina Taĉmento* kaj ricevis varman bonvenigon de la ĉina popolo. La albana popolo amas la modernan revolucian operon. Antaŭ pli ol unu jaro, la albanaj literaturaj kaj artaj laborantoj jam surscenigis la ĉinan baledon *Ruĝa Virina Taĉmento* en Tirano. Tiam la granda gvidanto de la albana popolo Enver Hoxha spektis la prezentadon kaj persone akceptis la aktorojn kuraĝigante ilin iri la vojon de revoluciigo. En la vizitanta amatora ensemblo sin trovis aktorino Zoica Haxho, kiu ludis rolon de Vu Kinghua el la baledo *Ruĝa Virina Taĉmento* kaj aktoro Agron Alia kiu ludis rolon de bienula lakeo Laŭsi. Post atingo de Pekino, ambaŭ ili fervore proponis prezentadi la modernan revolucian baledon kune kun ĉinaj aktoroj. Kamaradino Z. Haxho diris: Mi nepre bone provludos kaj sukcese ludos la revolucian modernan baledon kune kun la ĉinaj kamaradoj, kaj pere de la prezentado esprimos nian amon al la ĉina popolo kaj subtenon al la ĉina granda proletara kultura revolucio.

Du kamaradoj el nia Baleda Trupo de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj iam en Tirano helpis albanajn aktorojn provludi la baledon *Ruĝa Virina Taĉmento*, kaj en la tagoj de kunlaborado formiĝis inter ili profunda batalamikeco. Tiuj du ĉinaj kamaradoj tuj vizitis kamaradojn Zoica Haxho kaj Agron Alia apenaŭ post ilia atingo de Pekino. Vidinte la ĉinajn kamaradojn, kamaradino Zoica Haxho diris al ili kun emocio, ke ili ricevis po unu ore brilantan ekzempleron de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la albana lingvo kaj multaj kamaradoj ame ĝin studadas ĝis profunda nokto.

Komenciĝis la kuna provludo en halo brila kaj hela, la ĉinaj kaj albanaj aktoroj rapide staris en vicoj, kaj antaŭ ĉio ili legis vortojn de Prezidanto Maŭ prenante la plej altan instrukcion kiel direktan penson en sia provludado.

En la provludo la albanaj kamaradoj de la komenco ĝis la fino montris sin seriozaj kaj konsciencaj. Ja estas multe da malfaciloj por fremdlandano por bone



Sub la standardo de kamarado Maŭ Zedong kaj kamarado Enver Hoxha, la revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj de Ĉinio kaj Albanio ĥore kantas La Internacion *kun ruĝa libreto* Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong *en la mano.*

prezenti la ĉinan nacian stilon. Sed kun arda revolucia entuziasmo kaj profunda klasa amo al la moderna revolucia opero kaj la herooj la albanaj kamaradoj sencese faris ekzercojn kune kun ĉinaj kamaradoj, venkante ĉiajn malfacilojn kaj timante nek penon nek lacon.

Dum provludo kamaradino Zoica Haxho falis kaj vundiĝis je la genuo, sed ŝi stariĝis kaj tuj sin ĵetis en la ekzercon. Kiam ŝi vidis, ke iu ĉina aktoro bone faras soldatan salutgeston, ŝi modeste lernis de tiu.

Kamarado Agron Alia tre atente esploris la rolon luditan de li mem kaj ofte ripetadis dancmoviĝojn en libera tempo kaj studis la sentimenton de Laŭsi en la baledo kune kun la ĉina kamarado kiu ludis la saman rolon.

Estis tre penige por tiuj du albanaj aktoroj, ĉar ili devis ne nur provludi kune kun ni, sed ankaŭ agi kiel helpaj instruantoj al la tirana amatora ensemblo kaj partopreni prezentadon vespere. Kamaradino Zoica Haxho ludis la rolon de Vu Kinghua, kio estas laboro laciga. Rimarkinte, ke ŝi tro laciĝis, la ĉinaj direktantoj konsilis, ke ŝi dancu ne tiel plenforte, ĉar bone harmonigi la dancmoviĝojn kun la muziko jam estas sufiĉe, ŝi tamen restis same rigora al si mem en la provludado. Se iuj partoj ne bone sukcesis, ŝi meminiciatite postulis ripeton de unu, du, tri fojoj ĝis atingo de kontentiga rezulto. Dank' al ŝia diligenta lernado kaj pena ekzercado la provludo iris glate, precipe en la danco de luktado inter Vu Kinghua kaj la reakciaj familigardantoj en la kvina sceno ŝi tre eminente ludis kaj ĝuis varmajn aplaŭdojn en la provludejo. Profunde kortuŝis nin ilia diligenteco kaj modesteco en lernado kaj ilia sencesa strebado al pli alta nivelo de sia arto.

Post dekkelktaga provludo, la ĉinaj kaj albanaj aktoroj sukcese okazigis la kunan prezentadon. Post alivestiĝo de la albanaj aktoroj sub la helpo de ĉina ŝminkisto ĉio prepara estis en ordo. Zoica Haxho kaj Agron Alia estis en eksterordinara emociiĝo. Kvankam ili estas aktoroj kun riĉa sceneja sperto, tamen tio estis la unua fojo por ili partopreni tian neordinaran prezentadon. "Estu trankvilaj" — ilin kuraĝigis la ĉinaj aktoroj-kamaradoj. Paroj da zorgeme afablaj okuloj kaj vortoj post vortoj de varma kuraĝigo pli certigis al la albanaj kamaradoj la konvinkon pri sukceso.

La prezentado komenciĝis, kaj la muziko kondukis la homojn en la malnovan socion, en kiu la laboranta popolo suferis subpremadon kaj turmentojn. Vu Kinghua estas ligita kun la manoj post la dorso en la akva karcero de la bienulaĉo Suda Tirano. Zoica Haxho jam plene dronis en sian rolon de ĉina virino kun granda sufero kaj profunda malamo. Iam ŝi rakontis al ni, ke ŝi tre ŝatas ludi la rolon de Vu Kinghua. Ĉar ŝia patrino mem viktimiĝis en malliberejo de la albana reakciularo, kaj ŝi mem estis liberigita el la malliberejo je la sepjara aĝo. Malsamaj estas la nacioj, tamen samaj la klasa subpremo kaj klasa rezistemo. Kamaradino Zoica Haxho havas travivaĵon similan al tiu de Vu Kinghua kaj la klasan senton dividi kun ŝi la saman sorton, kaj tio helpis ŝin sukcese modli la heroan figuron de Vu Kinghua.

Por prezenti la kruelan sed malfortecan naturon de la reakciularo kamarado Agron Alia pene laboris super si kaj finfine sukcese bildigis la negativan figuron de la bienula lakeo Laŭsi, vekante per tio senkomparan malamon en la spektantoj al la bienularo.

Post la kulisoj, ĉinaj kamaradoj forviŝis ŝviton por la albanaj kamaradoj tuj kiam ili revenis de la scenejo kaj senerare enmanigis al ili necesajn rekvizitojn. Sur la scenejo ĉiuj ĉinaj aktoroj bone kunlaboris kun la albanaj aktoroj. Ĉio ĉi tio pli sukcesigis la prezentadon de la albanaj aktoroj.

Finiĝis la prezentado. Ĉiuj spektatoroj longe aplaŭdis la bonegan prezentadon. Tondris ĝojkrioj terskuaj: "Vivu Prezidanto Maŭ! Longe vivu!" "Vivu Enver Hoxha! Longe vivu!" "Vivu la amikeco inter Ĉinio kaj Albanio! Vivu longe!"

Floru pli bele la amikeco inter Ĉinio kaj Albanio!

Eterne daŭru la batalamikeco inter Ĉinio kaj Albanio!

**membro de la Ĉina Baleda Trupo de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj*

Sceno de la opero Ruĝa Virina Taĉmento *kune ludata de ĉinaj kaj albanaj revoluciaj gebaledistoj. Vu Kinghua, filino de malriĉ-kamparano (ludata de albana artistino Zoica Haxho), indigne kontraŭstaras la bienulon Suda Tirano.*



Vu Kinghua (ludata de Zoica Haxho) forkuris el la kaĝo de la tirano kaj decideme aliĝas al la Virina Taĉmento.



Jen Venas Grandioza la Aŭroro

ALEX CACI (Albanio)

Jen venas grandioza la aŭroro.
Kaj plijuniĝas mi kun ĉiu horo.
Serĉadas nun la homa mondo
La veran vojon al l' estonto.
Kun firmaj pugnoj marŝas la homaro...
La ruĝa flag' de l' proletaro
Flirtadas super Albanio kaj Ĉinio.
Ho, kiel brile ruĝas la standardo.
Pro ĝi ruĝiĝas nia kor' kaj penso.
La ruĝa flag' alvokas nin en vento.
Antaŭen marŝas ni kun energio...
Ho, Maŭ Zedong kaj Enver Hoxha,
Komunajn vojon, lingvon havas niaj du partioj.
Simile al du fortaj agloj aere grandiozaj
Fiere flugas ili alte en l' aero.
Impetu ni antaŭen kiel fluganta ĉevalo.
Montpinton jen ascendas vasta la armeo,
Por realigi novan mondon — nian belan idealon
Jen flamas arda fajro en la koroj niaj.
Forbrulos en ĝi renegatoj, Kapital' kaj fiinsektoj ĉiaj...
Manpremu forte, Albanio kaj Ĉinio,
Fidelaj ĉiam restu ni al la misio,
Ke nia granda ponto ligu l' tutan mondon.
Ho, kiom bela kaj impona estas nia ponto!
Ĝin vidu kaj ektremu la vermaĉoj en kaŝtruo.
Ni estas proletaro.
Jam sonas la funebra sonorilo via, sangsoifa Kapitalo.
Neniam apartiĝos Albanio kaj Ĉinio.
Ilia amikec' formita el triumfgirlando
Ampleksas ja vastegon sen neniu rando.
Nur se ni kunligiĝas nerompeble,
Ni povos l' oceanojn interligi;
Nur se ni kunligiĝas nerompeble.
Ni povos en la tuta mondo ruĝajn flagojn disstarigi.



La ruĝa suno lumigas la stepon de Interna Mongolio. Naskiĝis la Revolucia Komitato de la Aŭtonoma Regiono.

La Ruĝa Suno Lumigas la Stepon de Interna Mongolio

ĴEN GJUN

LA l-an de novembro 1967, el la vasta stepo de Interna Mongolio, la norda limregiono kaj kontraŭreviziisma antaŭposteno de nia lando, venis ekstreme ĝojiga informo: Naskiĝis la Revolucia Komitato de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

I

La fondiĝo de la Revolucia Komitato de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio anoncis la kompletan disfalon de la plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj kaj naciaj separatistoj en Interna Mongolio, forhakis la nigran manon de la ĉina Ĥruŝĉov — ilia postkulisa mastro, etenditan en Internan Mongolion, kaj donis solidan baton rekte al la renversaj intrigoj de imperiismo kaj la moderna reviziismo de Sovetio kaj Mongolio. Ĝi havas grandegan signifon por sekurigi la landlimon kaj proletan diktaturon de nia lando, fortigi la unuiĝon de niaj diversaj naciecoj kaj disvolvi nian socialisman konstruadon.



Diversnaciecaj popolanoj aklamas la fondiĝon de la Revolucia Komitato de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

Tio estas decida venko atingita en Interna Mongolio de la granda proleta kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ! Tio estas granda venko de la proleta revolucia linio reprezentata de Prezidanto Maŭ kaj de lia senlime brila penso!

La brilo de la granda penso de Maŭ Zedong lumigas la stepon de Interna Mongolio. Ŝanĝiĝis la mondo, des pli la loĝantoj, kaj novan fizionomion ricevis la bela patrolando. De la norda piedo de la Granda Hing-an-montaro ĝis Helan-montaro, ĉie estas plena prospero.

En tiu ĉi granda animskua lukto, la grandnombraj proletaj revoluciuloj de Interna Mongolio estis senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj lia proleta revolucia linio kaj eltenis la rigoran provadon, starante firme kontraŭ nigraj ventoj kaj furiozaj ondoj. Ili senĉese pliigis sian proletan partian spiriton kaj supervenkis la etburĝan sektismon kaj kreis favorajn kondiĉojn por efektivigo de la granda revolucia unuiĝo kaj revolucia triflanka kombiniĝo. Ili faris grandan kontribuon al la granda proleta kultura revolucio en Interna Mongolio. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, PLA garnizonanta en Interna Mongolio elpaŝis en kriza momento por decideme kaj aktive subteni la proletajn revoluciulojn laŭ la instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ili unuiĝis, batalis kaj venke kondukis kune kun la lastaj la batalon kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en Interna Mongolio. La venko de la proletaj revoluciuloj de Interna Mongolio en batalo por transpreno de potenco plie pruvas: Ne gravas, kiel ajn akra kaj komplika estas la batalo, kaj kiel grandaj estas la malhelpoj kaj ĝenoj, oni ĉiam venkas, se oni firme efektivigas la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ, sekvas liajn grandajn strategiajn dispoziciojn kaj plene starigas la absolutan aŭtoritatecon de la penso de Maŭ Zedong.

La ĝojiga novaĵo disvastiĝis tra la tuta lando, kaj la proletaj revoluciuloj en diversaj lokoj amase sendis siajn plej varmajn gratulojn al la 13,000,000 diversnaciecaj popolanoj de Interna Mongolio.

II

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"La unuiĝo de la lando, la solidareco de la popolo kaj la solidareco de niaj diversaj nacioj — jen estas la fundamentaj garantioj por la nepra triumfo de nia afero."**



Proletaraj revoluciuloj de Interna Mongolio paradas rajdante.

Prezidanto Maŭ diris ankaŭ: **"En analizo ĝis la fino, nacia batalo estas problemo de klasbatalo."**

La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en Interna Mongolio, kiuj enŝteliĝis en la Partion, estas agentoj de feŭdaj princoj kaj aristokratoj, brutarmastroj, bienuloj kaj burĝoj. De longa tempo ili oponis kontraŭ la ruĝa flago flirtigante ruĝan flagon, freneze praktikis la reakcian linion reviziismon kaj nacisep aratismon, kovris la klasajn kontraŭdirojn, venenigis la rilatojn kaj fabrikis malakordojn inter naciecoj kaj subfosis la unuecon de la patrolando. Ilia krima celo estis restarigi kapitalismon konforme al la bezonoj de imperiismo kaj moderna reviziismo.

La spertoj de la batalo inter du klasoj, du vojoj kaj du linioj en Interna Mongolio ankoraŭfoje diras al ni, ke la granda teorio kaj serio da principoj kaj politikoj de Prezidanto Maŭ pri nacia problemo estas la sola ĝusta orientilo por trakti nacian problemon kaj fidinda garantio por firmigi la unuecon de la patrolando kaj plifortigi la nacian unuiĝon. En nia granda socialisma patrolando, por ĉiu ajn nacieco, la komuna ideologia bazo estas marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong, kaj la komuna vojo estas la vojo de socialismo kaj komunismo. Ni nepre devas ĝuste observi kaj trakti la nacian problemon laŭ la vidpunkto de klaso kaj klasbatalo, kiun instruis al ni Prezidanto Maŭ, kaj neniam forgesi klasbatalon, proletan diktaturon, elstarigon de politiko kaj altan tenadon de la granda ruĝa standardo de la penso de Maŭ Zedong.

III

La revoluciaj fortoj ĉiam antaŭenmarŝas, kaj la reakciaj fortoj nepre fiaskos. La granda proleta kultura revolucio en Interna Mongolio traspertis zigzagon kaj retroirojn, kaj ĝuste tio komplete senmaskigis la klasajn malamikojn kaj multe hardis la revoluciajn amasojn kaj revoluciajn kadrojn. Nun la ruĝa suno lumigas la stepon de Interna Mongolio, kaj la revolucia situacio tie estas senprecedence bonega kaj fariĝos ĉiam pli bona.

Ĝoje celebrante la grandan venkon, la popolo de Interna Mongolio ne forgesis, ke la en- kaj eksterlandaj malamikoj absolute ne akceptos volonte sian malvenkon. Ili nepre faros ripetade subfosadon. La armeo kaj popolo de Interna Mongolio, kiuj troviĝas en kontraŭreviziisma antaŭposteno, nun plivigligas sian gardemon, plifortigas la koncepton pri la ekzisto de malamiko, ĝustatempe malkovras kaj frakasas ĉiujn intrigojn de la klasa malamiko, solidigas la ruĝan proletan reĝimon kaj sekurigas landlimon de la patrolando. Ili decideme efektivigas la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ pliprofunde disvolvi la revolucian amasan kritikadon por komplete kaj ĝisfunde faligi kaj senkreditigi la ĉinan Ĥruŝĉov kaj liajn agentojn en Interna Mongolio kaj plene elimini ilian venenan influon kun **"kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon"** kiel ĉefĉenero, por starigi la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong en la tuta stepo de Interna Mongolio kaj por fari Internan Mongolion ruĝe brilanta, granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong.

Ĉiam Konservu la Naturan Karakteron de Proletaj

REVOLUCIA KOMITATO DE LA KINGDAŬ-A

DUM la ŝtormo de la "Januara Revolucio" de Ŝanhajo envolvis la tutan landon, niaj proletaj revoluciuloj de la Kingdaŭ-a Rektifila Fabriko transprenis la potencon de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de la fabriko kaj starigis tutan novan organon de potenco — revolucian komitaton. Kian vojon iru la proletaj revoluciuloj post la alpreno de la potenco? Tiun seriozan demandon metis antaŭ ni la historia procezo. La respondo de ni proletaj revoluciuloj estis: Ni sekvos Prezidanton Maŭ kaj iros la grandan revoluciecan vojon ĉiam konservante la naturan karakteron de la proletaj revoluciuloj.

FARI REVOLUCION EN LABORKOSTUMO

Ĉu la membroj de la revolucia komitato de la fabriko devas forlasi sian produktan laboron post la kapto de la potenco? Tiu demando leviĝis jam longe antaŭ la transpreno de la potenco. Nun disvolviĝis granda amasa diskuto. Komence iuj kamaradoj proponis, ke ĉiuj revoluciaj organizoj elektu kelkiujn por mastrumi la fabrikon. Tiuj povos forlasi sian produktan laboron, kaj iliajn produktajn taskojn prenos sur sin anstataŭe la ceteraj kamaradoj. Sed la plejparto da kamaradoj ne konsentis tiun opinion. En diskutkunsido, la maljuna laboristo Giang Baŭguj diris serioze: "Antaŭ ol pasos kelkaj mallongaj jaroj, ree aperos reviziistoj inter ni, se oni sidos en kabineto, apartigite de laborado kaj la amaso."

La diro de la maljuna laboristo profunde pensigis ĉiujn. Kun tiu demando en la kapo, ni studis verkojn de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ ĵskribis: **"Estas necese persisti pri la sistemo de la partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro. La kadroj de niaj partio kaj ŝtato estas ordinaraj laboruloj kaj ne grandsinjoroj rajdantaj sur la nuko de la popolo. Partoprenante kolektivan produktan laboron, ili tenas plej vastan, konstantan kaj intiman ligon kun la laboranta popolo. Tio estas granda afero de fundamenta graveco por socialisma sistemo; ĝi helpas venki burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismon."** La brila penso de Prezidanto Maŭ lumigis por ni la vojon kaj klare komprenigis al ni, ke ankoraŭ ekzistas la batalo de restaŭro kaj kontraŭrestaŭro inter la burĝaro kaj la proletaro, kaj ke post nelonge, la nova potenco ŝanĝos sian naturon kaj vole-nevole glitos en la marĉon de reviziismo, se oni apartiĝos de laborado, post veno al la potenco.

La diskuto okazigita en la ŝlosila momento ludis gravan rolon en la difino de nia vojo irota post la enmanigo de la potenco. El tio ni profunde ekkomprenis, ke **"tutkore kaj tutanime servi al la popolo kaj neniam disiĝi de la amasoj"** estas la ŝlosilo, kiu decidas, ĉu la revolucio povos venki kaj la venko povos solidiĝi aŭ ne. Ni decidis sekvi la instruon de Prezidanto Maŭ **"esti kaj 'ŝtatoficistoj' kaj popolanoj"** kaj plenumi nian revolucian devon en laborkostumo. Ekde la tenado de la potenco, ni transformis la antaŭajn kvar administrajn sekciojn en tri servogrupojn. Ĉiuj membroj de la revolucia komitato persistas ĉe sia antaŭa produkta aŭ labora posteno kaj laboras kiel antaŭe dum la produkta tempo. La revolucia komitato kunsidas kaj faras siajn ĉiutagajn laborojn post la labortempo. Pro tio ke la komitatanoj ordinare vivas kaj laboras kune kun la amaso, ili povas ĝustatempe ekscii la opiniojn kaj postulojn de la amaso kaj ankaŭ ĝustatempe trovi la problemojn aperantajn en la produktado. Tiel, ili povas rapide solvi la problemojn kaj garantii la sukcesan plenumon de la taskoj de revolucio kaj produkto.

ĈIAM DIVIDI ĜOJON KAJ MALFACILON KUN LA REVOLUCIA AMASO

Tio estis alia nova provo por la komitatanoj: Ĉu ili metos sin en la amason aŭ sur privilegian pozicion? Ĉiam memorante la instruon de Prezidanto Maŭ, **"ke la kamaradoj daŭre konservu sian stilon de modesta vivado kaj penema luktado"**, ni ĉiam kaj ĉie kontrolas nian agadon rigore laŭ alta normo, senĉese disvolvas en nia

Revoluciuloj

REKTIFILA FABRIKO

kapo ideologian batalon por detrui "egoismon" kaj starigi "kolektivismon", kaj ĉiam gardas nin kontraŭ **"la atako per sukertegitaj obusoj".**

Ni komencis priatenti nian agadon precipe en la ĉiutaga vivo, por ŝtopi la breĉojn, tra kiuj reviziismo etendus sian atakon. Pli komfortaj estas la oficĉambroj en la fabriko. Oni intencis disponigi unu el ili kiel dormoĉambron por komitatano en deĵoro. Iuj kamaradoj el la revolucia komitato opiniis, ke la komitatanoj devas loĝi kune kun la laboristoj, alie ili povus disiĝi de la amaso. Sed troviĝis ankaŭ aliaj, kiuj diris: "Malgranda estas nia fabriko, ne multnombra estas la personaro, kaj la komitatanoj laboras ĉiutage kune kun la laboristoj, tial ne tiom necesas por ili kuna loĝado." Tamen, la ceteraj kamaradoj malkonsentis al tiu diro, opiniante, ke elektante nin kiel komitatanojn, la amaso ja volas ke mi plibone servu al popolo, tial ni nepre ne devas havi eĉ grajnon da penso pri privilegio. Ni povos ĉiam konservi nian revolucian junecon, nur se ni ĉiam kune vivos per la samaj spiroj kaj dividos la sorton kun la amaso. Post akordiĝo de la pensoj, oni definitive forlasis tiun proponon, kaj la komitatanoj, kiuj ne havas familion kun si, ĉiuj transloĝiĝis en la kolektivan loĝejon por la laboristoj.

Nelonge post la transpreno de la potenco, iuj proponis destini la aŭton de la fabriko por la uzado de la revolucia komitato. La motivo estis: La komitatanoj nun havas multajn laborojn rilatantajn kun aliaj institucioj, kaj iatempe devas partopreni kunvenojn en la urbo malproksime de la fabriko. La komitato faris seriozan diskutadon pri tiu propono. Profunde tuŝite, iu kamarado diris: "Antaŭe dum la revoluciado, ni ne havis aŭton por nia uzado en veturado, kaj tamen neniu plendis pri tio. Kial do aperas tia penso nun post la transpreno de la potenco? Tio montras ŝanĝiĝon de la penso ĉe iuj el niaj kamaradoj!" Tiu diro sonis al ĉiuj kvazaŭ alarmo. Alia kamarado daŭrigis: "La celo de ni proletaj revoluciuloj ja estas preventi la restaŭron de kapitalismo en Ĉinio. En la tempo de transformo de la objektiva mondo, ni devas klopodi ankaŭ por transformi nian subjektivan mondon, per decida forpreno de la potenco de 'egoismo' en nia kapo." Kvankam ni transprenis la potencon el la manoj de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, tamen restas antaŭ ni ankoraŭ longa revolucia vojo, kaj la taskoj estas eĉ pli malfacilaj. Ni povos garantii, ke nia nova potenco neniam ŝanĝos sian naturon, nur se ni ĉiam konservos ĉe ni la stilon vivi mallukse kaj batali peneme. Post sufiĉa diskutado, ĉiuj unuanime konsentis ŝanĝi tiun aŭton por motortriciklo, kiun la fabriko bezonis por transporti varojn.

SINMETO SUB LA KONTROLON DE LA AMASO

Kiam ni proletaj revoluciuloj venis al la potenco el sub subpremado, nia pozicio ŝanĝiĝis. Por marŝi ĉiam antaŭen laŭ la granda vojo de revoluciecigo montrita de Prezidanto Maŭ, gravas por ni meti nin sub la kontroladon de la amaso kaj apliki la armilon de kritiko kaj memkritiko por ĝustatempe venki niajn mankojn. Nur dank' al tio, ni povos ĉiam konservi en ni ardan revolucian volon kaj senhalte marŝi antaŭen.

Foje, iu laboristo-metilernanto vundis al si la fingron pro malatento dum laborado. Pro tio iu severe kritikis la revolucian komitaton per dazibaŭo. Iuj el la komitatanoj opiniis tiun kritikon malmodera kaj ne kun bona volo. La revolucia komitato tuj okazigis kunvenon por studi la aferon. En la kunveno, oni unue studis la eldiron de Prezidanto Maŭ: **"Ĉar ni servas al la popolo, sekve, se ni havas mankojn, ni ne timas, ke aliaj ilin montras kaj kritikas."** Kaj ĉiuj akordiĝis en la opinio, ke la kritikojn de la amaso oni devas aŭskulti kun neŝtopitaj oreloj kaj trakti serioze, sen konsidero pri la akreco de la vortoj. Se la kritiko estas ĝusta, tiam ju pli akre farita estas la kritiko, des pli profunda estos la eduko kaj des pli granda estos la akcelo, kiujn ĝi faras al ni. Sekve, la revolucia komitato tuj skribis dazibaŭon sub la titolo *Ni Varme Bonvenigas la Kritikon kaj Firme Plenumos la Sugeston.* Kaj la komitato faris publike en la fabriko memkritikon pri la manko de sufiĉa edukado pri sekura produktado al la laboristoj kaj oficistoj, anoncis alprenotajn paŝojn por plibonigi la staton kaj kuraĝigis la amason al plua kontrolado kaj kritikado al la revolucia komitato.

Plie, la revolucia komitato uzis la formojn de publika stilreĝustigado, kunsidoj, vizitoj kaj intima interparolado k. a. por meminiciate peti opiniojn, kritikojn kaj kontroladon de la amaso.

Agante laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ ke **"Kritiko interne de la Partio estas armilo por fortigi ĝian organizon kaj pliigi ĝian batalforton."**, la revolucia komitato ĉiam disvolvis inter si kritikon kaj memkritikon, tiel regule kiel ili agas pri "lavado de la vizaĝo" kaj "balaado de la tero", por stimuli la revoluciecigon de la penso ĉe la komitatanoj.

La revolucia praktiko dum unu jaro profunde komprenigis al ni, ke la efektivigo de la revolucia kontrolo per la amaso estas grava garantio, por ke la proletaj revoluciuloj bone tenu kaj bone uzu la potencon, kaj ekstreme grava kondiĉo por la revoluciecigo de la gvidanta grupo.

AL LA PENSO DE MAŬ ZEDONG NI APOGAS NIN EN REVOLUCIO

Navigadon en maro oni dankas al la direktilisto, ĉio kreskanta ŝuldas sian vivon al la suno, kaj al la penso de Maŭ Zedong ni apogas nin en revolucio. Rerigardante la trairitan vojon, ni havas pli profundan komprenon kaj apartan senton pri tiuj vortoj.

Depost la fondiĝo de la revolucia komitato de nia fabriko, multaj novaj aferoj kaj novaj problemoj prezentis sin antaŭ tiu juna potencorgano. Ni unue kaptis la ĉeneron de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Dum laborado kun la laboristoj, la revoluciaj komitatanoj tion faris kune kun ili kaj fortege akcelis la disvolvon de la amasa movado de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ en la tuta fabriko. Por solvi la multajn problemojn aperintajn kun la profundiĝo kaj disvolviĝo de la granda kultura revolucio, ni ĉiam petis konsilojn de la verkoj de Prezidanto Maŭ, kiujn ni studis por bone kompreni, vorton post vorto, kaj firme ilin sekvis.

Kiam la revoluciuloj de nia fabriko fondis la revolucian komitaton, pro "egoismaj" konsideroj en nia kapo, ni ne kuraĝis akcepti por longa tempo en la komitaton gvidantajn kadrojn, kiuj elpaŝis frue por subteni la revolucian amason. Tio malhelpis nin serioze efektivigi la politikon de Prezidanto Maŭ pri kadroj. Kun tiu demando, ni turnis nin al verkoj de Prezidanto Maŭ. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ni aplikis la metodon de klasa analizo por fari ĉiuflankan esploron kaj analizon pri ilia agado de la pasinteco ĝis la nuntempo. En la traktado de la kadroj, kiuj faris erarojn, ni orientis nin per la principo **"kondamni la pasintajn erarojn por evitigi la estontajn"** kaj **"kuraci la malsanon por savi la homon"**. Ni do helpis ilin ekkoni kaj korekti siajn erarojn kaj aktive subtenis ilin leviĝi por revolucii. Kiam Prezidanto Maŭ alvokis, ke **"En la lokoj kaj unuoj, kie estas bezonata transpreno de la potenco, oni devas praktiki la principon de revolucia 'triflanka kombiniĝo'"**, la proletaj revoluciuloj de nia fabriko tuj studis tiun plej altan instrukcion, kaj akceptis plie du revoluciajn kadrojn en la revolucian komitaton. Nun kvar el la kvin kadroj de la meza kaj supera niveloj en la fabriko jam partoprenas en la provizora potencorgano, kaj per tio estas efektivigita kuniĝo kun la plej parto de la kadroj.

En rilato al la pense konservativaj laboristoj kaj oficistoj, ni sekvis la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri ĝusta traktado de kontraŭdiroj interne de la popolo. Ni studis verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun ili, faris kun ili intimajn interparolojn, malkovris al ili niajn pensojn, vekis ilian klasan konscion, helpis ilin ekkoni la krimojn de la burĝa reakcia linio, kaj kuraĝigis ilin reveni al la revolucia linio reprezentata de Prezidanto Maŭ. Post peniga kaj delikata ideologia laborado, la laboristoj kaj oficistoj trompitaj de la burĝa reakcia linio estis fine regajnitaj al niaj vicoj. Nun en nia fabriko jam estis efektivigita la revolucia granda kunligiĝo kaj revolucia "triflanka kombiniĝo". La nova ruĝa potenco nun antaŭenmarŝas per grandaj paŝoj laŭ la granda revolucieca vojo montrita de Prezidanto Maŭ!

Revoluciaj Proverboj

★Brilon perdas la luno, se mankas radioj de l' suno; velksekiĝas ĉiuj plantoj, se mankas roso kaj pluvo; se verkojn de Maŭ Zedong ne studas revoluciuloj, ili perdos sian vojon eĉ kun vidantaj okuloj.

★Ĉiam estas brilo ĉe ofte uzata ŝlosilo; ĉiam estas puro ĉe akvo en senĉesa kuro; kiu verkojn de Maŭ Zedong studadas profunde, tiu ĉiam havas vivardecon abunde.

★Sen trairo ne eblas koni la vojon; sen akrigo glavo nur malfacile trapikas; same ne eblas fariĝi revoluciulo, se verkojn de Prezidanto Maŭ oni ne kreive studas kaj aplikas.

HASAN PETRELA (Albanio)

Sune Brilas la Koncepto pri Granda Proleta Kultura Revolucio

LA granda venko de la ĉina granda proleta kultura revolucio estas venko de la proleta revolucia linio reprezentata de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la plej granda fiero de la ĉina popolo kaj la mondaj revoluciaj popoloj. La revoluciaj popoloj en diversaj landoj rigardas la 700-milionan ĉinan popolon, la gloran Komunistan Partion de Ĉinio kaj kamaradon Maŭ Zedong kiel siajn plej intimajn amikojn kaj la plej varmajn apogantojn de la afero por progreso, revolucio kaj liberiĝo de diverslandaj popoloj.

I

La granda proleta kultura revolucio estas kondukata per la metodo de granda amasa demokratio sub la kondiĉoj de proleta diktaturo. En la ŝtormo de tiu granda revolucio, la laboranta popolo en nombro de centmilionoj energie lernas la penson de Prezidanto Maŭ Zedong, praktikas kun mirinda politika matureco kaj saĝo la linion de Prezidanto Maŭ lasi la amasojn eduki kaj liberigi sin per si mem, t. e., meti "kuraĝon" super ĉio alia, fidi la amasojn, sinapogi sur ili kaj mobilizi senrezerve ilian iniciativon. Tia granda demokratio estas plena kombino de la penso de Maŭ Zedong kun la laborantaj amasoj kaj tre bona formo por multe levi la revolucian spiriton de la amasoj. Sen tia granda demokratio, la granda proleta kultura revolucio ne povus esti tiel vaste kaj tiel profunde disvolvita, kiel ĝi nun efektive estas.

Alte tenante la ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, revoluciaj kadroj kaj intelektuloj, kvazaŭ la ondegoj de Jangzi-rivero, sin ĵetis en la grandan ofensivon kaj gloran batalon por forbalai la enpartiajn reprezentantojn de la burĝaro, kiuj degeneris politike kaj ideologie kaj klopodas restarigi kapitalismon en Ĉinio. En tiu granda ŝtormo senprecedenca en la historio, tre varme disvolviĝas la granda, vigla, publika debato kaj amasaj kritiko kaj memkritiko. Pere de la granda debato, ne nur malkaŝiĝis la burĝa reakcia linio, sed ankaŭ la vastaj popolamasoj ricevis edukon, levis sian batalspiriton, ellernis distingi la malamikojn disde siaj propraj homoj, la pravon disde la malpravo, marksism-leninismon disde reviziismo kaj la proletan ideologion disde la burĝa ideologio. La tuta Ĉinio estas plena de dazibaŭ-oj (opini-afiŝoj), kiuj fariĝis fortaj vipoj en la manoj de la revoluciuloj por skurĝi la kontraŭpartiajn kaj kontraŭsocialismajn elementojn. La kritikado fare de la 700-miliona popolo kaj iliaj tondraj krioj "Frakasu la burĝan reakcian linion!" kaj "Vivu la venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!" sonas tra la ĉielo kaj skuas la teron, tiel ke la timigitaj malamikoj ne scias kien sin kaŝi.

Ĝuste tiel, tiuj plorindaj histrionoj montris sin mizeraj insektaĉoj sub la akraj okuloj de la popolamasoj. La diversspecaj malamikoj ne konas la forton kaj kreivon de la amasoj, nek komprenas, kiom grandan materian forton ili havas, kiam ili posedas la penson de Maŭ Zedong. Tial, ĉio, kion la malamikoj faras, nur plirapidigas ilian pereon.

Tio refoje pruvas la gravan aserton de kamarado Maŭ Zedong: **"Post kiam la malamikoj kun armiloj estas ekstermitaj, restas ankoraŭ malamikoj sen armiloj, ili nepre faros vivmortan lukton kontraŭ ni, ni devas nepre ne subtaksi tiujn ĉi malamikojn."**

La granda proleta kultura revolucio montras al la tuta mondo ke la penso de kamarado Maŭ Zedong estas potenca armilo en la manoj de la amasoj. Nur vera marksism-leninisma politika partio kia la glora Komunista Partio de Ĉinio gvidata de kamarado Maŭ Zedong povas tiel fidplene sinapogi sur la amasoj kaj kuraĝi mobilizi ilin al la granda revolucia batalo por firmigi la proletan diktaturon kaj antaŭenpuŝi la socialisman kaj komunisman aferon. Se ankaŭ la Ĥruŝĉov-reviziisma kliko tiel provus kaj liberigus la manojn de la amasoj kaj forlasus la barbaran burĝan diktaturon super la revoluciaj amasoj kaj kadroj, eĉ nur por unu minuto, la amasoj certe leviĝus ribeli kontraŭ ĝi kaj plene frakasus tiun renegatan klikon, kiu uzurpis la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato de Sovetunio per diversaj intrigoj kaj manovroj kaj intense restaŭras kapitalismon.

II

Marks diris ke revolucio estas lokomotivo de la historio. Ni vidas kun granda ĝojo ke la granda proleta kultura revolucio pliapaŝe akcelas la disvolvon de la produktaj fortoj. La diversaj branĉoj de la nacia ekonomio senescepte akiris grandiozajn atingojn. La alvoko de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"** fariĝis granda standardo de venko kaj triumfa kanto de ĉiama grandpaŝa antaŭenmarŝo.

En la ŝtormo de la granda proleta kultura revolucio, la granda socialisma Ĉinio produktas la unua en la mondo sintezan benzenon kaj artefaritan sintezan insulinon kaj rompis multajn internaciajn rekordojn. En la alta tajdo de la granda kultura revolucio, ĝi produktis ankaŭ H-bombon. Tio estas grandega venko de la monda revolucia popolo kaj forta bato al la du nukleaj hegemonioj, Usono kaj Sovetunio, kiuj vane klopodas teni por ĉiam la nuklean monopolon.

Ĉiam alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la gloraj laborantaj popolamasoj de Ĉinio antaŭplenumis aŭ superplenumis en la plejparto de la provincoj la ŝtatan planon. Ankaŭ sur la produkta kaj scienca frontoj, oni akiris serion da novaj grandaj sukcesoj. Sed la modernaj reviziistoj kaj diverslandaj reakciuloj senhonte kriaĉis ke "la produkto estas detruita" ktp. Lasu ilin envii, tiuj mizeraj ulaĉoj!

La fornego de revolucio estas forĝanta homojn de nova tipo — firmajn revoluciulojn, kiuj estas armitaj per la penso de Maŭ Zedong kaj havas internaciisman spiriton. Tio estas unu el la brilaj venkoj de la granda proleta kultura revolucio, granda venko, kiu ĝojigas kaj kuraĝigas la tutan progreseman homaron. Armita per la penso de Maŭ Zedong, la hodiaŭa ĉina popolo estas plene libera de malaltaj interesoj kaj persona profitemo. En revolucia spirito ili pensas, laboras kaj vivas; ili etendas siajn manojn de amikeco al la monda revolucia popolo kaj marŝas antaŭen kune kun la lasta en la granda revolucia batalo kaj en la batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo.

Koncerne al la spirita fizionomio de la tuta socialisma socio de Ĉinio, la junaj revoluciaj ruĝaj gvardianoj estas tre elstaraj hodiaŭ. Kiom eminentaj ili estas! La ruĝaj gvardianoj, sturmantoj aperintaj en la ŝtormo de la granda proleta kultura revolucio, timas nek furiozajn ventojn nek torentajn pluvojn, kiel agloj ŝvebantaj inter nuboj. Kune kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj la revoluciaj kadroj, ili kvazaŭ fulmotondro plene frakasis la malnovan mondon kaj la malnovajn ideojn, malnovan kulturon, malnovajn morojn kaj malnovajn kutimojn kaj starigis la kvar nova-ojn de la proletaro. Ili estas hardataj kaj kreskantaj en la bataloj por frakasi la kvar malnova-ojn kaj defendi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ. Per siaj agoj, ili montras ke ili povas alte teni la stafetan bastoneton de la proleta revolucio kaj transdoni ĝin de generacio al generacio. La usonaj imperiistoj metis sian esperon pri la kolorŝanĝiĝo de Ĉinio sur ĝian trian generacion, sed ili disreviĝis. La Partio kaj Prezidanto Maŭ tre zorgas pri la revoluciaj junuloj, lasas ilin hardi sin en revoluciaj ondegoj, armas ilin per la ideologio de marksism-leninismo kaj kulturas ilin en firmajn batalantojn por la komunisma afero. La penso de Prezidanto Maŭ Zedong nepre venkos ĉiam. Oni heredigos ĝin kiel plej grandan valoraĵon de generacio al generacio. Tio servas kiel fidinda garantio.

III

Oni povus skribi multajn grandajn verkojn pri la granda proleta kultura revolucio kaj ĝiaj brilaj venkoj kaj granda internacia signifo.

La granda proleta kultura revolucio plene frakasis la malamikojn de socialismo en Ĉinio kaj forte kaj peze batis imperiismon kaj modernan reviziismon. Ĝi vekis la diverslandajn popolojn kaj donis grandan influon al la tuta mondo. Ĝuste pro tio, la imperiismo, reviziismo de Ĥruŝĉov kaj diverslandaj reakciuloj lanĉis kampanjon por freneze oponi kontraŭ la granda proleta kultura revolucio, la Ĉina Popola Respubliko kaj la glora Komunista Partio de Ĉinio.

La malamikoj de socialismo — moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj histerie atakas kamaradon Maŭ Zedong kaj lian revolucian penson. Tiu atako pruvas la potencon de la penso de kamarado Maŭ Zedong kaj la vastan kaj profundan disvastiĝon de la marksism-leninisma doktrino de kamarado Maŭ Zedong en la tuta mondo.

La proletaj revoluciuloj tute konscias ke ili absolute ne atendas de la imperiistoj, Ĥruŝĉov-reviziistoj kaj diverslandaj reakciuloj iajn laŭdojn. La insultoj de tiuj nur montras vivece, kiom malesperigitaj ili fariĝis pro la brilo de la granda proleta kultura revolucio!

Kribrilo ne povas bari la sunbrilon. Kian ajn artifikon la imperiistoj kaj diverslandaj reakciuloj uzos, ili neniam povos malhelpi la diverslandajn popolojn kompreni kaj subteni la celon kaj principojn de la granda proleta kultura revolucio kaj lerni de la brila ekzemplo de ĉinaj proletaj revoluciuloj.

Kun sia aparta, grandega altira forto, la granda proleta kultura revolucio instruas al la diverslandaj popoloj, ke ekzistas nepacigeblaj antagonismaj kontraŭdiroj inter la proletaro kaj la burĝaro: aŭ la proletaro tenas la ŝtatpotencon, aŭ la burĝaro. Ĝi instruas al la diverslandaj popoloj, kiel oni agu kontraŭ la burĝaro, la reviziisma kliko kaj la diverspecaj kontraŭrevoluciuloj. Ĝi konsilas plie, kiamaniere oni preventu la uzurpon de la ŝtatpotenco fare de reviziistoj kaj kiel la revoluciaj amasoj renversu la reviziismon, kiu jam tenas la ŝtatpotencon en siaj manoj. Ĝuste en tio kuŝas la netaksebla internacia signifo de la granda proleta kultura revolucio. Ĝi montras al la popoloj de Sovetunio kaj aliaj landoj, en kiuj la reviziisma renegata kliko tenas la ŝtatpotencon, la ĝustan vojon kaj la manieron, kiel ili forskuu la reviziisman venenan serpenton kaj dehaku ĝian kapon.

Kiel ajn frenezan barakton faru la imperiismo, reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj, la granda ĉina popolo armita per la penso de Maŭ Zedong jam preparis kune kun la mondaj revoluciaj popoloj tombejon por enterigi la naŭzajn kaj putriĝintajn kadavrojn de la usona imperiismo kaj ĝiaj kunuloj!

La revoluciaj popoloj de la mondo turnas sian rigardon kaj inklinas sian koron al la granda ĉina popolo, la granda Komunista Partio de Ĉinio kaj la granda gvidanto kamarado Maŭ Zedong. Ili ne kredas la mensogojn kaj kalumniojn fabrikitajn de la reakciuloj kaj modernaj reviziistoj, kaj male ili des pli varme admiras la grandan socialisman Ĉinion, lernas de la granda proleta kultura revolucio kaj ricevas de ĝi kuraĝigon. En la mondo, la fajrero de popola revolucio nun fariĝas flamanta incendio, en kiu estos brulmortigitaj la imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj. Nenia forto, nenia reakcia kruca militiro povos rezisti kontraŭ la kolera torento de la popola revolucia milito en diversaj landoj.

Hodiaŭ, popola milito havas ekstreme gravan signifon. Ĝuste kiel kamarado Lin Biaŭ diris: "Ju pli venke disvolviĝas popola milito en unu loko, des pli multe ĝi povas reteni kaj konsumi la fortojn de la usona imperiismo." "La spirita atombombo de la revolucia popolo estas multe pli potenca kaj utila ol la materia atombombo.... La usona imperiismo, kiel freneza bubalo ĉien sin trudanta, fine, cindriĝos en la flamo de popola milito, kiun ĝi mem bruligis."

La albana popolo fieras pro tio, ke ni staras, ŝultron ĉe ŝultro kun la granda, frata ĉina popolo, la granda Komunista Partio de Ĉinio kaj ĝia glora gvidanto, la plej intima amiko de la albana popolo, sur la plejfronto por konstrui socialismon kaj komunismon kaj batali kontraŭ imperiismo kaj reviziismo de Ĥruŝĉov.

En sia gratulo al la ĉina granda proleta kultura revolucio, la estimata kaj amata gvidanto de la albana popolo kamarado Enver Hoxha diris: "La Albana Partio de Laboro gratulas la ĉinan grandan proletan kulturan revolucion, kiu celas bati senkompate la burĝan kaj reviziisman ideologion en la homa menso, en la kultura sfero kaj en la diversaj flankoj de la enlanda vivo, batali kontraŭ la klasaj malamikoj kaj ĉiuj reviziistoj kaŝaj aŭ senkaŝaj, kiuj vane provas retiri la popolan Ĉinion sur la kapitalisman vojon, kaj oponi kontraŭ la usona imperiismo, reviziismo de Ĥruŝĉov kaj diverslandaj reakciuloj."

La membraro de la Albana Partio de Laboro kaj la tuta popolo de nia lando rigardas la brilajn kaj grandajn venkojn de la frata ĉina popolo en la granda proleta kultura revolucio kaj en aliaj sferoj kiel siajn proprajn venkojn. Tiuj venkoj kuraĝigas nin, donas al ni novajn fortojn kaj stimulas nin brave marŝi antaŭen al la socialismo kaj komunismo kaj tra ondegoj en favora vento frakasi la intrigojn kaj manovrojn de imperiismo kaj moderna reviziismo.

Nia popolo sentas grandan honoron en tio, ke la Partio kaj popolo de Albanio havas nerompeblan revolucian amikecon kaj batalan unuiĝon kun la glora Komunista Partio de Ĉinio kaj la 700-miliona ĉina popolo. La frata interrilato inter nia lando kaj la popola Ĉinio estas plenamplekse disvolvita kaj ĉiam pli fortigata. Tio favoras la firmigon de la internacia komunisma movado, la revoluciaj kaj socialismaj aferoj kaj la venkon de marksismleninismo.

La granda amikeco kaj batala unuiĝo inter ni du popoloj estas nerompeblaj, ĉar ili estas firme starigitaj sur la principoj de marksism-leninismo kaj naskiĝis kaj kreskis en la bataloj kontraŭ la komunaj malamikoj. Ili trapasis diversajn provojn kaj elmontris nedetrueblan vivforton.


Ŝtalo estas forĝita en fajro kaj amikeco manifestiĝas en malfaciloj. La amikeco inter ni du popoloj kaj du partioj estas provita kaj forĝita en malfaciloj. Ĝi estas amikeco inter popoloj havantaj komunan penson kaj estas kreita de la marksism-leninismaj partioj de niaj du landoj gvidataj respektive de kamarado Maŭ Zedong kaj kamarado Enver Hoxha. Tiu amikeco estas senmorta kaj daŭros por ĉiam!

DE GAŬ:

La Kultura Revolucio Antaŭenpuŝas la Ŝanhajan Industrion

La 7-a Radiomateriala Fabriko de Ŝanhajo pliigis sian produktkvanton en la unua duono de la jaro 1967 pli ol duoble de tiu en la sama periodo de 1966 kaj multe plibonigis ankaŭ la kvaliton de la produktaĵoj. Jen laboristinoj okupiĝas pri produktado de transistoroj.





La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la 6-a Ilmaŝina Fabriko de Ŝanhajo muntas vertikalajn bormaŝinojn subtene al la konstruado de la lando.

EN la alta tajdo de la granda proleta kultura revolucio, la ŝanhajaj laboristoj pruvis sin ne nur pioniroj en la revolucio, sed ankaŭ gvidantoj kaj organizantoj en la produktado.

Profunda ŝanĝo havis lokon sur la industria fronto en la plej granda urbo de Ĉinio, post kiam la proletaj revoluciuloj kaptis la potencon dum la ŝtormo de la "Januara Revolucio".


La totala produktvaloro de la ŝanhaja industrio en la unua duono de 1967 estas 3.1 pocentoj super tiu en la sama periodo de la antaŭlasta jaro. Inter la industrioj kiuj akiris relative grandan kreskon estas tiuj de mezuraj aparatoj, tele-komunikaj ekipaĵoj, kaŭĉuko, medikamentoj, ĥemiaĵoj, metalurgio, teksaĵoj, precizaj ilmaŝinoj, traktoroj, papero, brakhorloĝoj kaj radioriceviloj.

Lastatempa esplorado en pli ol cent fabrikoj montras ke la kvalito de 1,040 el 1,100 ĉefaj produktaĵoj ekzamenitaj aŭ restis stabila aŭ estis plibonigita, dum tiu de 65 produktaĵoj superis la antaŭenirantan nivelon de la mondo.

Tio montras, ke kiam la penso de Maŭ Zedong estas posedata de la laborista klaso, ĝi povas fariĝi grandega materia forto.

La Ŝanhaja Pugiang-a Ilmaŝina Fabriko kaj la Ŝanhaja Fer-aloja Fabriko estas bonaj ekzemploj pri tio. Gvidate de la granda principo de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"**, la proletaj revoluciuloj de la fabrikoj, unuflanke, forte kritikis la burĝan reakcian linion de la ĉina Ĥruŝĉov, aliflanke, senhezite liberigis revoluciajn kadrojn kaj mobilizis ĉiuflankajn aktivajn faktorojn, dank' al kio ili akiris venkojn kaj en revolucio kaj en produkto. Je la 29-a de septembro 1967, la ilmaŝina fabriko jam antaŭdate je unu sezono plenumis la tutjaran produktan taskon, la produktkvanto kaj la totala produktvaloro de ilmaŝinoj ĉiuj kreskis iom pli multe ol tiu en 1966, kaj krome ĝi sukcesis provfabriki specon de plata frotummaŝino. La kvalito kaj kvanto de produkto en la fer-aloja fabriko dum la periodo de januaro ĝis septembro, kreskis respektive je 4 pocentoj kaj 13 pocentoj pli ol tiuj en la sama periodo de la jaro 1966.

Ankaŭ la Avangarda Elektromotora Fabriko estas bona ekzemplo de tio. Ĝi komplete plenumis sian planitan ciferon de produkto por la dua kvarono de la jaro, kun 68-pocenta pliiĝo en la totala produktvaloro super la sama periodo de 1966. La produkto de frekvencaj elektraj motoroj, unu el



Laboristinoj de la Ŝanhaja Elektrontuba Fabriko muntas elektronajn tubojn.

ĝiaj ĉefaj produktaĵoj, kreskis je pli ol duoblo, kaj la produkto de dentradaj motoroj rompis la rekordon de la fabriko. La totala produktvaloro en junio estis duoble tiom kiom tiu de la sama periodo de 1966.

En la pasinteco, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon praktikis reviziismanlinion en la fabriko, metante materian stimulon kaj teknikon antaŭ ĉion. Ili klopodis malhelpi la laboristojn studi la verkojn de Prezidanto Maŭ. Kaj rezulte, estis adoptitaj diversspecaj planoj de pohoraj produktaj kontingentoj kaj premioj por superprodukto. La laboristoj diris: "Ili intencis logi nin for de la ĝusta vojo per superpagoj kaj kontingentoj kaj glitigi nian socialisman entreprenon iom post iom sur la vojon kapitalisman."

Post kapto de la potenco el la manoj de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, la proletaj revoluciuloj kun la subteno de la Popola Liberiga Armeo, ĝisfunde kritikis kaj forĵetis la reviziisman linion en la fabriko. Ili lanĉis movadon por kreive studi kaj kreive apliki la verkojn de Prezidanto Maŭ. Nun la revoluciigo en ilia penso alportis grandan impeton en produkto. Krom plenumo de sia planita produktotasko por la dua sezono, la laboristoj fabrikis 280 elektrajn motorojn por fabrikoj presantaj la verkojn de Prezidanto Maŭ. La senlima amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ ebligis la laboristojn plenumi la planitan laboron tri monatojn antaŭdate.

La proletaj revoluciuloj sur la industria fronto en Ŝanhajo pruvis sin kapablaj ne nur kontraŭstari la herezan venton de ekonomiismo agititan de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, sed ankaŭ disrompi la ekonomian blokadon altruditan de la imperiistoj.

Laboristoj de la Tria Fabriko de la Ŝanhaja Ferŝtala Kompanio provizis bonan ekzemplon.

En la hereza ekonomiisma vento agitita de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, malaltiĝis la produktado de la Besemer-forno n-ro 2 en la fabriko. Sed la malfaciloj neniom timigis la proletajn revoluciulojn. Ili venkis ĉiujn malfacilojn sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon."** Kiam la pontarganoj navedis tien kaj reen kaj la grandega forno elverŝis fanditan

ŝtalon fojon post fojo, en la tuta laborejo tondris huraoj. Kun larmoj de ĝojo en siaj okuloj ili aklamis: "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!"

Ĝuste en tiu tempo la proletaj revoluciuloj en du sinsekvaj tagoj sukcese kreis la plej altan tagan produktkvanton de 1,835.5 tunoj de post 1958 kaj starigis du mondajn rekordojn en kontinua ŝtalfandado.

Ĉinio kutime importas ŝtalplaton por profunda stampado. Depost la komenciĝo de la granda kultura revolucio, iuj kapitalismaj landoj, intencante subfosi la revolucion, ĉesigis provizadon de tia materialo. La ĉinaj laboristoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong neniel povas esti ĉantaĝitaj de la imperiistoj. Ricevinte la taskon de provfabrikado de ŝtalplato por profunda stampado la proletaj revoluciuloj de laborejo de Besemerforno n-ro 2 gluigis apud sia fornego afiŝon kun la jenaj vortoj de Prezidanto Maŭ: **"La imperiistoj tiel nin tiranas, kaj ni devas trakti ilin serioze."**

Kiam ili sukcesis elfabriki la unuan inkandeskan ŝtalpecon por fabriki tian ŝtalplaton, tiuj revoluciaj laboristoj nomis ĝin "ŝtalo kontraŭ imperiismo", dirante: "Iru al diablo la imperiisma blokado!"

Sed, tio estis nur sukceso unuapaŝa. Pli grava estis la laminata procedo. En la pasinteco, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon rifuzis aprobi pluapaŝan eksperimentadon kun la preteksto de manko de necesa malvarmlaminata ekipaĵo. Ĉu oni povas produkti la premformigan ŝtalplaton per varma laminatado? La proletaj revoluciuloj de la ŝtalplata laborejo solvis tiun problemon post detalaj diskutoj kun ĉiuj koncernaj laboristoj. Dank' al iliaj kunaj klopodoj kun aliaj laborejoj, fine en Ĉinio produktiĝis la unuaj amasoj da varmlaminataj ŝtalplatoj por emajlaĵoj.

Rakontante pri sia sukceso, iu laboristo diris: "La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, ĝuste kiel la imperiistoj, donis atenton nur al la ekipaĵoj. Ili ne povis vidi kiom grandan revolucian iniciativon posedas la ĉinaj laboristoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong!"

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"La popolo, nur la popolo, estas la movforto kreanta la mondan historion."**

Post kapto de la potenco, la proletaj revoluciuloj rompis la regadon de specialistoj. Ili sekvis la instrukcion de Prezidanto Maŭ: **"Persisti je meto de politiko en komandon; fortigi la gvidantecon de la Partio; forte konduki amasan movadon; starigi sistemon ke kadroj partoprenas produktan laboron kaj laboristoj partoprenas en administradon; revizii ne raciajn kaj ne plu taŭgajn regulojn kaj gvidpunktojn; kadroj, laboristoj kaj teknikistoj laboras en strikta kunlaboro; kaj aktive efektivigi teknikan revolucion."** Ili disvolvis la laborstilon kuraĝi pensi, paroli kaj agi. Ili elstarigis la proletan politikon, detruis malnovan kaj kreis novan, reduktis la produktkoston, ŝparis nenecesajn elspezojn kaj novaj produktaĵoj estis kreitaj.

La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Ŝanhaja Fabriko de Malregulformaj Senjuntaj Ŝtaltuboj provfaras novan produktafon per nova teknologio de termopremado.



La Hinhua-a Fabriko de Radiaj Ekipaĵoj fabrikis, en la pasinteco, 1,500 kilovatan brodkastan instalaĵon kopiitan laŭ fremda modelo je produktkosto de 11,600 juanoj. Tiu instalaĵo estis alta je 2 metroj kaj peza je 300 kilogramoj. Ĝi estis malgracia kaj altpreza. Plurfoje la laboristoj proponis modifi tiun fremdan projekton, sed la proponoj estis repuŝitaj.

En la granda proleta kultura revolucio, la proletaj revoluciuloj de tiu fabriko malkaŝis la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kritikis la burĝajn "aŭtoritatojn" kaj kaptis la gvidantecon de la produkto en siajn manojn. En strikta kunlaborado kun teknikistoj, ili modifis la fremdan projekton, kreis la laŭdatan instalaĵon bonkvalitan, malkaran kaj facile porteblan. La produktkosto de la nova produktaĵo estas nur 6,500 juanoj, ĝia alto nur 1.2 metroj kaj ĝia pezo nur 250 kilogramoj.

Starantaj sur la fronto de la batalo, la laboristoj en Ŝanhajo, la plej granda industria urbo en Ĉinio, estas la ĉefaj fortoj en la senprecedenca granda proleta kultura revolucio. Estas ili, kiuj, respondante la alvokon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"**, senĉese kreas novajn miraklojn per siaj saĝeco, laboremo kaj kuraĝo. Jen bonaj novaĵoj el Ŝanhajo:

La 13,000-tuna ŝipo "Ĉaŭjang" projektita kaj fabrikita de Ĉinio estis surakvigita!

La ĉina unua 150-tuna peza pasaĝervagono estis sukcese fabrikita!

La proletaj revoluciuloj en la Avangarda Elektropova Ekipaĵa Fabriko sukcesis provfabriki multnazan elektronan ŝprucigilon en tri monatoj! Ĝi superis la antaŭirantajn mondajn normojn.

La Ŝanhaja 4-a Farmacia Fabriko sukcesis en provproduktado de la nova antibiotiko "Kanamycin"!

Pli ol 30 altaj sentemaj precizaj mezuraj instrumentoj estis produktitaj de la laboristoj en ŝanhajaj fabrikoj de elektraj mezuriloj kaj aliaj instrumentoj dum la granda proleta kultura revolucio!

Hodiaŭ en Huangpu-rivero svarmas ŝipoj. Vagonaroj de industriaj varoj faritaj en Ŝanhajo galopas al diversaj partoj de Ĉinio. La fabrikoj estas muĝantaj. La merkato montras viglan komercon. La nova Ŝanhajo estas antaŭenmarŝanta!

KURANTAJ AFEROJ

Ea Konstvuado

RAPIDA LIVERO DE BONKVALITA KOTONO AL LA ŜTATO

Post la abunda rikolto de kotono en la sudaj kaj nordaj kotonproduktaj regionoj de nia lando en 1967, rapide iris la aĉeta laboro de la ŝtato.

Ĝis la fino de septembro 1967, la aĉetita kvanto de kotono en la provincoj Giangsu, Ĝegiang, Ŝandong, Hebej, Ŝanhi, Henan, Ŝenhi, Siĉuan kaj la urboj Ŝanhajo kaj Pekino estis 43 procentojn pli granda ol tiu en la sama periodo de 1966. Kaj ankaŭ la kotonkvalito estas pli bona ol tiu de 1966.


LA UNUA AŬTOMATA TRIDIMENSIA FOTOGRAFILO PRODUKTITA DE ĈINIO

Post trimonata penlaboro, la Metiindustria Administracio de Ŝanhajo sukcese elproduktis la unuan aŭtomatan tridimensian fotografilon de Ĉinio, en kunlaboro kun koncernaj institucioj.

Tiu ĉi aparato povas fari pli versimilajn tridimensiajn fotojn kaj estas instrumento vaste uzata en industrio, medicino, ĵurnalista aktivado kaj en kulturaj kaj edukaj laboroj.

ĈINIO SUKCESIS PRODUKTI KOLORAJN FILMSTRIOJN

En la laŭta sonado de triumfaj kantoj de la granda proleta kultura revolucio, iu ĥemiindustria entrepreno de nia lando sukcesis produkti kolorajn filmstriojn, sin apogante sur la propraj fortoj, kaj nun liveras ilin en grandaj kvantoj, tiel ebligis al nia lando fundamente plenumi la bezonojn de koloraj filmstrioj per siaj propraj produktaĵoj.



Ĥore Sonas Himnoj en Dekmilo

AVANBAJ (Kazaĥo)

Sen bril' de l'ora suno,
Ne kreskas karagana floro.
La granda pens' de Maŭ Zedong
Ne povas manki al kazaĥ-popolo.

Mil domroj vibras kune,*
Kaj ĥore sonas himnoj en dekmilo,
Por glori la gvidanton grandan Prezidanto
Maŭ —
La ruĝa sun' en nia koro sen subiro.

Lumigas via forta brilo nian koron,
Kaj nutras nian menson via penso granda.
La oraj libroj viaj estas font' de vero;
La voj' de vi montrita estas ja senranda.

Patosaj kantoj formas riveron kunflue,
Elkoraj vortoj onde vibras kontinue.
En unu frazon forĝu mil kaj dek mil vortojn:
Ho, longe vivu Prezidanto Maŭ senlime!



**Trikorda plukinstrumento*

Universala Transistora Ciferkomputilo Sukcese Elfarita en Ĉinio

EN la bonega situacio, kiam la granda proleta kultura revolucio akiris decidan venkon kaj dum la tuta popolo ĝoje celebris la 18-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, de nia scienco-teknika fronto venis la ekstreme ĝojiga informo: Oni sukcesis provfari grandan novtipan transistoran cifer-komputilon taŭgan por ĉiuj celoj, post kiam oni elfaris diversajn tipojn de universalaj elektronaj komputmaŝinoj. Tio estas triumfo de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, grava frukto de la granda proleta kultura revolucio kaj alia kortuŝa triumfa kanto pri la venko de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ super la kontraŭrevolucia reviziisma linio praktikita de la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la laboroj de scienco kaj tekniko.

Por esprimi siajn senlimajn amon, fidelecon, fidon kaj adoron al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la laboristoj, inĝenier-teknikistoj, sciencaj laborantoj kaj aliaj personoj kiuj sin okupis pri la provfarado igis ĉi tiun maŝinon ĉe ekfunkcio: unue kanti "Dongfang hong, tajjang ŝeng, Ĝongguo ĉu liaŭ ge Maŭ Zedong...." (Ruĝas la oriento, leviĝas la suno, en Ĉinio aperas Maŭ Zedong....), la kanton plej popularan ĉe la revoluciaj amasoj de centoj da milionoj, desegni la portreton de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lian aŭtografon "Servu al la Popolo" en kvin ĉinaj ideografiaĵoj antaŭ ol ekplenumi rapide kaj precize diversajn taskojn de kompleksaj matematikaj kalkuloj bezonataj en la socialisma konstruado.

La produkto de transistoraj cifer-komputiloj postulas scion de nuntempa teknologio kombinanta la plej lastajn atingojn en elektroniko, duonkonduktanto, precizaj instrumentoj kaj komputa scienco. Per sia rapideco kaj precizeco en kalkulado, vasta uzebleco kaj stabileco, la nova komputilo estas tre utila instrumento por diversaj nacieekonomiaj sekcioj kaj ege grava kaj nemankigebla helpanto en la kampoj de atoma energio, raketoj kaj kosmonavigado. Tiu ĉi plej novtipa universala transistora cifer-komputilo elfarita de nia lando jam solvis seriojn da praktikaj, komplikaj kaj gravaj problemoj pri produkto, konstruo, sciencaj esploroj kaj projektoj. Necesas armeo da spertuloj kiuj devas elspezi tre longan tempon por ellabori ĉi tiujn solvojn per ordinara procedo, kiu tamen emas erari kaj ne povas atingi bonan rezulton.

La sukcesa elfaro de ĉi tiu komputilo atestas, ke ĉina teknologio de komputado jam atingis novan nivelon kaj ke la ĉina popolo surgrimpis alian novan supron laŭ la vojo kuratingi kaj superi la progresintan normon de la mondo en scienco kaj teknologio. La komputilo estas farita el materialo produktita en Ĉinio kaj per ĝiaj propraj teknikaj fortoj.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"La havaĵoj de la socio estas kreitaj de la laboristoj, kamparanoj kaj laborantaj intelektuloj mem. Se ili ekposedas sian sorton, sekvas la marksism-leninisman linion kaj ne evitas problemojn, sed aktive solvas ilin, ĉiu ajn malfacilo en la mondo estas solvebla."** Estas ĉi tiu instruo de Prezidanto Maŭ, laŭ kiu la revoluciaj laboristoj, teknikistoj kaj sciencaj laborantoj partoprenintaj en studo kaj farado de la grandtipa universala transistora cifer-komputmaŝino, firme kritikis kaj frakasis la kontraŭrevolucian revizi-isman linion de sklavismo, rampismo kaj likvidismo disvastigitan de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la sciencteknikaj rondoj. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, kaj per tiu granda penso por ĉion komandi, direkti kaj akceli, ili fine gajnis la sukceson post forigo de ĉiuj malfaciloj sur la vojo de antaŭenmarŝado.

Ĉinio Viciĝas inter la Progresintajn Landojn en Karbomineja Ventolado

ALTE tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la proletaj revoluciuloj de la Taŭĝuang-a Karbominejo sub la Zaŭĝuang-a Mineksplua Administracio de Ŝandong-provinco sukcese plenumis la konstruon de transporta vojo longa je 2,880 metroj en ŝakto sen konstruo de speciala vojo por aerumado. Tion ili faris per uzo de la ordinara 11-kilovata ventumilo kaj glueca ventoltubo kun diametro de 500 milimetroj por plene doni freŝan aeron bezonatan en la laborado de solvoja tunelkonstruado. Tio vicigis Ĉinion inter la progresintajn landojn en tekniko de longdistanca ventolado kaj malfermis vastajn perspektivojn al Ĉinio pri aerumado en pli longaj tuneloj de fervojoj kaj en la mineksplua industrio. Laŭ kalkulo, oni povas aerumi ŝaktan vojon de ĉ. 4,000 metroj, se estas necese.

La solvoja ventolado, en iuj el la imperiismaj aŭ reviziismaj landoj, kvankam atingis la longecon de 3,000 aŭ 4,000 metroj, tamen por tio oni uzas kelke da elektraj ventumiloj aŭ aparte grandan ventumilon kaj grandajn ventoltubojn por liveri freŝan aeron. En Ĉinio, nur 11-kilovata ventumilo estas uzata krom ordinara glueca ventoltubo, kaj la po-kilovata efiko atingis meznombre 261 metrojn, kiu superis tiun en la imperiismaj landoj de malnova marko kaj la reviziisma Sovetunio havantaj "teorion" pri karbomineja ventolado de dekoj da jaroj. En la kampo de prevento de aerellaso el la ventoltubo kaj redukto de rezisto dum ventolado, la proletaj revoluciuloj de la Taŭĝuang-a Karbominejo ankaŭ disrompis per sia praktiko la teorian absurdaĵon de la "aŭtoritatuloj" en la imperiismaj kaj reviziismaj landoj pri karbomineja ventolado. Sovetia "aŭtoritatulo" asertis ke la minimuma rilatumo de aerellaso el la ventoltubo po cent metroj estas ĉirkaŭ 10%, sed tiu de la ventoltubo de la Taŭĝuang-a Karbominejo estas nur 0.328%, t. e. ke la aerellaso preskaŭ nuliĝis kaj ankaŭ la rezisto de la ventoltubo dum ventolado multe reduktiĝis.

Antaŭ nelonge, la Ministrejo de Karba Industrio asignis al koncernaj personoj la taskon de ĝenerala ekspertizado pri tiu progresinta tekniko kreita de la Taŭĝuang-a Karbominejo. La rezultato montris, ke la enira kvanto de freŝa aero ĉe la ensuĉa aperturo de la ventoltubo estis 80.6 kubaj metroj po minuto, la efika kvanto, kiu atingis la terenon de laboro tra la vojo de preskaŭ tri kilometroj, estis 73.2 kubaj metroj po minuto kaj la kvanto de freŝa aero por ĉiu laboristo po minuto multe superis la difinitan normon de la ŝtato.

En la kreado de la solvoja longdistanca ventolado, la proletaj revoluciuloj de la Taŭĝuang-a Karbominejo eltrovis serion da novaj teknikaj konstataĵoj kaj per tio metis bazon por Ĉinio en starigo de sia propra teorio de karbomineja ventolado. Pro nekonstruo de aparta ventola tunelo, ĉi tiu minejo ŝparis kelkajn centmilojn da juanoj por la ŝtato kaj la konstruo progresis multe pli rapide. Se tiu ĉi sperto estos aplikata en minado, konstruo de fervojaj tuneloj k. s. tra la lando, ĝi helpos ŝpari grandajn kvantojn da mono, homforto kaj materialo kaj ludos gravegan rolon por plirapidigi la konstruon de fundamenta industrio kaj komunikoj en Ĉinio.

La ĉefaj kreintoj de la 2,880-metra solvoja longdistanca ventolado estas ordinaraj laboristoj pri aerumado. Dum sia kreado ili kreive studis kaj kreive aplikis verkojn de Prezidanto Maŭ, deskuis la katenojn de fremdlandaj rutinoj kaj frakasis la malhelpojn de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj tiel kreis la ventoltubon kiu preskaŭ ne ellasas aeron. Ĉiutage ili fojon post fojo faris detalan kontroladon tra la tuta ventoltubo por trovi kaj kapti la tre subtilajn aerellasajn truetojn kiajn oni kutime preteratentis, kaj ilin neniigis per ĉiuj rimedoj. Kaj fine, post diligenta laborado, ili sukcese kreis la unuan preskaŭ ne aerellasan ventoltubon en la mondo.



Popolkomunumanoj de Haj-an entuziasme subtenas la konstruadon de la lando per vendo de sia nove produktita kotono.

Arĝente Floris Haj-an

GIANG HAJ

EN profunda aŭtuno de 1967, arĝente floris la kotonprodukta regiono en la norda parto de Giangsu-provinco de nia lando.

En Haj-an, kiu estas gubernio situanta en tiu regiono, troviĝas 310,000 muoj da kotonkampoj. En tiu jaro, ĝi akiris riĉegan rikolton de kotono post supervenko de la plej serioza sekeco depost 1932.


BATALO KONTRAŬ EGOISMO KAJ KRITIKO AL REVIZIISMO KLARIGIS LA DIREKTON

Tiu abundega rikolto estas atingita en la decida batalo inter la du klasoj, la du vojoj kaj la du linioj. Ĝi estas granda venko de la senlime brila penso de Maŭ Zedong kaj giganta frukto de la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio.

Ekde la semado la grandnombraj malriĉ-kamparanoj, malsuperaj mez-kamparanoj kaj revoluciaj kadroj jam firme kaptis la radikalan problemon "ĉu iri la socialisman aŭ la kapitalisman vojon?" kaj prenante la penson de Maŭ Zedong kiel armilon malkovris kaj kritikis la krimagon de la ĉina Ĥruŝĉov en lia vana klopodado por restarigi kapitalismon en la kamparo. En la revolucia amasa kritikado, la granda armeo de malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj kaj revoluciaj kadroj forte refutis kaj kondamnis la absurdaĵojn ĉiumaniere distrumpetitajn de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj, kiaj "ekspluato estas merito", "kvar liberoj" (libero de uzuro, libero de dungo de laboristoj, libero de vendo kaj aĉeto de tero kaj libero de privata entreprenado), "plivastigo de la parceloj por privata uzo kaj de liberaj merkatoj, pliigo de etaj entreprenoj mem respondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj, kaj la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado", "materia stimulo". En kritika kunveno Liu Vennian, grupestro de la Ligo de Malriĉ-kamparanoj kaj Malsuperaj Mez-kamparanoj, faris profundan malkaŝon dirante: "Materia stimulo" similas al opio. Ju pli vi fumas ĝin, des pli fortiĝas via kutimo de fumado, kaj des pli kreskas al vi la egoismo kaj la inklino al erara vojo. Prezidanto Maŭ instruas al ni **"tutkore" kaj "senrezerve" "servi al la ĉina popolo kaj la tutmonda popolo".** Sed la ĉina Ĥruŝĉov klopodis konduki nin sur la vojon de individua riĉiĝo per la "materia stimulo". Li intencis unue ŝanĝi nian koron kaj poste nian reĝimon kaj tiel restarigi kapitalismon en la kamparo. Ni devas nepre aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ, ne lasi nin kaptita de egoismo kaj reviziismo kaj firme starigi la penson terkulturi por la revolucio, kiel la Daĝajanoj.

La revolucia amasa kritiko ne nur klare montris al la komunumanoj la ĝustan direkton, ebligis al ili distingi la socialisman vojon disde la kapitalisma, sed ankaŭ komprenigis al ili kiel "materia stimulo" influas la homojn tra egoismo.

Akirinte pli bonan komprenon pri "ekstermo de egoismo kaj starigo de kolektivismo" en la amasa kritikado, Han Ĉongjing, membrino de Hinhua-brigado, memvole vendis al sia brigado 16 korbojn da ekskrementa sterko, per kio ŝi antaŭe intencis sterki sian parcelon por privata uzo. Ŝi diris: "Mi ne vendis sterkon, sed elfosis mian egoismon kaj forigis ĝian venenan radikon." Inspirite de la bona ekzemplo de Han Ĉongjing la tuta brigado tuj levis altan tajdon vendi sterkon al la kolektivo kaj per tio solvis la problemon de manko de grasigaĵo kaj donis ĝenerale al la kotonkampoj plian sterkon por la floriĝo kaj fruktiĝo de la plantoj. Dank' al tio, ili ne bezonis postuli de la ŝtato eĉ unu ĝinon pli multe da kemia sterko. Kvankam la naturaj kondiĉoj estis malpli bonaj kaj la uzita kvanto de sterko kaj insektmortigiloj estis malpli granda ol en 1966, tamen la produktokvanto estis pli granda.



Membroj de Vadian-Komunumo de Haj-an transportas la novan kotonon por vendi al la ŝtato.

POTENCA PRODUKTOFORTO ESTAS LA KOMUNUMANOJ ARMITAJ PER LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

La granda instrukcio de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"** jam enradikiĝis en la vasta kamparo de Haj-an-gubernio kaj donis abundajn fruktojn.

La granda proleta kultura revolucio de nia lando akcelis la ideologian revoluciigon de la homoj, kaj la penso de Maŭ Zedong estas pluapaŝe posedata de la vastaj amasoj de Haj-anaj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj kaj ŝanĝis spiriton en materian forton potencan kaj neelĉerpeblan.

Lastatempe ankaŭ kelkaj okcidentaj burĝaj ĵurnaloj informis pri nia riĉega rikolto de agrikulturo en 1967, tamen kun sia kaŝita intenco ili distordis la fakton dirante, ke la riĉa rikolto estis akirita dank' al favoraj naturaj kondiĉoj. Sed tute alia estis la fakto. Haj-an, ekzemple, gajnis sian abundegan rikolton de kotono nur post venko de natura katastrofo.

En junio, julio kaj aŭgusto de 1967, t. e. en la decida periodo por la burĝonado, florado kaj fruktiĝo de kotonarbo, Haj-an suferis seriozan sekecon. La 8,800 muoj da kotonkampoj en Vadian-komunumo tute diskrevis; la verdaj kotonarboj velkis, kaj iliaj folioj kunvolviĝis

kaj flaviĝis. Ĝuste en tiu tempo la komunumanoj kaj kadroj elĉerpis potencan forton el la jenaj instruoj de Prezidanto Maŭ:

"En tempo de malfacileco, ni devas vidi niajn atingaĵojn, devas vidi la lumon kaj devas levi nian kuraĝon."

"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon."

Sub la gvido de la penso de Maŭ Zedong, la vasta armeo de komunumanoj kaj kadroj, viraj kaj virinaj, junaj kaj maljunaj, ĉiuj sin ĵetis en la batalon de "popola milito" kontraŭ sekeco, kun kadroj en la unua vico. Kaŭrante en kotonkampo varmega kiel en vaporumujo, Ĝu Longlin, la estro de la sepa grupo de Ĝoŭduo-brigado, ĉerpadis per kulerego enkondukitan akvon el la sulkoj por akvumi la kotonarbojn. Longe laborinte en tia maniero li eksentis kapturniĝon kaj paraliziĝon de la kruroj, kaj ekvolis sidiĝi por iom ripozi. Sed, tiam li ekmemoris sian tragikan travivaĵon en la malnova socio kaj la krimegon de la ĉina Ĥruŝĉov, kiu klopodis restarigi kapitalismon en la kamparo, malamo tuj plenigis lian koron, kaj freŝaj fortoj naskiĝis en li. Li diris: "Hodiaŭ ni terkulturas por la revolucio, ĉiu plia kotonfrukto signifas unu plian kuglon por pafi kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov. Kiel ajn sensentiĝos al mi la kruroj kaj kiel ajn al mi la kapo turniĝos, mi persistos ĝis la fino." Stimulate de la bonaj ekzemploj de la kadroj la vasta amaso de komunumanoj de Ĝoŭduo-brigado, same kiel la frataj komunumoj kaj brigadoj de la tuta gubernio, disvolvis la spiriton de sentima eltenado de grandaj suferoj kaj penado kaj fine venkis la sekecon. La kotonarboj kun flaviĝintaj kunvolviĝintaj folioj reakiris freŝan verdon kaj sane kreskis plue. Vere kiel la popolkanto diras:

Antaŭe la naturo regis super nia sorto,

Sed nun ni venkas ĝin jam per komuna forto.

Abunde fruktas la kultura revolucio,

La verkoj de Maŭ Zedong hereditos de generacio al generacio!

UNUIĜO DE LA ARMEO KAJ POPOLO, DUOBLA VENKO DE REVOLUCIO KAJ PRODUKTO

En Haj-an ĉie flirtas ruĝaj flagoj, kaj cirkulas rakontoj pri la subteno de la popolo al la armeo kaj la amo de la armeo al la popolo.

En la mitingo de Ĝiuĉang-komunumo por subteni la armeon kaj ami la popolon, la "Ĉarto pri Subteno al la Armeo" de la dekdua brigado aspektis neordinara. Ĝi surhavis ĉe la centro grandan ideografiaĵon "Feliĉo" formitan el arĝenta kotono, kiu estis okulfrapa kaj bela. Ĝi manifestis la klasan amikecon ligitan kvazaŭ sango al karno inter la komunumanoj, kadroj kaj la PLA-anoj subtenantaj agrikulturon, starigitan en la batalo.

Jen estas historio pri tiu amikeco:

En la komenco de la granda kultura revolucio, la burĝa reakcia lino de "bato al plejparto kaj protekto al plenmano" praktikata de la ĉina Ĥruŝĉov en traktado al kadroj serioze venenigis la solidarecon inter la komunumanoj kaj kadroj. Ĝuste en tiu tempo Prezidanto Maŭ alsendis trupojn de la Popola Liberiga Armeo por subteni agrikulturon. Tuj kiam la PLA-anoj atingis la produktan brigadon, ili organizis komunumanojn kaj kadrojn kreive studi kaj apliki verkojn de Prezidanto Maŭ, disvolvi revolucian amasan kritikadon, direktante la profundan malamon de la komunumanoj kaj kadroj al la ĉina Ĥruŝĉov. Ili helpis la amasojn ĝuste trakti la kadrojn, fidi kaj sinapogi al la plejparto de ili, kaj samtempe ankaŭ edukis la kadrojn same konduti rilate al la amaso. Tiam Miaŭ Songtaŭ, la estro de la kvara grupo, ekhavis penson ne plu servi kiel kadro pro tio, ke la amaso skribis kelkajn dazibaŭ-ojn lin kritikantajn. Eksciinte tion la kamarado el la Liberiga Armeo por subteni la agrikulturon venis ofte al li por kune labori kaj studi la artikolon *Servu al la Popolo*, kaj cetere vizitis lian hejmon vespere por interparoli kun li. Ilia babilo iris de la amara pasinteco ĝis la dolĉa hodiaŭo, de la demokratia revolucio ĝis la granda kultura revolucio. Poste ili kune studis la vortojn de Prezidanto Maŭ: **"Sennombraj revoluciaj martiroj oferis sian vivon por la interesoj de la popolo, tiel ke ĉiu el ni vivantoj estas plena de doloro en la koro kiam ni ekmemoras ilin — ĉu povas esti ia ajn persona intereso, kiun ni ne povas oferi, aŭ ia ajn eraro, kiun ni ne povas forĵeti?"** La vortoj de Prezidanto Maŭ peze falis sur la koron de Miaŭ kvazaŭ mil-kilograma martelo. Senvole li dronis en rememoroj: Tiam Miaŭ farmis teron de bienulo. Ĉar li ne povis pagi la terrenton, li estis devigita translokiĝi tri fojojn en unu jaro, almozpetis kaj multe suferis. Estis Prezidanto Maŭ, kiu, gvidante la Liberigan Armeon, liberigis la malriĉulojn el la mizeroj, kaj nun Prezidanto Maŭ persone iniciatis kaj gvidas la grandan proletan kulturan revolucion, por ke nia lando neniam ŝanĝu sian koloron kaj la sango de la martiroj ne estu vane elverŝita. Je penso pri tio, heliĝis en lia koro kaj li decidis persisti ĉe la bonoj kaj korekti la erarojn por la popolaj interesoj, kaj li aktive partoprenis en la ardan batalon kaj kune kun la amaso firme tenis la revolucion kaj stimulis la produkton.

La ŝanĝo de la sinteno de la kadroj akiris simpation kaj subtenon ĉe la amasoj. Tiamaniere la komunumanoj kaj kadroj interligiĝis pro la komuna revolucia celo, klopodis unuanime kaj forte stimulis la produkton de kotono. La komunumanoj kaj kadroj de la 12-a grupo ĉiuj opinias, ke la riĉega rikolto de kotono de ilia grupo estas akirita antaŭ ĉio dank' al tio ke la Liberiga Armeo semis en ili la penson de Maŭ Zedong. Por danki Prezidanton Maŭ kaj la Liberigan Armeon, la komunumanoj honore nomis la kotonon el la plej frue maturiĝintaj fruktoj, "kotono feliĉon anoncanta" kaj oferis ĝin al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la granda Ĉina Popola Liberiga Armeo de li fondita.

Bataleca Arto de la Heroa Popolo

—Pri la ludado de la Akrobata Trupo de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio

La tuta Vjetnama Akrobata Trupo varme krias post prezentado: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu Prezidanto Ho!"



LA Akrobata Trupo de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio vizitis Ĉinion kaj faris bonegajn prezentojn.


La batalamikoj-akrobatoj portis al la ĉina popolo fratan, batalan amikecon de la vjetnama popolo kaj ĝojigajn informojn pri venkoj de la vjetnamaj armeanoj kaj popolanoj en ilia batalado kontraŭ la agresado de la usona imperiismo. Je la komenco de ilia prezentado, la artistoj alte tenis la naciajn standardojn de niaj du landoj, varme prikantante la profundan amikecon inter la du popoloj. Kaj ĉe la fino de la prezentado, alte tenante rubandegon kun vortoj "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu Prezidanto Ho!" la tuta akrobataro varme manklakis kaj hurais kune kun la spektatoroj. Post kantado de la nacia himno de Vjetnamio, ili kantis ankaŭ *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto*. En tiu tempo la artistoj kaj spektatoroj ĝoje kantis kune por esprimi sian varman amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Sub la gvidado de la Vjetnama Partio de Laboro kaj prezidanto Ho Chi Minh, post senĉesa klopodado la Akrobata Trupo de Vjetnamio multon atingis en servigo de la akrobata arto al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al la granda nacisava batalo kontraŭ la usona agreso.

Multaj programeroj ĉifoje prezentitaj de la Akrobata Trupo temis pri la granda batalo kaj spiris fortan politikan senton kaj batalan spiriton. Ili senkompate malkovris la fian vizaĝon de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj spegulis Ia ardan vivon de la vjetnamaj armeanoj kaj popolanoj en ilia sankta batalado. Ekzemple, la iluziista ludo "Migranta Magazeno" spegulis la klopodon de la komerca fako sub la kondiĉoj de aeraj atakoj, organizi liveradon de vivbezonaĵoj. Kiam venas malamikaj aeroplanoj, la vendistoj tuj fariĝas heroaj batalantoj kontraŭ la usonaj aeraj banditoj. Tiu ĉi programero enkorpigis la spiriton "ĉiu popolano estas soldato". La programero "Esti ĝojaj en Produktado kaj Ĉiam Pretaj al Batalo" montris batalan vivon de la vjetnama popolo, kiu tenas

Dum sia vizito en Pekino la Vjetnama Akrobata Trupo prezentas antaŭ la membroj de la Ĉina-Vietnama Amikeca Popolkomunumo kaj la PLA-anoj, kiuj helpas la komunumon en tritika rikoltado.





"Esti Ĝojaj en Produktado kaj Ĉiam Pretaj al Batalo" — ludaĵo de la Vjetnama Akrobata Trupo.

plugilon en unu mano kaj pafilon en la alia, kaj pretas rebati la malamikojn en ĉiu minuto. La "Gajiga Prezentado" ironie malkaŝis la akrajn kontraŭdirojn inter Usono kaj la pupoj kaj ankaŭ esprimis la sagacon, bravecon kaj revolucian batalspiriton de la kelnerino de la trinkejo por ekstermi jankiojn. Krome, ankaŭ "For Jankiojn", "Gajaj Junuloj en Parko", la intertempa gajiga ludaĵo "Ŝupolurado" k. a. ĉiuj forte spiris batalan spiriton.

Per diversaj prezentartoj la akrobatoj profunde spegulis la reakcian naturon de la usona imperiismo kaj ĝia lakeo — sudvjetnama pupa reĝimo kaj ilian konfuzitecon sub la pezaj batoj de la heroa vjetnama popolo. Tiuj programeroj ekscitis justan malamon kontraŭ la usona imperiismo ĉe la spektatoroj, kaj certigis al ili, ke la usona imperiismo nepre estos elpelita el Vjetnamio.

La membroj de la Vjetnama Akrobata Trupo helpas al la komunumo sunumi maizospikojn.





Finalo — la aktoroj aklamas la venkon, alte tenante la libreton Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong.

Pli Furioze Flamu la Revolucia Fajro

—Omaĝe al la Japana Teatrotrupo Dentrado pro ĝia sukcesa prezentado de la dramo "Sovaĝa Fajro"

EN aŭgusto de 1967, la japana teatrotrupo Dentrado* prezentis, en Pekino, la dramon *Sovaĝa Fajro* kaj rikoltis varman aklamadon ĉe la revoluciaj amasoj de nia lando pro ĝiaj revolucia politika enhavo kaj muĝanta revolucia ribelemo.

Tiu ĉi dramo estas frukto de brava luktado de la batalkamaradoj de la teatrotrupo Dentrado kontraŭ la uson-japana reakciularo kaj la reviziisma renegata kliko de la Japana Kompartio.

La surscenigo de tiu ĉi dramo esprimis la senliman heroan fidelecon de la japana revolucia popolo al la penso de Maŭ Zedong.

Sovaĝa Fajro temas pri la heroaĵoj de la japanaj kamparanoj en Ĉiĉibu-montregiono en sia armita ribelo en la jaro 1884. La batalkamaradoj de Dentrado analizis kaj prezentas tiun historian eventon aplikante marksismleninismon kaj la penson de Maŭ Zedong kaj servas per tio al la nuna politika tasko de la batalo de la japana revolucia popolo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo.

Post la Mejji-renovigo, en la sesdekaj jaroj de la 19-a jarcento, la nove leviĝinta burĝaro starigis, en koluzio kun la malnovaj feŭdaj regantoj, la reĝimon de imperiestra regado, nome mikadan aŭtokration reprezentantan la interesojn de la bienularo kaj la burĝaro. La kruela ekspluatado de la bienuloj kaj kapitalistoj, la diversformaj troŝarĝigaj impostoj de la mikada registaro kaj la pezaj procentegoj de la uzuristoj pelis milionojn da malriĉaj kamparanoj en seneliran mizeregon de bankroto kaj pereo. Por kontraŭstari la ekonomian ekspluaton kaj politikan subpremon fare de la regantaj klasoj, la malriĉaj kamparanoj amase leviĝis kun armilo en la manoj kaj kondukis bravan persisteman batalon kontraŭ la mikada registaro. Dum tiu periodo, en diversaj lokoj de Japanio ĉiujare okazis dekoj da grandskalaj kamparanaj ribeloj kiuj peze batis la regadon de la mikada registaro de Japanio. La kamparana armita batalo de Ĉiĉibu-montregiono en la jaro 1884 estis, en tiu periodo, la plej grandskala kamparana ribelo kiu havis plej profundan influon.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"En klasa socio revolucioj kaj revoluciaj militoj estas neeviteblaj kaj sen ili la salto en socia disvolviĝo ne povas plenumiĝi, la reakcia reganta klaso ne povas esti renversita kaj tiel la popolo ne povas akiri ŝtatpotencon."** Pere de historia evento *Sovaĝa Fajro* aŭtentike manifestis tiun ĉi grandan revolucian penson.

Sub la patronado de la aŭtokratia aparato de la mikada registaro, la grandbienulo, granda kapitalisto kaj gubernia konsilanto Ŝokiĉi en la dramo plej barbare pririabas kaj ekspluatas la bredistojn de silkraŭpoj. Tuj kiam la bredistoj iom lin kontraŭstaras, li venigas solda-

Leviĝintaj en armita batalo la kamparanoj en Ĉiĉibu kaptas Masajoŝi, la grandan bienulon kaj mastron de silk-bobenejo, kiu provas forkuri.



tojn kaj policanojn por ilin subpremi freneze. Kie estas subpremo, tie estas ankaŭ fajrero de kontraŭstaro; ju pli peza estas la subpremo, des pli furioze brulas la kontraŭstara fajro. Tra siaj propraj malfeliĉaj travivaĵoj, la silkraŭpo-bredistoj de Ĉiĉibu-regiono ekvidis la hipokritecon kaj trompecon de la t. n. "Mejĵirenovigo" kaj komprenas, ke ili povos ŝanĝi la maljustan socian sistemon, nur se ili unuiĝos kaj batalados. Sekve, ili leviĝis sub la gvido de Mosuke, la gvidanto de la Partio de Malriĉuloj, komencis batalon kontraŭuzuran, kiu poste disvolviĝis en armitan ribelon kontraŭ la mikada registaro por kapti la regpotencon el la manoj de la regantaro.


Tra la furioza fajro de tiu kamparana armita batalo, *Sovaĝa Fajro* sukcese modlis revolucian heroan figuron de malriĉa kamparano Mosuke, la gvidanto de la ribelo de la Partio de Malriĉuloj. Kun profunda malamo al la bienuloj, kapitalistoj kaj la mikada registaro, tiu ĉi revoluciulo plenas je la revolucia spirito esti kuraĝa ribeli, batali kaj venki. Vizaĝe al la sieĝatako fare de armitaj policanoj, li restas tute sentima, persistas en obstina rezistado kaj frakase draŝas la lakeojn de la kapitalistoj kaj la armitajn policanojn. Kiam li estas arestita, li eksplodas per ridego deklarante militon kontraŭ la reakcia aŭtokratia registaro: "La Partio de Malriĉuloj de Ĉiĉibu timas neniun, nek la mikadon nek la guberniestrajn moŝtojn!" Tiuj heroaj revoluciaj vortoj vivece montras la heroecon kaj revolucian tradicion de la japanaj revoluciaj kamparanoj. En la batalado, Mosuke venas al pli bona kompreno pri la signifo de organiziĝo por depreni la regpotencon per armita batalo. Li do alte levas la ribelan standardon, organizas milojn kaj dekmilojn da malriĉaj kamparanoj kun ĉaspafiloj en batalado por renversi la mikadan aŭtokratian registaron kaj starigi popolan registaron kaj firme decidas "renversi la ĉielon kaj teron" de la mikada registaro, kiu reprezentas la interesojn de la ekspluataj klasoj.


La subjekto-penso esprimita en *Sovaĝa Fajro* kaj la revoluciaj heroaj figuroj Mosuke k. a. servas al stimulado de la revolucia popolo, estas peza bato al la usonjapana reakciularo kaj ankaŭ al la novaj kaj malnovaj reviziistoj.

Per la batalaj heroaĵoj de la membroj de la Partio de Malriĉuloj Mosuke k. a., *Sovaĝa Fajro* manifestas la grandan ideon kapti regpotencon per armita batalo; kaj samtempe ĝi rekte direktas sian kritikan lancpinton al la renegata kliko de Mijamoto per malkaŝo pri la perfido de Seiĝi, membro de la Libera Partio.

Vidu, en la tempo, kiam la Partio de Malriĉuloj lanĉas armitan ribelon, ĝuste tiu membro de la Libera Partio, kiu laŭte kantis pri "Libero" kaj "Popola Rajto", komencas subfosan aktivadon disvastigante argumentojn por "parlamento", "intertraktado" ktp. por tromplogi la revoluciajn amasojn formeti siajn armilojn kaj nuligi la revolucion. Baldaŭ poste, kiam la policanoj de la mikado freneze subpremas la kamparanan ribelon, li tuj ŝtele transiĝas al la malamikoj kaj fariĝas komplico de la aŭtokratia registaro. Komparu la historion kun la aktualaĵoj — ĉu la renegata kliko de Mijamoto, kiu ripetadas la litanion heredi kaj disvolvi la "revolucian tradicion de la Japana Kompartio", ne estas samspecaj ŝakaloj kia Seiĝi?

Kamparanoj de Ĉiĉibu luktas kontraŭ uzuristo kaj akuzas liajn krimojn de kruela ekspluatado.





Kun flagoj de sloganoj: "For la aŭtokratian registaron!" "Fondu registaron liberalan!" "Punu la uzuristojn!" k. a. la kamparanoj de najbaraj vilaĝoj venis amase por manifestacii.

Kiuj oponas perfortan revolucion, oponas deprenon de regpotenco per armitaj fortoj, tromplogas la revolucian popolon formeti siajn armilojn kaj prenas la vojon de "parlamenta batalo" kaj "paca transiro", tiuj estas perfiduloj de la revolucio, plej intrigemaj malamikoj de la proletara revolucia afero. Same kiel Seiĝi en la dramo ili certe estos forĵetitaj kaj kondamnitaj de la revolucia popolo.

La revolucia spirito de la kamparana ribelo de Ĉiĉibu en la historio kaj la revolucia tradicio postlasita de la Partio de Malriĉuloj, kiu lanĉis armitan ribelon por depreni regpotencon, ĉiam stimulados la batalvolon de la japana revolucia popolo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo.

Nuntempe, la japana popolo kun glora tradicio de revolucia batalo estas kondukanta senŝanceliĝan batalon kontraŭ la uson-japana reakciularo, kaj la vere revoluciaj fortoj de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong en la Japana Komunista Partio estas disvolviĝanta kaj potenciĝanta, kaj leviĝas en ribelo kontraŭ la renegata kliko de Mijamoto, la japana revolucia popolo, ĝuste kiel la epilogo de *Sovaĝa Fajro* montras, triumfe marŝas antaŭen sub la direktado de la granda penso de Maŭ Zedong. Jen ŝtormo furiozas, kaj l' maroj muĝas, bolas, la revolucia lavango nepre disfaligos la granitajn blokhaŭsojn de imperiismo, reviziismo kaj la reakciularoj.

* Dentrado *estas revolucia teatrotrupo de Jamaguĉi-gubernio de Japanio, fondita en aprilo de 1952. Ĝi naskiĝis en la patriota batalo de la japana popolo kontraŭ la usona imperiismo kaj plenkreskiĝis en la luktado kontraŭ la uson-japana reakciularo kaj la reviziismaj elementoj de la Japana Kompartio. Sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la trupanoj profundiĝis en la amasojn de laboristoj kaj kamparanoj, pene strebas por remuldi sian ideologion, kreis dramojn plenajn de batalpasio kaj revolucia ribelemo en batalado kune kun la japana revolucia popolo, kaj tiuj verkoj ĝuis varman aklamon ĉe la japana revolucia popolo.*

En la lasta tagdeko de julio, 1967, la japana teatrotrupo Dentrado vizitis Ĉinion kaj faris prezentadon. Sovaĝa Fajro *estas unu el la dramoj luditaj de ili. Dum sia restado en nia lando, la trupanoj avide studadis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj konscience remuldis sian ideologion. Ili decidis marŝadi antaŭen en la direkto montrita de Prezidanto Maŭ en la* Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an.

ĜENMEJ:

Rakontoj pri la Brava Sudvjetnama Popolo en Ekstermo de Malamikoj



SURPRIZATAKO KONTRAŬ MALLIBEREJO POR SAVI LA PATRIOTOJN

La malliberejo de Hoi-an en Quang-nam-provinco estas unu el la plej kruelaj homaj inferoj sub la regado de la pupa kliko de la suda Vjetnamio. Tie estas enfermitaj multaj patriotoj de la Sudo. Jam delonge, la batalantoj de iu trupo de la Liberiga Armeo de la nomita provinco faris firman decidon detrui tiun malliberejon.

Iun nokton de julio 1967, la batalantoj senbrue atingis la frontan pordon de la malliberejo. Subite, eksplodigtuboj forte eksplodis, la baraĵoj ĉiuj forbalaiĝis, la pordo dispeciĝis kaj la tri vicoj da pikildrataj bariloj interne de la pordo estis ankaŭ forĵetitaj. Tuj sekve, per manminoj la batalantoj ekstermis parton da kanajloj gardantaj la malliberejon. Apenaŭ ensturminte la malliberejon, la batalantoj detrancis fajrŝnurojn de minoj enterigitaj de la malamiko sub du vicoj da karceroj. Kiel magiaj sagoj, la kvar sturmtaĉmentoj de la Liberiga Armeo sin ĵetis al la kvar fortikaĵoj ĉe la kvar anguloj de la malliberejo kaj fulmrapide konkeris ilin. Post nur sep minutoj da batalado, ili jam ekstermis ĉiujn malamikojn, kiuj gardas la malliberejon. Samtempe kun tio, alia trupo de la Liberiga Armeo kunagante penetris en la urban centron de Hoi-an kaj atakis la pupajn instituciojn kaj policejojn. Ankaŭ bombojetiloj de la Liberiga Armeo senĉese bombardis la komandejojn de Quang-nam-Da-nang-a Speciala Regiono kaj de la Provinca Sekuriga Trupo. En Hoi-an ĉie tondris surdigaj pafado kaj eksplodado.

Tiumomente, la feraj pordoj de ĉiuj karceroj estis malfermitaj. La patriotoj, kiuj multe suferis kruelan turmenton de la malamiko, denove vidis la helan tagon kaj la longe sopiratan standardon de la Naciliberiga Fronto. En la ĝojbolanta renkontiĝo, ĉiu deziregis manpremi kaj ĉirkaŭbraki siajn intimulojn — la batalantojn de la Liberiga Armeo venintajn por ilin savi post konkero de sennombraj malfaciloj.

Plenuminte la taskon, la batalantoj de la Liberiga Armeo kaj la liberigitaj patriotoj tuj forlasis la malliberejon kaj sekure revenis al la liberiga regiono laŭ pluraj vojoj.

BRAVULOJ DETRUIS TANKOJN


En iu batalo, Ho-tan, vicsubplotonestro de iu trupo de la Liberiga Armeo de suda Vjetnamio, kun kvin batalantoj sub sia gvido sturmis kvin tankojn de la malamiko. Maŝinpafiloj de la malamikaj tankoj pafis kontraŭ ili salvon post salvo, sed Ho-tan kaj siaj batalantoj brave proksimiĝis renkonte al tiuj kolosoj, kaj tiel la maŝinpafiloj perdis sian efikon. Kiam la antaŭiranta tanko arogante alruliĝis kontraŭ ili, Ho-tan rapide decidis unue ruinigi tiun ĉi ferajon. Li lerte sin movis flanken. Pro troa rapideco, la tanko eniĝis en densejon de sukerkanoj. Antaŭ ol la malamiko sukcesis retroigi sian tankon el la densejo, Ho-tan kaj siaj batalantoj jam ĵetis sin al ĝi. Ili deŝiris per dentoj la sekurigan kovrilon de grenadoj kaj rapide ĵetis ilin en la superan aperturon de tiu tanko. La malamikoj en la tanko ekstreme konfuziĝis kaj haste ĝin fermis. Apenaŭ fermiĝis la kovrilo, ektondris terskua eksplodo kaj dense eliĝis nigra fumo. La malamikoj en ĝi estis mortigitaj senescepte. En palpebruma daŭro Ho-tan jam sursaltis la supron de la tanko, li firme tenis sian mitraleton kaj senindulge pafis la malamikojn postsekvantajn la tankon. La malamikoj falis unu post alia kvazaŭ figoj de sur la arbo. Panike ekfuĝis la restaj malamikoj kaj la aliaj 4 tankoj. Ho-tan kaj siaj batalantoj en triumfo persekutis ilin kaj disrompis piedĉenojn de alia tanko.

LERTA EMBUSKO POR KAPTI LA MALAMIKAN ŜIPON

Iun nigran nokton en 1967, gerilanoj de Phung-hiep-gubernio sekrete aranĝis lertan embuskon sur kanaleto de la gubernio al La-ba. Je la mateno de la sekvinta tago, la gerila plotonestro Hoang van Cam laboris kun vilaĝanoj ĉe la bordo. Dum la laborado, li rondire kontrolis la lastnoktan aranĝon kaj trovis ĉion en bonordo.

Tuj poste, la ruĝa suno leviĝis super kokosarbaro de Tra-vinh-regiono. Unu batalboato de la malamiko arogante veturis al La-ba-kazerno. Subite, la flugveturanta boato estis barata, ĝi forte ŝanceliĝis sur akva surfaco kaj abrupte sin puŝis borden. Ĝuste en tiu tempo, ĉe la bordo aperis aro da bravaj gerilanoj kaj sturmis la malamikojn. Kiam la bravuloj alsaltis sur la boaton, la konsternitaj malamikoj falis en ĥaoson kaj ĉiuj estis kaptitaj.

Fakte okazis tiel, ke la geriltaĉmento aplikis tirkablon por embuski la malamikan boaton. Ili starigis po unu palison ĉe ambaŭ bordoj kaj per ili fiksis kablon trans la kanaleton, kaj poste ili embuskiĝis tie. Kiam venis la malamika boato, oni subite strecis kaj surakvigis la kablon. Frapante ĝin, la flugrapida boato tuj perdis sian direkton. Profitante la ŝancon, la gerilanoj lanĉis atakon kontraŭ ĝi. Jen la venko akirita per la lerta rimedo.



La manifestaciantaj junuloj kaj la policanoj kontraŭstaras ekster la konskripcia centralo de la urbo Oakland de Kalifornio, Usono.

BIAN VEN:

La Usona kaj Tutmondaj Popoloj Rigore Kondamnas la Agreson de la Usona Imperiismo en Vjetnamio

PREZIDANTO Maŭ diris: **"La furioza tajdo de la tutmondaj popoloj kontraŭ la usonaj agresantoj estas nehaltigebla." "La usona popolo devas leviĝi por rezisti kontraŭ atakoj de la usonaj reakciuloj. Kaj mi kredas, ke ili tiel faros."** De la dua duono de 1967, en Usono kaj aliaj landoj de la mondo, la revoluciaj popoloj levis altan tajdon de batalo kontraŭ la agreso de la imperiisma Usono en Vjetnamio kaj unuvoĉe krias: Usonaj rabistoj for de Vjetnamio!

La 20-an de oktobro 1967, amasoj en nombro de pli ol cent mil venis de diversaj lokoj de Usono al Vaŝingtono. Kaj la sekvintan tagon, eksplodis en la ĉefurbo de Usono manifestacio de senprecedence granda skalo por oponi la agresan militon kontraŭ Vjetnamio. La manifestaciantaj amasoj ĉirkaŭis la Departementon de Defendo, alte tenante sloganojn, kiaj: Tuj retiru la armeon!" "Ni ne iros al Vjetnamio!" "Vjetnamio apartenas al la vjetnama popolo!" kaj brave batalis kontraŭ la faŝismaj armeanoj kaj policanoj. Ili forte kondamnis la agresan militon irigatan de Johnson-registaro, la konskripcian sistemon kaj Pentagonon, la militaparaton de la usona imperiismo.



En Boston, Usono, junuloj kolektive ruligas siajn konskripciajn kartojn proteste al la agresa milito de la usona registaro kontraŭ Vjetnamio.

Vizaĝe al la senĉesa leviĝado de la furioza tajdo de la usona popolo kontraŭ la agresa milito en Vjetnamio, la Johnson-registaro tute konsterniĝis kaj morte teruriĝis. Antaŭ la eksplodo de tiu manifestacio, la usona aŭtoritato jam alprenis diversajn paŝojn de subpremado kaj tute forĵetis la figfolion de "demokratio" kaj "libero" fanfaronataj de Johnson. Ĝi postulis unuflanke, ke la senato kaj la ĉambro de deputitoj urĝeme pasigu en la 19-a de oktobro novan leĝprojekton por malpermesi manifestacion en la domo de la parlamento, kaj, aliflanke, alvenigis ses mil paraŝutistojn kaj grandnombrajn ĝendarmojn kaj policanojn el Kalifornio kaj aliaj lokoj, je miloj da kilometroj for, por subpremi manifestaciantajn amasojn. El kvardek pordoj de Pentagono nur unu estis malfermita por trairo. Krom tio, ĝi havis ankoraŭ pli ol 20,000 armeanojn en la bazlokoj apud Vaŝingtono je sia dispono por subpremi manifestaciantojn.

Kvankam la faŝismaj armeanoj kaj policanoj furioze subpremis ĉe Pentagono manifestaciantojn, kruele batante ilin per bastonoj kaj uzante larmigan gason, kaj arestis pli ol 350 homojn, sed la manifestaciantaj amasoj tute ne timis, kaj multaj el ili ĵetis botelojn kaj ladskatolojn al fenestroj de Pentagono. Parto de la amasoj trudiĝis en Pentagonon tra la sola neŝlosita pordo kaj intense batalis kontraŭ armeanoj kaj policanoj en la koridoroj. Kiam venis la nokto, la sieĝantaj manifestaciantoj bruligis kampfajrojn, en kiuj junuloj forbruligis siajn konskripciajn kartojn. Okcidentaj novaĵ-agentejoj informis, ke "la situacio restas ankoraŭ tre streĉa".

Nuntempe, leviĝas ĉiam pli multe da usonaj popolanoj por partopreni la batalon kontraŭ la usona imperiismo kaj hurlas ke "nur Johnson estas nia malamiko", direktante la lancpinton de la batalo rekte al la krimega Johnson-registaro.

La popoloj de diversaj landoj en la mondo same hurlas kolere kontraŭ la usona imperiismo! La popoloj de Cejlono, Kongolando (B.), Britio, Okcidenta Germanio, Danlando, Svedio, Norvegio, Novzelando, Aŭstralio, Kanado k. a. sinsekve manifestaciis kaj kunvenis lastatempe por forte protesti kontraŭ la agreso fare de la usona imperiismo en Vjetnamio kaj subteni la justan nacisavan militon de la vjetnama popolo kontraŭ la usona

imperiismo. De la 19-a de oktobro 1967 japanaj fervojistoj ekrifuzis transporti benzinon al la bazlokoj de la usona armeo. Per tio ili donis fortan baton al la agresa milita politiko de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio.

La 21-an de oktobro 1967, ĉirkaŭ du mil membroj de la Cejlona Federacio de Laboristaj Sindikatoj okazigis mitingon kaj manifestacion en Kolombo. N. Sanmugathasan, membro de la Politika Buroo kaj sekretario de la sekretariejo de la Cejlona Komunista Partio, faris paroladon, en kiu li montris, ke en la brava naciliberiga batalo de Vjetnamio oni ricevis du lecionojn. La unua estas tio, ke en la batalo kontraŭ la ĉefaj malamikoj — imperiismo kaj la reakciuloj, oni devas unuiĝi kun ĉiuj fortoj, kun kiuj oni povas unuiĝi. Tio estas tre grava. La alia estas tio, ke oni povas sukcese konduki militon kontraŭ la usona agreso, se oni faras popolan militon, tute egale, kiel ajn malgranda estas la lando.

Vespere de la 15-a de oktobro 1967, la junulara organizo de la Tutlanda Revolucia Movado de Kongolando (B.) kunvenis por forte kondamni la agreson de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio kaj firme subteni la justan nacisavan militon de la heroa vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo.


En la 22-a de oktobro 1967, pli ol 6,000 manifestaciantoj de la urbo Londono venis al la usona ambasadorejo. Centoj da britaj policanoj, inkluzive de multaj rajdantaj policanoj, barbare atakis la pacajn manifestaciantajn amasojn. Pro tio la manifestaciantoj heroe rebatis ilin per ŝtonoj.

En la Okcidenta Germanio, hamburgaj manifestaciantoj bruligis paperan tigron, kiu simbolis la usonan imperiismon. En Munĥeno kaj aliaj pli ol dek urboj, multaj junuloj, lernantoj kaj urbanoj proteste manifestaciis.

La 21-an de oktobro 1967, pli ol dek mil popolanoj de Danlando faris manifestacion en la ĉefurbo Kopenhago, proteste al la agreso de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio.

Ankaŭ la popoloj de Svedio, Novzelando, Aŭstralio, Norvegio, Kanado k. a. sinsekve kunvenis aŭ manifestaciis por protesti kontraŭ la krimo de agreso fare de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio.

En 21 okt. 1965, eksplodis senprecedence granda manifestacio en Vaŝingtono, la ĉefurbo de Usono, kontraŭ la agresa milito en Vjetnamio. La manifestaciantoj el diversaj lokoj de Usono inkluzive Texas en sudo kaj Ĉikagon en nordo marŝas senfine al la Pentagono.





La manifestaciantoj oponantaj la agresan militon de Usono en Vjetnamio luktas heroe kontraŭ la ĝisdente armitaj policanoj.

Dum la manifestacio en novembro 1967, la gestudentoj de la ŝtata kolegio de San Jose, Kalifornio, Usono, forbruligis pajlan homon kun tri kapoj, la meza reprezentas la ĉefon de la usona imperiismo Johnson, la maldekstra la Dow-an Kemian Kompanion kaj la dekstra la reakcian armeon.



Kiu "Intence Malbonigas la Rilatojn inter la Du Landoj"?

— *Refuto al la Indoneziaj Reakciuloj*

FARINTE serion da barbaraj perfortaĵoj, la faŝisma militista kliko de Indonezio, estrata de Suharto-Nasution, impertinente postulis per noto, la 9-an de oktobro 1967, ke Ĉinio fermu siajn ambasadorejon kaj konsulejojn en Indonezio kaj retiru sian tutan diplomatian personaron. Sed, ĝi imputis sian krimon al Ĉinio, kriante ke Ĉinio "intence malbonigas la rilatojn inter la du landoj". Tio estas simple kriado de ŝtelisto pri ŝtelisto — senhonteco ĝis ekstremo!

La stato, ke la rilatoj inter Ĉinio kaj Indonezio malboniĝis ĝis tia grado, estas kaŭzita tute de la reakcia indonezia registaro solflanke. Post la kontraŭrevolucia ŝtatrenverso en oktobro de 1965, la faŝisma militista kliko de Indonezio jam laŭplane levis multfoje furiozajn tajdojn de perfortaj agoj kontraŭĉinaj kaj ĉinekskluzivaj. Ĝi funkciigis landskale sian propagandan maŝinaron por fari malicajn kalumniojn, klaĉojn kaj atakojn kontraŭ la Ĉina Popola Respubliko kaj Prezidanto Maŭ, la plej estimata kaj amata granda gvidanto de la ĉina popolo. Ĝi 43 fojojn elsendis grandnombre armitajn armeanojn, policanojn kaj perfortulojn por barbare ataki niajn diplomatiajn institucioj en Indonezio, kaj pro tio sume ĉ. 70 ĉinaj diplomatoj estis kruele batitaj kaj pafitaj. La indoneziaj reakciuloj kontraŭleĝe okupis 13 oficejojn kaj loĝejojn de niaj diplomatiaj institucioj, armite blokadis nian ambasadorejon, trancis al nia ambasadorejo ĉiun telekomunikon kun nia registaro, ĉesigis al ĝi la provizadon de akvo, elektroenergio kaj gaso, malhelpis niajn vunditojn iri al hospitalo por kuraciĝi kaj senbride atencis la diplomatiajn privilegiojn de niaj diplomatiaj institucioj. Ili praktikis senhomecan rasisman persekutadon kontraŭ la grandnombraj patriotaj ĉinaj elmigrintoj en Indonezio, forbruligis iliajn domojn, rabis iliajn posedaĵojn, detruis iliajn butikojn, fermis milojn kaj milojn da ĉinaj elmigrintoj en koncentrejojn kaj malliberejojn kaj masakris multe da ĉinaj elmigrintoj. La reakcia indonezia registaro senbride tretis la minimuman normon de internacia rilato kaj faris maloftajn faŝismajn perfortaĵojn en la historio de internacia rilato. Indoneziaj reakciuloj, viaj sangaj ŝuldoj estas tro multaj kaj viaj krimoj tro evidentaj. Kiel vi povas ilin malkonfesi?

Krome, la reakcia indonezia registaro ankaŭ publike koluzias kun Ĉiang Kajŝek, la politika kadavro delonge forkraĉita de la ĉina popolo. Kiel malkaŝite, en sia revenvojo de Usono al Djakarta, Malik, la ministro de eksteraj aferoj de Indonezio, "intervidiĝis" en Hongkongo kun iu Ĉiang Kajŝek-ano Ma Ŝuli kaj deklaris, ke "Indonezio povas konsideri agnoskon al ĝi, se Tajvan nomos sin Tajvana Respubliko". Ĉu tio ne estas fera pruvo ke la indonezia registaro intence malbonigas la rilatojn inter Ĉinio kaj Indonezio kaj koluzias kun la bandita kliko de Ĉiang Kajŝek?

Estas ĝuste tiu Malik, kiu kiel reprezentanto de la reakcia registaro de Indonezio sekrete interparolis kun la ŝtata sekretario de Usono Rusk kaj la ministro de eksteraj aferoj de Sovetunio Gromiko en Novjorko, kaj malpacience kriaĉis, post sia reveno, dum sia akcepto al la ĉefoj de la perfortuloj atakintaj la ĉinan ambasadorejon: "Ni direktos nin al rompo de la interrilatoj (kun Ĉinio)." Tuj poste la sama Malik diris al la ĵurnala rondo de Djakarta: "Tio, pri kio ni nun klopodas, estas rompi la interrilatojn (kun Ĉinio)." Krome, li ankoraŭ konfesis, ke "la rompo de la interrilatoj (kun Ĉinio) komenciĝis de la 24-a de aŭgusto (1967), kiam la indonezia registaro revokis sian personaron el Pekino."

Tiuj faktoj montras, ke, kiu "intence malbonigas la rilatojn inter la du landoj", estas neniu alia ol la reakcia indonezia registaro mem!

La frenezaj kontraŭĉinaj agadoj kaj detruado de la rilatoj inter Ĉinio kaj Indonezio, fare de la indoneziaj reakciuloj, estrataj de Suharto-Nasution, estas deciditaj de ilia reakcia klasa naturo kaj estas nepra rezulto de la naciperfida, diktatura, kontraŭkomunisma, kontraŭpopola kaj kontraŭrevolucia politiko praktikata de la faŝisma militista kliko el plenmano da personoj.

Tiu ĉi faŝisma militista kliko estas la ĝenerala reprezentanto de la feŭda bienularo kaj burokrata-kompradora burĝaro de Indonezio, la plej putra, plej kruela kaj plej reakcia forto kaj la revolucian popolon buĉanta ekzekutisto. Post sia enpotenciĝo, ĝi tuj faris grandskalajn arestojn kaj buĉadojn kaj lavis per sango la landon de mil insuloj. Ĝi ĝismedole ekspluatas kaj plej kruele prirabas la indonezian popolon, dronigante la lastan en senfundan abismon de suferoj. Por forturni la atenton de la popolo enlande, la indonezia reakcia registaro klopodas sin helpi per kontraŭĉina kaj ĉinekskluziva agado.

Tiu ĉi faŝisma militista kliko estas centprocenta naciperfidulo kaj fidela buldogo, nutrata de la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj reviziistoj. Ĝia faŝisma reĝimo estas ja starigita en la kontraŭrevolucia milita ŝtatrenverso planita de la usona imperiismo. Post sia enpotenciĝo, ĝi tuj aŭdace aŭkciis la sendependecon kaj suverenecon de Indonezio kaj almozis dolarojn de la usonaj imperiistoj kaj rublojn de sovetuniaj reviziistoj. Ĝi pliintensigis



La gvidantoj kamaradoj de CK de KPĈ Ĝoŭ Enlaj kaj Kang Ŝeng intime konsolas kamaradon Huang Venŝeng, la Aferŝargiton de la Ĉina Ambasadorejo en Indonezio, k. a., kiuj glore revenis al Pekino en 1967 per speciala aeroplano.


sinforvendon al la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj reviziistoj kaj pro tio certe fariĝas kontraŭĉina peono de la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj reviziistoj.

La nuna ĉiam pli furioza kontraŭĉina agado de la indoneziaj reakciuloj estas subinstigita de la usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo, kiel parto de la kontraŭĉina tajdo levita lastatempe de la lastaj en Azio. Ju pli freneze oponas kontraŭ Ĉinio la reakcia indonezia registaro, des pli aktive la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj reviziistoj transigas sangon al la reakcia indonezia registaro kaj kuraĝigas ĝin. La usonaj imperiistoj jam promesis pruntdoni al la indoneziaj reakciuloj 80, 00,0000 dolarojn en la kuranta jaro. Ankaŭ la sovet-

En 15 aprilo 1966, la indonezia armita trupo en koluzio kun dekstraj perfortuloj puŝmalfermis per kirasaŭto la pordegon de la ĉina ambasadorejo por ĝin ataki.



En iu ĉambro de ĉina ambasadorejo detruita de la dekstraj perfortuloj de Indonezio.





Nia Gazeto en la Nova Jaro

Kara amiko:

En la tempo, kiam nia popolo venke antaŭeniras fendante ondojn sub favora vento laŭ la vojo de la granda proleta kultura revolucio, malfermita de Prezidanto Maŭ, venas la nova jaro. Ni sendas al vi kaj niaj legantoj varmajn festotagajn gratulojn!

Antaŭvespere de la novjaro, ni ĝoje ricevis de vi kaj multaj el niaj legantoj leterojn, en kiuj estas esprimataj per tre sinceraj, varmaj kaj belaj vortoj viaj gratuloj pro la nuna ĉiumonata aperado de nia gazeto kaj laŭdoj pri ĝi kiel la "plej bela kaj plej plaĉa esperanta gazeto." Tiuj leteroj alte taksas nian laboron plenumitan laŭ la plej alta instrukcio de Prezidanto Maŭ pri esperanta laboro **"preni Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucian"**, tutkore gratulas nin pro la atingoj de nia gazeto en propagando de la penso de Maŭ Zedong, en diskonigado de la vero pri nia granda proleta kultura revolucio kaj de niaj sukcesoj en ekonomio, scienco, kulturo kaj aliaj kampoj en la socialisma konstruado, kaj en subteno al la bataloj de la revoluciaj popoloj de la mondo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, precipe al la nacisava batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo.

Tiuj leteroj laŭdas ankaŭ la rolon de EPĈ en pliriĉigo kaj disvolvo de Esperanto. Ni kore dankas vin kaj ĉiujn niajn amikojn pro la kuraĝigo kaj subteno al nia laboro.

Ĉar vi kaj multaj legantoj montras ankaŭ grandan intereson pri nia plano de plibonigo de la gazeto en la nova jaro, ni kaptas la okazon iom paroli sube pri tiu temo.

En 1968, ni daŭrigos nian propagandon pri la penso de Maŭ Zedong, informadon pri la granda proleta kultura revolucio de nia lando, kaj aktivan subtenadon al la revoluciaj bataloj de la tutmondaj popoloj kaj samtempe dediĉos sufiĉan spacon por raporti pri la stato kaj atingoj de niaj ekonomia konstruado, kulturo kaj edukado, literaturo kaj arto, k. a. Krome, ni faros pluan klopodon por plibonigi la kolorajn bildpaĝojn, ilustraĵojn kaj presartajn araĝojn.

En la venonta jaro, ni enkondukos kaj reaperigos jenajn rubrikojn: "La Monda Popolo Varme Amas Prezidanton Maŭ", "Letero al Malproksimaj Amikoj", "Inter Ni", "Tra la Mondo", "Enciklopedieto" kaj "Post la Kurso". En la rubriko "La Monda Popolo Varme Amas Prezidanton Maŭ" vi legos kiel la popolanoj de diversaj landoj varme amas Prezidanton Maŭ kaj la penson de Maŭ Zedong. "Letero al Malproksimaj Amikoj" respondos al demandoj, pri kiuj la legantoj havas komunan intereson. Por doni pli da informoj internaciaj ni malfermos novan rubrikon "Tra la Mondo", sub kiu ni kunmetos koncizajn informojn internaciajn. "Enciklopedieto" enhavos novajn esperantajn vortojn kaj esprimojn, kiujn ni uzas por signi ĉinajn aferojn. Legaĵojn facilajn kaj signifohavajn, kiuj taŭgas por komencantoj, oni trovos sub la rubriko "Post la Kurso".

Pri niaj intencoj supre diritaj, kara amiko, ni ŝatus aŭdi de vi el viaj venontaj leteroj. Por plibonigi nian gazeton, viaj subtenoj, kritikoj kaj proponoj kaj tiuj de aliaj amikoj estas ĉiam sincere deziratajn. Ni, niaflanke, faros ĉion eblan por fari nian gazeton pli plaĉa.

Ni deziras al vi progreson en la nova jaro!

La Redakcio

---

uniaj reviziistoj konsentis al ĝi prokrasti la repagon de la grandnombra ŝuldo de 1,200,000,000 dolaroj kune kun la interezo. Krome, la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj reviziistoj ankoraŭ senĉese liveradas al la indoneziaj reakciuloj militajn "helpojn". La detruo de la diplomatia interrilato inter Ĉinio kaj Indonezio fare de la lasta konformas al la bezonoj de la unuaj.

La indonezia faŝisma reĝimo starigita sur sanga regado estas ekstreme malstabila. Enlande ĝi alfrontas seriozajn krizojn en politiko kaj ekonomio kaj, ĉirkaŭate de sennombraj malfaciloj, ĝi ne estas certa pri sia sorto eĉ ĝis la nokto, kvazaŭ homo sidanta sur vulkano. Ĝi vivas tute el la apogo de la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj reviziistoj kaj ankaŭ tutforte altiras al si la plej putrajn kontraŭrevoluciajn feĉaĵojn, kiaj la bandita kliko de Ĉiang Kajŝek en Tajvan kaj Rahman-kliko de "Malajsio", por subteni sian kuraĝon. Ĝi timas ĝismorte la revolucian Ĉinion kaj rigardas ĝin kiel pintaĵon en la okulo kaj dornon en la karno; pro tio ĝi intence detruas la diplomatian rilaton inter Ĉinio kaj Indonezio. Kaj tio ĝuste montras ĝian malfortecon.

La kontraŭĉinaj kaj ĉinekskluzivaj agadoj de la faŝisma militista reĝimo de Suharto-Nasution prezentas nur tre malgrandan kontraŭfluon en la bonega situacio de la mondo. Ĝia oponado kontraŭ Ĉinio estas kvazaŭ klopodo de formiko, kiu provas skui grandan arbon ne pritaksante sian propran forton. Ĝi penas akiri premiojn de la usonaj imperiistoj kaj sovetuniaj reviziistoj per la rompo de la diplomatia interrilato kun Ĉinio, sed per tio ĝi povas neniom malutili al la granda Ĉina Popola Respubliko, nek iel bari la brilegon de la penso de Maŭ Zedong. Kontraŭe, en tio la arogantaj klaŭnoj Suharto kaj Nasution nur pli radikale malkaŝis sian naciperfidan vizaĝon, ili certe spertos tion "levi ŝtonegon kaj ĝin faligi sur siajn proprajn piedojn". **(VEJ HUAJAN)**



La Ruĝarmea Ponto

Antaŭe, la Ĉina Popola Liberiga Armeo estis nomata Ruĝa Armeo, kaj ĉiuj malriĉaj laboristoj kaj kamparanoj tre varme amis ĝin, dum la riĉaj bien-uloj*, la fi-oficistoj kaj kuomintangaj* rab-istaj armeanoj sentis kontraŭ ĝi kaj malamon kaj timon eĉ je nura mencio de ĝia nomo. En iu printempo, parto de la Ruĝa Armeo venis al iu vilaĝo. Aŭdinte ĝian al-proksim-iĝon, la riĉaj bienuloj kaj kuomintangaj armeanoj en la vilaĝo teruriĝis kvazaŭ musoj je ekvido de kato kaj tuj for-kuris kun tim-tremo. Timante persekutadon de la Ruĝa Armeo, ili detruis la ponton super la rivero apud la vilaĝo ĉe sia for-kuro. Sed tio ne povis bari la Ruĝan Armeon. La ruĝarmeanoj trans-vadis* la riveron kaj marŝis en la vilaĝon, kaj ĉiuj kamparanoj varme ĝin bon-ven-igis. Iu avo diris plende: "Kamaradoj! Nun estas ĝuste la tempo por plugado*, sed la blankaj hundaĉoj detruis la ponton! Kia malfeliĉo por la popolo!" Tiam la popolanoj kutime nomis la kuomintangajn armeanojn "blankaj hundaĉoj". La batalion-estro* de la Ruĝa Armeo diris al la avo, premante lian manon: "Trankviliĝu, avo, la Ruĝa Armeo ĝin rekonstruos por vi!"

En la sekvinta tago, la batalionestro iris kun siaj batalantoj por rekonstrui la ponton helpe de floso*. Tre energie la ruĝarmeanoj laboris. Iuj hakis*, aliaj segis* kaj triaj en-batis najlojn*. Apenaŭ pasis unu tago, kiam estis konstruita ponto larĝa kaj alta. Jen, la kamparanoj, kiuj revenis hejmen vespere post kamplaboro, rimarkis ke ponto jam estas preta! Ili ĉiuj diris admire: "Ho, dia armeo ja estas la Ruĝa Armeo!"

Ne longe poste, la Ruĝa Armeo devis for-marŝi; sed la kamparanoj tre bedaŭris ĝian foriron. La batalionestro diris al ili: "Iam ni ankoraŭ revenos. Nu, prenu la ponton kiel memor-aĵon!" La kamparanoj adiaŭis la Ruĝan Armeon kaj nomis la ponton Ruĝarmea Ponto.

Post la foriro de la Ruĝa Armeo, revenis la malbonuloj. La du bienuloj, kiuj iris en la fronto, ekmiregis vidinte la novan ponton super la rivero: "Kio? Kiel rapide estas konstruita nova ponto!" Ili faris kelkajn paŝojn antaŭen kaj vidis en la mezo de la ponto tabulon kun la surskribo "Ruĝarmea Ponto". Ili teruriĝis de la nomo de la Ruĝa Armeo kaj ek-glitis*. "Pum! Pum!" — ambaŭ falis en la riveron. La aliaj aĉuloj ne komprenis, kio okazis efektive, kaj pensis, ke la Ruĝa Armeo certe faris ruzan aranĝon sur la ponto. Ili ektimegis kaj petis la blankajn hundaĉojn malkonstrui la ponton en la posta tago.

La kamparanoj en la vilaĝo baldaŭ informiĝis pri ilia intenco. "La ponton konstruis por ni la Ruĝa Armeo," ili diris. "Ni nepre gardos ĝin kaj ne lasos la blankajn hundaĉojn ĝin malkonstrui." Ili elpensis saĝan rimedon. Tiu-nokte, kelkaj junuloj ŝtele iris sur la ponton kaj eltiris ĉiujn najlojn, tiel ke la tabuloj sur la ponto fariĝis moveblaj.

La sekvantan matenon, la blankaj hundaĉoj efektive venis al la ponto por ĝin malkonstrui. Apenaŭ la antaŭiranta aĉulo surpaŝis la ponton, la pied-premita tabulo tuj falis sub lia pezo, resaltigante sian alian finon. "Pum!" — la aĉuloj falis en la fluon kun la kapo malsupren. Kaj la resaltanta tabulo brue frapis kaj vundis la kapon de la postiranta. Tiam ek-aŭd-iĝis ĝoj-krioj en la vilaĝo. Pensante ke la Ruĝa Armeo revenas, la blankaj hundaĉoj kuris for kaj ne plu kuraĝis malkonstrui ponton.

Nia Vortareto

bataliono —parto de armeo, konsistanta el 2 aŭ 4 rotoj

bieno — kamp-ara ter-posedaĵo

floso — kunligaĵo da arbaj trunkoj povanta resti sur akvo

gliti — perdi star-econ paŝante sur glata supraĵo

haki — frapi por tranĉi per batoj de peza ilo nomata hakilo

kuomintango — la partio de Ĉiang Kajŝek

najlo — pinta fera baston-eto por malebligi movon de aĵo

plugi — tranĉi kaj turni teron en kampo antaŭ semado

ponto — konstruaĵo, kiu ebligas iradon trans rivero

segi — tranĉi malmolaĵon per dentum-ita tranĉilo nomata seg-ilo

vadi — pied-iri en akvo



VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ESTAS NEPRA NUTRAĴO

Estas por mi granda ĝojo skribi al vi tiun ĉi leteron. Antaŭ ĉio mi devas esprimi al vi mian koran dankon pro tio, ke via gazeto EL POPOLA ĈINIO ne nur multe interesigas min, sed ankaŭ ĉiam donas al mi grandan vivforton kaj esperon. Kiam mi legas ĝin, mi sentas min ĝojplena kun admiro, kiel forta kaj granda estas la ĉina popolo armita de la penso de Prezidanto Maŭ Zedong.

Jam delonge mi forte deziradis havi *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj hodiaŭ mi ja akiris ĝin, senpacience atendatan. La ruĝkovritan ĉarman libreton mi karesis iom da momentoj kaj tuj eklegis, forĵetante ĉion alian. Kvankam mi legis ankoraŭ nur malgrandan parton de ĝi, tamen la vortoj de Prezidanto Maŭ profundiĝis en mi kun plena kortuŝeco. De nun mi ĉiam portos ĝin kun mi kaj ĉie ajn sengene gustumos kiel nepran nutraĵon.

OZEKI TOYOTA, **Japanio**

NUR EL VIA GAZETO NI POVAS SCIIĜI PRI LA VERO

Mi multe ĝojas, sciinte ke la gazeto EL POPOLA ĈINIO nun aperas ĉiu-monate.

Pli malfaciliĝas por viaj anglaj samideanoj scii, kio okazas en via lando. Niaj ĵurnaloj tute presas troigantajn kaj nekredeblajn raportojn, kaj nur el via gazeto ni povas sciiĝi pri la vero.

Mi bonkore salutas vin kaj deziras al la proleta kultura revolucio plej grandajn sukcesojn.

G. F. C., **Britio**

MI NE NUR EKZERCAS MIN EN ESPERANTO, SED ANKAŬ SCIIĜAS PRI PROGRESO DE LA NOVA ĈINIO

Miaj lernantoj bezonas praktikon en Esperanto. EL POPOLA ĈINIO estas bone presita gazeto kun bonkvalitaj paperoj. Oni povas uzi ĝin por instruado, kaj ĝi estas facillegebla por komencantoj.

Unuvorte, ĉio pri la nova Ĉinio plaĉas al mi. El la esperanta gazeto de la nova Ĉinio, mi ne nur ekzercas min en Esperanto, sed ankaŭ sciiĝas pri progreso de la nova Ĉinio. Mi loĝas en la centra parto de Usono kaj nia popolo interesiĝas pri tio, kio okazas en la mondo kaj Azio.

Leganto el Usono

MI ĈIAM ĜOJAS PRO VIAJ SUKCESOJ KAJ ATINGOJ

... Kara redakcio, kun granda intereso mi observas situacion en via lando. Min tre interesas la granda popola Ĉinio, vivo, sukcesoj. Mi ĉiam interligiĝas kun via popolo koron kun koro. Mi ĉiam ĝojas pro viaj sukcesoj kaj atingoj. Mi ĉiam revas, ke mi vidos vian belan landon, vian grandan popolon, viajn atingojn. ... Mi propagandas vian landon, viajn sukcesojn inter miaj kolegoj, donas al ili legi vian EL POPOLA ĈINIO kaj viajn belajn bildkartojn, kiujn mi ricevis de vi. Mi amikiĝas kun kelkaj esperantistoj, al kiuj mi ĉiam donas vian gazeton.

Mi tutkore salutas vin, vian grandan popolan Ĉinion, junularon kaj deziras al vi kaj via popolo ankoraŭ pli grandajn sukcesojn, ankoraŭ pli grandajn atingojn.

Vivu granda popola Ĉinio!

Vivu amikeco kaj frateco inter la granda ĉina popolo kaj pola popolo!

Ankoraŭfoje mi kore salutas vin ĉiujn kun estimo kaj respekto.

Z. S., **Pollando**





LA JAPANA POPOLO OPONAS LA SERVADON DE EISAKU SATO AL LA USONA IMPERIISMO

Lastatempe, Eisaku Sato, ĉefministro de la japana reakcia registaro, faris en Azio kaj la pacifika regiono multe da kontraŭrevoluciaj fiagoj. De la 8-a ĝis la 21-a de oktobro, 1967, li vizitis sinsekve Indonezion, Aŭstralion, Novzelandon, Filipinan Respublikan kaj la sudan Vjetnamion por krimaj komplotoj. Manovraĉante inter sia mastro kaj ties lakeoj kaj agante kiel ĉefmastrumanto de la usona imperiismo en Azio Sato energie aktivadis kontraŭ Ĉinio, rekte enmiksiĝis en la usonan agresmiliton kontraŭ Vjetnamio kaj konspiris kun la reakciuloj de Azio kaj la pacifika regiono por subpremi la revolucian batalon de la aziaj popoloj.

Por oponi la kontraŭrevolucian vizitadon fare de Sato al diversaj lokoj de Azio, kaj precipe lian viziton al la pupa kliko de la suda Vjetnamio, miloj da junaj bravaj lernantoj de Japanio disvolvis tre akran luktadon kontraŭ la plene armitaj japanaj reakciaj policanoj kaj soldatoj en Tokia Aerodromo, je la 8-a de oktobro. Ne timante sangan subpremon de la reakciuloj, la patriotaj lernantoj kun malplenaj manoj sturmis al la plejfronto kontraŭ Usono. La papera tigro Eisaku Sato potenca nur aspekte povis fari nenion finfine ol ŝtele forfuĝi per aviadilo sub la ŝirmo de policanoj.

La batalo de la japanaj junuloj stimulis la batalvolon de la japana popolo kaj donis fortan baton al la usonjapana reakciularo.

Sekve de tio, la tokiaj progresemaj grupoj, patriotoj en diversaj rondoj kaj la revoluciaj popolanoj en ceteraj lokoj de Japanio unuj post aliaj okazigis mitingojn, manifestaciis kaj publikigis deklarojn por kondamni la faŝismajn krimagojn de la Sato-registaro, ke ĝi sendis policanojn kaj soldatojn por subpremi la patriotajn lernantojn kaj esprimas sian decidon konduki la patriotan batalon ĝis la fino.

LA ARABA PUBLIKA OPINIO KONDAMNAS LA USONAN IMPERIISMON PRO ĜIA MUNICILIVERO AL ISRAELO

Oficiala parolanto de la Unuigita Araba Respubliko kaj la publika opinio en iuj aliaj arabaj landoj kondamnis la usonan imperiismon pro tio, ke ĝi denove komencis la liveradon de municio al sia agresa instrumento, Israelo, kaj samtempe kondamnis la novan agreson bombardi la urbon Suezo fare de Israelo. La oficiala parolanto de UAR montris, ke la militaj provokoj kaj militkrioj de Israelo sendube devenis de aŭ almenaŭ estas instigitaj de Vaŝingtono. La ĵurnalo *Al-Baath* de Sirio kritike montris, ke Usono provizis municion al Israelo por ke la lasta plenumu la planon de imperiismo, cionismo. La ĵurnalo *Al-Thawrah Al-Arabiyah* de Irako avertis Israelon, ke la arabaj popoloj firme decidis rezisti la agreson kaj estas pretaj doni lecionon al la malamiko.

LA "VARMA LINIO" INTER SOVETUNIO KAJ BRITIO EKFUNKCIAS

Je la 24-a de oktobro, 1967 ekfunkciigita estas la "varma linio" instalita de la sovetunia reviziisma gvidanta kliko kaj la brita imperiismo por fari la rektajn kaj sekretajn politikajn negocojn. Per tiu ĉi linio, kiu ligas la domon de la ĉefministro de Britio kun Moskva Kremlo, ambaŭ flankoj povas rekte interparoli aŭ kontaktiĝi per teleskribmaŝino.

Tio ĉi estas la tria "varma linio" starigita de la sovetunia reviziisma kliko kun la okcidentaj imperiismaj landoj.

MCNAMARA EKSIĜIS

Kiam la usona imperiismo havas nenian elirejon en sia agresmilito kontraŭ Vjetnamio kaj sin trovas en la senprecedence intensigita kverelado inter la regantaj grupoj, McNamara, fifama milita kolportisto kaj ministro de la Departemento de Defendo de Usono, forlasis sian oficon. Dum sia preskaŭ sepjara servo McNamara naŭ fojojn iris al suda Vjetnamio kaj faris planojn por la agresmilito de la usona imperiismo tie. Li plenenergie praktikis la duoblan kontraŭrevolucian politikon de "milita eskalado" kaj "pacdevigo per bombado". Sed sub la morta bato de la heroaj armeo kaj popolo de Vjetnamio la usona imperiismo trafis malvenkon unu post alia. Johnson estis devigita eksigi McNamara por mildigi la internan malpacon kaj sin savi el la fiasko en la agresa milito kontraŭ Vjetnamio.

1968

Progreson

en la Nova Jaro

REDAKCIO DE EPĈ



BKR estas mallongigo por "batalo, kritiko kaj reformo", la bazaj taskoj de la nuna granda proleta kultura revolucio en Ĉinio, nome: batali kontraŭ la potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon ĝis ilia kolapsiĝo, kritiki la reakciajn burĝajn akademiajn "aŭtoritatulojn", kritiki la ideologion de la burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluataj klasoj kaj reformi edukadon, literaturon kaj arton kaj ĉiujn aliajn partojn de la superstrukturo, kiuj ne respondas al la socialisma ekonomia bazo por faciligi la firmigon kaj disvolvadon de la socialisma sistemo.

Kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon estas la fundamenta programo de la granda proleta kultura revolucio, elmetita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Kontraŭbatali egoismon signifas batali kontraŭ "egoismo" en la propra kapo per marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong. Kritiki reviziismon signifas oponi kontraŭ reviziismo kaj batali kontraŭ plenmano da potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon per marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong.

Tri malnovaj artikoloj aŭ **tri popularaj artikoloj** estas la komuna, intima nomo donita de la popolamaso al la tri brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*, *Memore al Norman Bethune* kaj *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*, en kiuj li pritraktas tri bazajn demandojn nepre solvendajn por revoluciuloj, t. e., ili devas posedi la spiriton tutkore servi al la popolo, la spiriton de proleta internaciismo kaj la spiriton superi ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon. Tial, tiuj tri artikoloj fariĝis materialo, kiun ĉiu revoluciulo devas studi dum sia tuta vivo.

Sur la kovrilo

La tutmondaj revoluciaj popoloj senlime amas Prezidanton Maŭ kaj liajn verkojn. Ĉiam pli multaj revoluciaj popolanoj nun diligente studas la penson de Maŭ Zedong. Sekvu Maŭ Zedong por ĉiam revolucii; sekvu Maŭ Zedong por plene ruĝigi la mondon. Kun senlimaj adoro kaj estimo al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la revoluciaj laboristoj de la Fremdlingva Presejo en Pekino aktive faras sian kontribuon por tutmondaj revoluciaj popoloj en zorgema presado de la fremdlingvaj eldonoj de la verkoj de Prezidanto Maŭ por dissemi la grandan penson de Maŭ Zedong.

Sur la dorskovrilo

La proletaj revoluciuloj kaj revoluciaj amasoj de la Traktora Fabriko "Unua de Julio" de Ŝanhajo, en kreivaj studo kaj apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ, decideme respondas la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ "teni la revolucion kaj stimuli la produkton". Ili organizis teknikistojn iri al kamparo por peti opiniojn de kamparanoj pri plibonigo de ilia traktoro. Dank' al tio ili senĉese plibonigis teknikojn kaj fabrikis grandan kvanton da traktoroj por subteni agrikulturon.



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 1 (115) 1968

Ĉefa Enhavo

Vortoj de Prezidanto Maŭ

Solena Kunveno de la Popolanoj en la Ĉefurbo por Celebri la 50-an Datrevenon de la Oktobra Revolucio

Parolado de Kamarado Lin Biaŭ ĉe la Kunveno de la Ĉefurba Popolo por Memori la 50-an Datrevenon de la Oktobra Revolucio

Kial Ridas la Diabloj?

Kiuj Psalmas por la Sovetia Reviziismo?

Bankroto de la Ĉina "Parlamenta Maniulo"

La Popoloj de Sovetunio kaj Orienta Eŭropo Varme Prikantas la Lenin de la Nuna Epoko

Fotoekspozicio pri "La Granda Brilega Lampo de Socialismo en Eŭropo"

Floras Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio

Jen Venas Grandioza la Aŭroro (*poemo*)

La Ruĝa Suno Lumigas la Stepon de Interna Mongolio

Ĉiam Konservu la Naturan Karakteron de Proletaj Revoluciuloj

Sune Brilas la Koncepto pri Granda Proleta Kultura Revolucio

La Kultura Revolucio Antaŭenpuŝas la Ŝanhajan Industrion

Ĥore Sonas Himnoj en Dekmilo (*poemo*)

Universala Transistora Cifer-komputilo Sukcese Elfarita en Ĉinio

Ĉinio Viciĝas inter la Progresintajn Landojn en Karbomineja Ventolado

Arĝente Floris Haj-an

Bataleca Arto de la Heroa Popolo

Pli Furioze Flamu la Revolucia Fajro

Rakontoj pri la Brava Sudvjetnama Popolo en Ekstermo de Malamikoj

La Usona kaj Tutmondaj Popoloj Rigore Kondamnas la Agreson de la Usona Imperiismo en Vjetnamio

Kiu "Intence Malbonigas la Rilatojn inter la Du Landoj"?

Argilaj Modlaĵoj pri Familiaj Historioj de Aerarmeanoj

La argila statuaro titolita *Familiaj Historioj de Aerarmeanoj* konsistas el ok grupetoj kun 25 figuroj en grandeco de vera homo. Ĝi estas kreita de 6 aerarmeanoj. En la movado de granda proleta kultura revolucio, ili disvolvis sian revolucian spiriton kuraĝe pensi kaj kuraĝe agi, kaj kondamnis kun forta klasa malamo, per vivecaj sangaj historioj de klasbatalo la absurdan kontraŭrevolucian aserton de la ĉina Ĥruŝĉov, ke "ekspluatado estas merito". Ilia verko fariĝis bona materialo por klasa edukado al la vastaj amasoj de batalantoj kaj revoluciaj popolanoj.



"Senfina nokto regis la ĉielon de Ĉinio" — Ĝang Ginhiu, vicestro de aera brigado, almozis kune kun sia patrino dum la inundanaĝo. Kiam ili preterpasis la pordon de bienula domo, malamo ekflamis en iliaj okuloj.



"Se la naturo havus koron, ankaŭ ĝi oldiĝus" — La patrino de la piloto Pang Liĝu estis mortigita de tirana bienulo. Tenante sian viktimiĝintan edzinon, la patro de Liĝu brulis de la venĝema deziro frakasi la surteran inferon de la malnova socio per sia fera pugno.

"Ja tigrojn, leopardojn brave pelas la herooj" — La patro de piloto Ĝoŭ Baŭlong suferis teruran ekspluatadon de kapitalistoj en la malnova socio. Foje li falis teren sub peza ŝarĝo kaj sputis sangon, juna laboristo brave elpaŝis kontraŭ la imperiisto kaj lia lakeo, tiel ke la lastaj ektremis de timo, elmontrante sian abomenindan vizaĝon de papera tigro.





"Neniam estas bravaj homoj, kiuj timus ursojn" — Sub kruela persekutado de kuomintangaj banditoj, la patro de la piloto Ĉen Gjugong devis disiĝi de siaj familianoj. Ekbolis en lia koro la nova kaj malnova malamo, kaj li forte piedbatis la fian centfamiliestron. Li volis venĝi sin, li ekbatalis.



"Renverso de l' ĉiel' kaj tero — brava kanto pri batalo" — La familio de la vickomisaro politika de iu aera brigado Li Mingŝeng suferadis de generacioj subpremadon kaj ekspluatadon de bienuloj. Kiam liberiĝis la hejmloko, la 16-jara Li Mingŝeng aliĝis al la popola armeo. La politika direktanto diris al li : "Se vi volas revolucii, ĉiam sekvu Prezidanton Maŭ!"


上海七一拖拉机制造厂